

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

5 1981



En novaj loĝdomoj



Novaj domoj malantaŭ antikva konstruaĵo

Beijing (Pekino), antikva urbo kun longa historio, estis ĉefurbo de pluraj ĉinaj feŭdaj dinastioj. Tie konstruiĝis ore brilaj palacoj, imponaj pordegoj kaj luksaj loĝdomoj ĉirkaŭitaj per alta muro, kiuj ĉiuj servis al la feŭda reganta klaso. Sed la popolamasoj loĝis en malaltaj terdomoj.


Post fondiĝo de la nova Ĉinio, la popola registaro plenenergie restarigis kaj disvolvis la ekonomian konstruadon kaj samtempe multe klopodis por bonigi la vivkondiĉojn de la popolo. Precipe en la lastaj jaroj la ŝtato asignis grandan monsumon al konstruado de loĝdomoj por urbanoj. Sole en 1980 en Beijing konstruiĝis novaj domoj kun planka areo de 3,560,000 kvadrataj metroj, en kiuj estas instalitaj radiatoroj, necesejoj kaj ekipaĵoj por liveri akvon, elektron kaj gason. Por oportunigi la loĝantojn, oni konstruis apud la novaj domoj vendejojn, lernejojn, infanĝardenojn, hospitalojn kaj teatrojn kaj plantis arbojn, florojn kaj herbojn ĉirkaŭe de la domoj kaj ambaŭflanke de la stratoj.

En la naskotago de la kvarjara filino



Dommastrino en dimanĉo





En la domo de emerita laboristo

En ripozhoro



romenejo apud no-
uj loĝdomoj



Por viziti parencojn



Kun najbaroj

Nove konstruitaj loĝdomoj



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Ĝenerala sekretariino de UEA
Flora Szabo-Felso en Ĉinio

Foto de REN SHIYIN

SUR LA DORSKOVRILO:

Tigroj

Ĉinstila pentraĵo de
YUAN XIKUN

KOLORAJ SERIOJ:

En novaj loĝdomoj

La somerumejo Beidaihe

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj
de E-istoj:

Bambuaro

Sekigita lago en montaro de la
ŝtato Idaho, Usono

La korea nacieco

La arto de la ĉina ombro-teatraĵo

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Ĝenerala sekretariino de UEA
Flora Szabo-Felso en Ĉinio

Miljara cugo; Kolombarbo;

Plej eminentaj sportistoj de Ĉinio

Sporta kunveno de tibetanoj

Ĝenerala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

Por kio homo vivas	2
Multeesperigaj junuloj de Shanghai	5
Pri kio pensas la junaj laboristoj de Ĉinio?	8
NIA KULTIVEJO:	
Kial mi amas Esperanton	10
Profesie labori por Esperanto	11
La amika sendito de la Universala Esperanto-Asocio	13
ESP-NOVAĴOJ	16
SUR NIA LIBROBRETO: Amiketo por komencantoj	18
KORESPONDI DEZIRAS	18, 35, 44
Vojaĝo tra Sichuan	19
Botanika ĝardeno en dezerto	22
VIDINDAJ LOKOJ: Beidaihe — Ĉemara Somerumejo	25
KURANTAJ AFEROJ	27
Ombro-teatraĵo	28
En nia vilaĝo	30
Spritaĵoj	36
KULTURAJ NOTOJ	36
AMIKECO: La ĉina virina flugpilka teamo en FR Ger- manio	38
Brazilio — la ĉefurbo de Brazilo	40
TRA LA MONDO	42
Fatalo de sovaĝaj animaloj de la mondo	45
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Evento de la 18-a de Septembro 1931 kaj Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo	47
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: La moro de golaŭ-oj	50
SPORTO	51

Por kio homo vivas

— Pri diskuto en la gazeto “Ĉina Junularo”

EN la 80-aj jaroj de la dudeka jarcento okazis en Ĉinio afero forte agitanta la koron de la ĉina junularo kaj vekinta atenton de la tuta socio: En la n-ro 5 de “Ĉina Junularo” oni publikigis leteron de junulino Pan Xiao kun titolo “Ho, la Vojo de la Homa Vivo, Kial Vi Fariĝas Ĉiam Pli Mallarĝa. . .” Pro tio disvolviĝis inter la gejunuloj diskuto pri temo “Kia Estas la Signifo de la Homa Vivo”. Al la redakcio de la gazeto svarmis leteroj kaj artikoloj pri la diskuto kiel neĝflokaj el diversaj lokoj inkluzive de Xianggang (Hongkong), Aomen (Aŭmen) kaj Ameriko. En 7 monatoj la redakcioj de la gazeto “Ĉina Junularo” kaj la samnoma ĵurnalo, kiu organizis la koncernatan diskuton, ricevis sume 130,000 leterojn kaj kontribuojn pri tiu temo. Krom leteroj, oni sendis ankaŭ pentraĵojn, kompoziciojn, lignogravuraĵojn k.a. por esprimi sian vidpunkton pri la homa vivo. Troviĝis iuj diskutantoj, kiuj donacis al Pan Xiao librojn kaj skribilaron. . . La diskuto en la gazeto vekis tiel vastan kaj fortan eĥon, kio estas malofta en la historio de la ĉinaj gazetoj kaj ĵurnaloj.

ELVAPORIĜO DE KREDO KAJ SOPIRO AL LA VERO

Kial la letero de la junulino vekis grandan atenton kaj kunsenton de la vasta junularo? Ĉar ĝi eldiris spiritan vundon de la junularo kaj ties penson pri la homa vivo.

Rilate al tiu juna generacio naskita en la nova Ĉinio, ankorau en la infaneco, ili jam eksopiris al nebula sed bela perspektivo de la homa vivo dank’ al la instruado de siaj instruistoj kaj gepatroj. Kiel Pan Xiao skribis en sia letero:

“Kiam mi studis en elementa lernejo, mi jam informiĝis pri ‘Kiel Hardiĝis Ŝtalo’ kaj ‘Taglibro de Lei Feng’. Kvankam mi tiam ne povis tute kompreni ilin, tamen iliaj heroaĵoj kortuŝis min tial, ke mi ne povis endormiĝi plurajn noktojn.

“Poste mi hazarde trovis la broŝuron ‘Por Kiu Vivi kaj Kiel Vivi’ eldonitan en la pasinteco. Mi foje kaj refoje ĝin legis kaj estis tute absorbita de ĝi. Mi komencis formi mian plej elementan, tamen plej belan koncepton pri la homa vivo: Homo vivas ĝuste por ke aliaj vivu pli bele. . .”

Plejparto de la gejunuloj kore akceptis tiun belan mondkoncepton de ekstere. Ili kredis, ke en la mondo estas nur freŝaj floroj sen rubo; inter la homoj estas nur fideleco kaj amikeco sen hipokriteco kaj interpuŝiĝo; kaj interne de la Komunista Partio de Ĉinio estas nur unueco kaj harmonio sen batalo kaj malakordo. Tial ili deziras fariĝi freŝaj floroj en tiu harmonia, kvieta kaj bela edeno.

Sed la dekjara plago de la kultura revolucio komplete elvaporigis ilian belan idealon. Pan Xiao skribis en sia letero:

“. . . Mi propraokule vidis traserĉadon de loĝejoj, interbataladon. . . mi ekkonsciis, ke la ĉirkaŭa mondo ne estas tiel alloga kiel priskribis la libroj kiujn mi legis antaŭe.”

Kun doloro Pan Xiao kaj ŝiaj samtempuloj trovis, ke la kultura revolucio alportis ne la pli belan socion, kiun promesis al ili iliaj instruistoj kaj gepatroj. La naciperfida fuĝo de Lin Biao en la 13-a de septembro de 1971 kiel tondro skuis kaj enpuŝis ilin en labirinton. Kial en la

* La aŭtoro estas ĉefredaktoro de la gazeto “Ĉina Junularo”.

socialisma socio ankoraŭ estas tiel multe da hipokriteco, malbeleco kaj malvirto? Kial interne de la Kompartio estas konspiruloj? Kial sur la vojo de la homa vivo ne estas ĉiam aromaj rozoj? Pan Xiao skribis plue:

“Mi pasie kredis, ke homo vivas nur por ke aliaj vivu pli bone, kaj ke homo ne domaĝas oferi sian vivon por la popolo. Kiel ridinda tio estas, laŭ mia nuna opinio!”

“Kompreneble mi ne volantas pasigi mian tutan vivon en malklereco kaj pura plezurĝuado.”

“Ankaŭ iuj diris, ke en la mondo estas vere granda afero, tamen mi ne scias kie oni povas ĝin trovi. . .”

Ĉagreno pro forvaporigo de la kredo miksiĝas kun sopiro al la vero. En la spirita konfuziĝo la ĉina junularo daŭrigis sian senlacan serĉadon de vero de la homa vivo. Tio estas ĉefa ideologia stato de sufiĉe granda nombro da hodiaŭaj ĉinaj gejunuloj.

SERĈI RESPONDON EN LA VASTA DISKUTADO

La malforteco de Pan Xiao kaj miloj da psike ĉagreniĝintaj gejunuloj montrita en la vivkirklo malkovris niajn mankojn kaj malfortojn en la edukado al gejunuloj. Estas ĉiam bezonate fari al la gejunuloj ideologian edukadon kaj helpi ilin starigi revolucionan mondkoncepton. Ni devas gvidi ilin science analizi la realon, sed ne kovri ĝin per bela vualo. Ni devas prezenti al ili atestojn kaj diversajn vidpunktojn por helpi ilin trovi ĝustan konkludon en ilia persona komparado kaj cerbumado, sed ne akceptigi per ŝtopnutra metodo.

En la diskutado pri la signifo de la homa vivo en la gazeto “Ĉina Junularo”, ni laŭeble publikigis diversajn vidpunktojn pri la socio kaj homa vivo kaj faris vere demokratian diskuton. Ekzemple iuj junuloj opinias, ke oni ne povas vivi kaj por si kaj por aliaj; aliaj opinias, ke “por si” kaj “por aliaj” havas kontraŭecon kaj ankaŭ unuecon inter si en la socialisma socio kaj oni devas kompreni, ke oni vivas subjektive por la socio, sed objektive por si; kaj triaj opinias, ke estas absolute ke oni vivas por si. Ni konscie ebligis al ili serioze pripensi en la diskutado, por ke ili mem trovu la respondon.

Kial iuj gejunuloj havas pasivan vidpunkton pri la homa vivo?

Analizinte sin mem ili diris: “Ĉiuj generacioj havas siajn pozitivajn kaj negativajn flankojn. Ankaŭ ni, la nova generacio, havas multajn mankojn, kiel ekzemple, ni ne sentas fortan respondecon kiel la mastro,

multe neas, sed malmulte jesas.” Samtempe aliaj gejunuloj senkaŝe montris kiel la sociaj malbonaĵoj ilin influas. Kelkaj skribis, ke la diskutado ebligis al ili koni aliajn kaj ankaŭ sin mem. Precipe prezento de malsamaj vidpunktoj komprenigis al la gejunuloj, ke aŭdi de ambaŭ flankoj faras la okulojn klaraj, kaj tio helpas ilin starigi sciencon kaj solidan mondkoncepton. Iuj gejunuloj prenis la gazeton “Ĉina Junularo” kiel ŝtatan periodaĵon, la redaktorojn kiel naturajn farantojn de konkludo kaj la legantojn kiel instruatojn. Pro tio la redakcio publikigis en sia gazeto “Leteron al Junaj Amikoj”, en kiu ĝi skribis: “Gejunuloj tre deziras havi lokon por verŝi sian koron. En la miloj kaj dekmiloj da leteroj al la redakcio agitiĝas varma torento de sentoj kaj brilas prudento. . . Plene prezenti tiujn kristalaĵojn el la travivaĵoj de tiuj homoj en la limigita paĝo estas nia unua deziro.” “Ankaŭ nia redakcio estas ‘esploranto’, ankaŭ ni devas reĝustigi, riĉigi

Guan Zhihao legas leteron de leganto.



kaj disvolvi nian konon kune kun la gejunuloj en tiu diskutado.”

Tiu diskutado altiris al si ne nur gejunulojn, sed ankaŭ mez-aĝulojn, maljunulojn kaj eĉ gvidantojn de la Partio. Ili sincere verŝis sian koron al gejunuloj parolante pri siaj propraj travivaĵoj, tiel ke la koroj de la du generacioj batis laŭ sama takto. Hu Qiaomu, sekretario de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Sociologia Akademio, publikigis sian artikolon en la gazeto, en kiu li skribis: “Gejunuloj volas verŝi sian koron, diri siajn travivaĵojn kaj malkaŝi siajn ĉagrenon, deprimiĝon kaj esperon en konvena atmosfero por serĉi respondon. Nenio malbona estas por gejunuloj eldiri siajn ĉagrenon kaj deprimiĝon kaj kiu ne havas ilin? Ili eldiris, ke tio montras, ke ili ankoraŭ havas esperon kaj fidon al la socio kaj ili penas serĉi respondojn, kvankam multaj ekzistantaj respondoj ne povas kontentigi ilin. Ili etendis siajn manojn, ĉu ni devas repuŝi ilin? Ĉu ni ne devas firme premi iliajn etenditajn manojn kaj poste kuraĝigi ilin antaŭenmarŝi daŭre kun plena memfido?”

En tia atmosfero la diskutado disvolviĝis profunden. La kono de multaj gejunuloj pli kaj pli proksimiĝis al la vero.

“Tuj opinias, ke racia estas la koncepto, ke ĉiu ajn nocio pri publikaj interesoj estas subpremo al personeco kaj nur individuismo absoluta. Estas komprenebla la nocio, kiel reago kontraŭ la hipokrita subpremado al racia ‘individuismo’ dum multaj jaroj, tamen estas iom



Redaktorinoj analizas la demandojn elmetitajn de gejunuloj.

devia, se ĝi neas verajn publikajn interesojn.”

“Evidente ne estas racie, se iu toleras la erarajn agadojn pro egoismo, ĉar la eraraj agadoj kaj la egoismo nerekte damaĝas alies interesojn.”

“En la vivo estas multaj hipokriteco, malvirto kaj malbeleco, des pli nekalkuleblaj vereco, virto kaj beleco.”

“Malfortaj estas tiuj, kiuj deprimiĝas antaŭ la malfaciloj de la vivo, kaj la fortaj prenas ilin kiel riĉaĵon.”

“Eĉ kiam oni ekkonas la neeviteblecon de morto en sia konado de la mondo, oni ne lasas la konon ruini lin. La konita objekto ja devas fariĝi armilo por transformi la mondon.”

La diskutado fariĝis prikantado de la nova generacio de Ĉinio al la homa vivo, ĝi sonoras tra la tuta lando de la vastaj ebenaĵoj ĝis la foraj montvilaĝoj.

PLI SANE KRESKAS LA NOVA GENERACIO

La diskutado pruvis, ke la dek-jara kultura revolucio alportis al la gejunuloj ne nur spiritajn vundojn, sed ankaŭ ŝancon por ilin hardi. En tiuj ĥaosaj jaroj ili splitiĝis en la vagado. Iuj ne volontis toleri vivon trompitan kaj senkredan kaj protestis kontraŭ la sociaj malbonoj per diversaj agadoj, aliaj dronis en malpuraj ondoj de la vivo, sed pli multaj gejunuloj komencis mem pripensi kaj trovis ĝustan respondon pri la signifo de la homa vivo el la socia realo kaj verkoj de revoluciaj pioniroj.

Iu junulo en malproksima montregiono skribis al ni pri la vivo de li kaj liaj kolegoj antaŭ la spirita krizo: “Tage ni laboras kaj faras profundan socian enketon kaj nokte legas. Mi laboras kiel tagdungito kaj kulio en la arbaro de Xing’an-montaro kaj stepo Hulun Boir, kunportante kun mi ilaron por lignaĵisto, pecon da hunda felo kaj dorssakon kun verkoj de K.

Marks, L. A. Feuerbach, T. H. Huxley. Mi volas studi la homan mondon kaj trovi veran fidindaĵon en mia vojaĝo de miloj da kilometroj kaj mia sanga ŝvito super laborado en dekoj da urbetoj kaj vilaĝoj.”

Ĝuste tiel honeste kaj pene batalis la fortaj el la juna generacio travivinta severan provon. Ili akiris novan vivon en memkritiko kaj memneeo kaj ekkomprenis, ke “la vera signifo de la

homa vivo ne estas en la poŝo de la vivĝantoj, sed en la manoj de la kreantoj.” Ili rigardas reformadon de la socio kaj ŝanĝon de la realo kiel sian noblan idealon kaj kredon. Tiu idealo kaj kredo ne plu estas iluzia. Kun ĝi la bravaj procelarioj povas flugi antaŭen en ŝtormo! La ĉina juna generacio, kies tempo estis rabita de la dekjara plago de la kultura revolucio, nun fariĝas esperiga generacio. “Brave antaŭenmarŝi, tuj sekvi

la paŝojn de la epoko kaj havigi al si movforton.” Jen estas juro de la hodiaŭa ĉina junularo al la patrolando.

Kompreneble, la vundoj kaŭzitaj en la dekjaraj ĥaosoj ne estas komplete resanigeblaj per unu sola distkutado. La redakcio de la gazeto “Ĉina Junularo” daŭre klopodos por konduki la gejunulojn al lumo sur la vojo por trovi la veran signifon de la homa vivo.

Multesperigaj junuloj de Shanghai

EL la 900-miliona loĝantaro de Ĉinio du trionoj estas gejunuloj malpli-ol-30-jaraj. Ili kreskas kune kun la nova Ĉinio. Ili estas la generacio malhelpita de la dek-jara plago de la kultura revolucio kaj surŝultrigita per grava tasko de la moderniga konstruado de la patrolando. Alfrontante la realon, ĉu ili grumblas kaj afliktiĝas pro la perditaj jaroj aŭ honeste lernas kaj diligente laboras kun arda entuziasmo por kompensi la perdojn? Miloj kaj dekmiloj da gejunuloj elektis la lastan vojon kaj akiris gratulindajn sukcesojn. Ĉi tie ni konigas al vi, karaj legantoj, kelke da elstaraj junuloj de Shanghai.

NOVAJ HOMOJ EN LA NOVA EPOKO

Antaŭvespere de la Printempa Festo de 1980, en la dua granda

japana havenurbo Kobeo, la oceana ŝipo Licheng veninta de Shanghai estis ekveturonta al la haveno Mozi.

Ke la estro de tiu oceana ŝipo estas junulo, tio forte mirigis du veteranajn pilotojn por japana interna maro, tuj kiam ili enpaŝis la stirejon.

Chen Yongkang, la 31-jara ŝipestro, jam laboris du jarojn sur tiu ĉi posteno. Li sola direktis dufoje la ŝipon al Japanio, kvinfoje al Koreio, kaj ĉiufoje li plenumis bone la taskon. Tiu-tempe estis la tria fojo, kiam li estis direktanta la ŝipon al Japanio.

La 225-marmejla naviga vojo de Kobeo ĝis Mozi en la japana interna maro estas mallarĝa, zigzaga kaj ŝiplena, en iuj regionoj la akvo fluoj estas rapidaj

kun ondegoj furiozaj, kaj sub la akvo kaŝiĝas danĝeraj rifoĵoj. La ŝipo Licheng antaŭeniris ĝuste sur tia navigvojo. La du veteranaj japanaj pilotoj trovis, ke tiu ŝipestro mirinde bone scias ĉiujn rifoĵojn, vojturniĝojn, tajdfluajn direktojn kaj rapidecojn sur la navigvojo kaj la japanajn navigajn regulojn. Per sia eminenta komandanteco li donis profundan impreson al la japanaj amikoj.

La ŝipaj funkciuloj de la Shanghai-a Oceana Transporta Kompanio plejparte estas junuloj. Pli ol dek ŝipestroj havas ĉ. 30 jarojn. La ĉefmaato, la dua kaj tria maatoj de la ŝipo Licheng estas eĉ pli junaj ol Chen Yongkang, la plej juna aĝas nur 26 jarojn.

Hodiaŭ, gejunuloj kiel Chen Yongkang laboras en diversaj

entreprenoj de Shanghai. El ili estas labormodeloj, produktaj sturmantoj, fabrikestroj, kompaniaj direktoroj, docentoj de superaj lernejoj aŭ esplorantoj-studentoj kaj membroj de verkista asocio aŭ scienc-teknika asocio.

FAKULOJ ELKULTURITAJ PERE DE DILIGENTA MEMLERNADO

En iu somera tago de la lasta jaro, en la trakta etaĝdomo de la Ministerio de Ekstera Komercio en Beijing iris ekzameno fare de koncerna institucio al dekoj da kandidataj inĝenieraj teknikistoj senditaj de diversaj provincoj kaj municipoj, el kiuj oni estis varbontaj 6 teknikistojn kaj sendontaj ilin al usona kemia kompanio por trejni ilin en fakulojn pri plastaj modeliloj.

En la ekzamena ĉambro dek maljunaj fakuloj estis ekzamenantaj la kandidatojn unu post alia. En la fino eniris mal-dika junulo. Li estas Yang Weimin, 22-jara, laboristo de la Shanghai-a Radioricevila-modelila Fabriko.

El la kandidatoj li estis la plej juna kaj unika persono ne vizitinta superan lernejon nek havanta teknikan titolon. Por trovi la plej taŭgan personon, en la sekvanta tago la modelilaj fakuloj escepte faris al Yang unutagan ekzamenadon. Ili propramane skribis ekzamenajn demandojn kaj persone pride- mandis lin. La ekzameno ampleksis diversfakajn demandojn, kiaj la ĉina modelila teknologio, la formuloj, teoremoj, stato de la internaciaj plastaj modeliloj. La ekzameno montris, ke li bone posedas fakajn sciojn. Tiel la ordinara junulo superis nemal-


multajn inĝenierojn en la ekzamenaj notoj.

Lia sukceso rezultis el lia diligenta memlernado. Li pasie amis lernadon, sed dufoje perdis ŝancon viziti superan lernejon. En printempo de 1977 li fariĝis laboristo. Kiam li pri- pensis kiel daŭre lerni, iu gvidanto inspiris lin per jenaj vortoj: Farado de plastaj modeliloj estas nova teknologio, ĝiaj dis- volviĝo kaj aplikado ricevis sen- ĉesan renovigon, sed neniu el la fabriko povas legi la ricevitajn fremdlingvajn materialojn. Yang pensis en si: "Ĉu mi ne ludos pli grandan rolon, se mi kombinos la lernadon kun la laboro?" Tiel li koncentris siajn tutajn energiojn sur projektadon de plastaj modeliloj kaj lernadon de fremdaj lingvoj, kaj post nur unu jaro li akiris neatenditan sukceson.

PERSISTEMO EN MALFAVO- RAJ KONDIĈOJ

La vojo irata de gejunuloj estas ofte zigzaga. En la Tutlan- da Ekspozicio de Sunenergia Utiligo, la sciencesplora frukto de juna laboristo Chen Xide de la Shanghai-a Konstrumaŝina Fabriko tiris al si specialan atenton de multaj vizitantoj. Li sukcese faris sunenergian altvar- man fornon, kies fokus-tempera- turo povas atingi 1,300°C kaj fandi kupran peceton. Sed kiu povis imagi al si, ke tiun kon- tribuon al la patrolando faris Chen Xide en la malfavora situacio de persekutado dum la kultura revolucio!

En 1969 Chen Xide estis mal- juste kondamnita kiel aganta kontraŭrevoluciulo, kaj laboris en la fabriko sub kontrolo. Iun tagon li hazarde rimarkis mate- rialojn pri sunenergia utiligo en



Zhao Le

la biblioteko kaj forte emociiĝis pro tio. Li pensis, ke pli ol 20 landoj en la mondo utiligas sun- energion, sed Ĉinio tamen faris nenion tiuflanke. Sur la ĉina tero sunenergia meznombre ega- la al pli ol 3 miliardoj da tunoj da norma karbo ĉiutage estas ne uzita, kiel domaĝe! De tiam Chen Xide vizitis la bibliotekon ĉiutage post laboro kaj legis multajn verkojn pri sunenergia. En liberaj tagoj li faris eksperi- mentadon. Li havas firman de- cidon profitigi la konstruon de la patrolando per sunenergia.

En sufiĉe longa tempo li faris tion preskaŭ tute sola. La 1,096 trapezaj tabuloj por teni spegu- lojn estis faritaj en 560 tagoj dank' al la helpo de lia edzino en tajlado de metalplatoj, re- faldo de la randoj, reguligo, mal- dikigo kaj borado. Lia sinofere- mo kortuŝis siajn kolegojn, poste ankaŭ ili venis lin helpi.

Nun la malĝusta kazo de Chen Xide estis kasaciita kaj li fari- ĝis membro de la Instituto de Sunenergia Utiligo de Shanghai. Antaŭ nelonge li estis postenigi-


ta en la Shanghai-a Energi-teknika Instituto.

SORTO LIGITA KUN LA PATROLANDO

Laboristo Zhao Le estis promociita asistanta inĝeniero antaŭ nelonge. Lia patro, fama telekomunika inĝeniero, en 1969, antaŭ sia morto testamentis al 16-jara Zhao Le: "Estu homo utila al la patrolando."


Zhao Le firme tenas en la memoro la testamenton de sia patro kaj komencis persistan lernadon survoje al la scienca pinto. Vintre de 1974, Zhao Le partoprenis en la konstruado de la transmara telekomunika kablo inter Ĉinio kaj Japanio. Por la laborbezono, li decidis lerni unue ondoportan teknikon kaj japanan lingvon kaj faris por si urĝan lernoplanon. Ĉiutage eĉ en

la 20 minutoj survoje al la laborejo li parkerigis vortojn de fremda lingvo. Kaj post laboro li neniam forgesis viziti bibliotekon por legi sciencajn kaj teknikajn librojn. Fine li fariĝis juna fakulo. Dum kontrola ekzameno de importitaj ekipaĵoj, li trovis, ke iuj ciferoj superis teknikajn normojn, pri tio miris kun admiro ankaŭ la japanaj specialistoj. Post kiam la ekipaĵoj ekfunkciis normale, li sukcese faris kvin teknikajn renovigojn al la ekipaĵoj laŭ la produkta bezono.



Yang Weimin

Iun vesperon, tuj post kiam finiĝis la kontrola ekzameno kune farita de Japanio kaj Ĉinio, en la aŭdilo eksonis konata voĉo el la Osaka Aerodromo: "Sinjoro Zhao Le, ĉu vi povus sciigi min pri via aĝo?" Zhao Le petis la parolanton diveni. "Eble ĉ. 40 jaroj?" konjektis la lasta. "Ne, mi aĝas 23 jarojn," Zhao ekridis, ne povante sin deteni. "Ah! mi okupiĝis pri telekomuniko jam 23 jarojn, kiuj egalas ĝuste al via aĝo. Vi vere estas admirinda," respondis la parolanto.



Chen Xide

Pri kio pensas la junaj laboristoj de Ĉinio?

*Lastatempe la Beijing-a Pezmaŝina Fabriko faris enketon: Pri kio pensas junaj gelaboristoj. La gejunuloj kun aĝo de malpli ol 29 jaroj konsistigas 48% de la laboristoj kaj ofi-
cistoj de la fabriko. Por koni iliajn dezirojn kaj postulojn, la gvidantaro de la fabriko disdonis al ili po unu enketfolion kun 10 demandoj. La respondoj en 482 folioj estis diversaj. Kvankam la respondoj estas faritaj nur de gejunuloj de unu fabriko de Beijing, tamen ili reprezentis la deziron de la nunaj gejunuloj de Ĉinio. Ni publikigas ilin jene.*

— La Red.

La unua demando: Pri kio vi plej zorgas?

Respondo: (1) 315 el ili zorgas, kia estos la patrolando en la estonteco. Ili esperas, ke Ĉinio pli frue efektiviĝos la kvar modernigojn kaj la fabriko pli frue eniros la vicon de avangardaj entreprenoj. (2) 141 zorgas pri siaj promociigo, salajro-altiigo kaj bonstatigo. (3) 26 zorgas pri nenio.

La dua demando: Kion vi plej ŝatas?

Respondo: (1) 254 el ili plej ŝatas sciencon, teknikon, kulturalan scion, bonan sociordon kaj unuiĝon de la popolo, honestan agon, noblan kaj senegoisman konduton. (2) 58 plej ŝatas vivi trankvile kaj havi deziratan laboron. (3) 39 ŝatas demokration, liberecon, muzikon, turismon, vivon, amikojn kaj havi sufiĉe da libera tempo. (4) 18 ŝatas fari aventuron, fariĝi altranguloj, ŝatas sin mem kaj sian filon. (5) 57 montras nenian intereson.

La tria demando: Kion vi plej malamas?

Respondo: (1) 334 el ili plej malamas la "kvarpersonan bandon" kaj la detruadon al socia ordo kaj unu-

igo. (2) 95 plej malamas malbonajn laborstilojn, agon akiri apartan favoron per parencaj kaj amikaj rilatoj, privilegion kaj burokratismon ekzistantajn en la Partio. (3) 32 plej malamas tiujn, kiuj ricevas salajron tamen ne bone plenumas sian laboron kaj senfare pasigas sian tempon. (4) 5 plej malamas militon, malsanon kaj prezaltiĝon. (5) 13 nenion malamas.

La kvara demando: Kion vi plej bezonas?

Respondo: (1) 244 el ili plej bezonas sciojn kaj kapablon, kolektivan helpon, firman volon kaj persistecon, bonan medion por studo kaj sufiĉan tempon sub sia libera dispono. (2) 99 plej bezonas loĝkambron, monon kaj fianĉ(in)on. (3) 35 montras nenian bezonon.

Laboras junaj volontuloj.



La kvina demando: Kio estas la plej granda malfacilo en via vivo?

Respondo: (1) 237 el ili plendas pri manko de scioj, libera tempo, loĝĉambro, mono, pri malfacila aĉetado de mebloj, pri interpretiĝeco en publikaj veturiloj kaj malfacileco trovi amat(in)on. (2) 242 plendas pri aparta vivado de geedzoj pro laborado en malsamaj lokoj, pri sia malsano, pri sia laboro kaj vanta vivo. (3) 78 havas nenian malfacilon.

La sesa demando: Kion vi faras en postlaboraj horoj?

Respondo: (1) 245 el ili sin klerigas, lernas teknikon kaj fremdan lingvon kaj legas literaturaĵojn. (2) 134 hejme lavas vestojn, preparas manĝojn, flegas infanojn kaj faras meblojn. (3) 52 partoprenas en amuzaj aktivadoj. (4) 75 estas senfaraj.

La sepa demando: Ĉu la modernigo de Ĉinio estos efektiva?

Respondo: (1) 337 opinias ke ĝi estos espereble efektiva. (2) 55 homoj opinias ke ĝi renkontos multajn malfacilojn kaj estas malfacile

efektivebla. (3) parto de ili ne faris respondon pri tiu demando.

La oka demando: Kio estas la plej granda baro, laŭ via opinio, en la moderniga konstruado?

Respondo: (1) 146 el ili opinias, ke ĝi estas la malalta nivelo de scienco, tekniko kaj administrado de Ĉinio kaj tio, ke al Ĉinio mankas

talentuloj. (2) 152 opinias, ke ĝi estas la serioza burokratismo, malalta laborefiko kaj granda influo de la malnova kutimo. (3) 46 opinias, ke ĝi estas la ideologia ĥaoso kaŭzita de la "kvarpersona bando" kaj la situacio sen stabileco kaj solidareco de la socio. (4) 68 opinias, ke tio estas demando malfacila por respondi.

La naŭa demando: Ĉu vi volas labori en nia fabriko? Kial?

Respondo: (1) 240 el ili donis jesan respondon. (2) 43 volas sin meti sub disponon de la gvidantaro. (3) 122 ne volas: el ili 76 pro trafika maloportuno kaj tro longa tempo uzita sur la vojo al laboro, 6 pro neakomodiĝo al la triskipa laboro, 12 opinias, ke la gvidantoj estas netaŭgaj, 7 opinias, ke en la fabriko ekzistas serioza polucio.

La deka demando: Ĉu vi volas aliĝi al la Komunista Partio de Ĉinio?

Respondo: (1) 314 el ili tre volas kaj aktive klopodas por tio. (2) 79, inkluzive tiujn, kiuj antaŭe prezentis la aliĝan peton, ne volas aliĝi. (3) Parto de ili ne donis sian respondon.



Niu Linghua estas premiita pro la savo de infano.

Ekspozicio de pentraĵoj de gejunuloj





Kial mi amas Esperanton

de XIA BANGXIN*

EN la komenco de 1979, kiam mi ĉeestis la inaŭguran kunvenon de la Lingvistika Instituto de Hubei-provinco, prof. Secencz (Xue Chengzhi), dekano de la Fremdlingva Fakultato de la Centra-ĉinia Normala Instituto kaj fama esperantisto, konigis al mi Esperanton. Mi forte miris pri ĝia scienceco kaj logikeco kaj tuj petis lin lernigi min pri ĝia prononco, kaj tiamaniere komenciĝis mia unua leciono. Poste lernado de Esperanto fariĝis mia manio. Ju pli multe mi ĝin studis, des pli forte mi konvinkiĝis pri ĝia racieco kaj utileco. Ĝi ja estas granda brila verko en la kultura historio de la homaro.

Tamen mi havas ankoraŭ pli gravajn kaj profundajn kaŭzojn por ami Esperanton. Mi trovis, ke lernado de Esperanto povas nobligi, saĝigi kaj junigi homojn.

NOBLIGI SPIRITON

En la lastaj du jaroj mi konatiĝis kun multaj esperantistoj. El iliaj paroloj kaj agadoj mi trovis, ke plejparto de ili havas noblan virton: senegoisme sin dediĉi al la landa modernigo, al la mondpaco kaj paŝo-post-paŝa efektiviĝo de la unueco de la homaj lingvoj. La komuna idealo kunligas ilin, kaj ilian spiriton, nutras solidareco kaj frateco. Dank' al tiu spirito ili

diligente lernas, uzas kaj disvastigas Esperanton en tre malfacilaj kondiĉoj kaj atingis ĝojgajn sukcesojn. La sentimeco kaj persisteco por efektiviĝi tiun noblan celon estas la plej valora kvalito de esperantistoj. Mi ĉiam sentas min larĝvida, ĝoja kaj senĝena, kiam mi kunestas kun esperantistoj.

SAĜIGI HOMOJN

Kiel ĉiuj scias, fremdaj lingvoj estas instrumentoj de la internacia komuniko. Pli da lingvoj signifas pli da vojoj, pli da

pontoj kaj pli da ŝipoj. Sed neniu el la miloj da naciaj lingvoj en la mondo estas tiel scienca kaj facile lernebla kiel Esperanto.

Dum intervidiĝo kun fremdlandaj esperantistoj, la senĝena interparolado sen interpretistoj vidigis al mi kvazaŭ estontan vivon de la homaro. Kiel bele estas, se la tuta homaro per Esperanto interŝanĝos pensojn kaj informojn! Kiel unu el la necesaj paŝoj por efektiviĝi tiun celon ni devas pene konduki Esperanton en la sferojn de in-

La aŭtoro legas EPC.



ternacia korespondo, amika kontakto, komerco, turismo, sportaj aktivadoj, artaj festivaloj, sciencakaj teknika interŝanĝo, internaciaj konferencoj k.a.

Ellerninte Esperanton, oni povas pli multe servi al sia patruaro kaj la homaro. Ĝuste tia ideo kuraĝigas min diligente lerni, propagandi kaj disvastigi Esperanton.

JUNIGI LERNANTOJN

Iu diris, ke estas tro malfrue por mi, 47-jarulo, lerni Esperanton.

Komprenoble pli bone estas lerni fremdajn lingvojn en kna-

beco aŭ eĉ infaneco. Tiam oni havas bonan memoron kaj fortan imitkapablon. Tamen, kun tempopaso pliriĉiĝis la socia sperto kaj plifortiĝis logika pensado kaj imagpovo. Kun siaj fortaj scienceto kaj logikeco Esperanto faciligas la plenkreskulojn en ilia lernado.

Engels diris, ke li volus dividi sian aĝon de 74 jaroj en tiujn de 40 kaj de 34, ĉar tiamaniere li povus labori per duobla energio. Ankaŭ mi volus dividi mian aĝon de 47 jaroj en tiujn de 30 kaj 17 por ke mi laboru kiel energioplena 30-jarulo kaj lernu kiel 17-jara knabo. Kuraĝigate

de tiu spirito mi diligente lernas Esperanton en la lastaj du jaroj, kio eĉ refreŝigis mian memorkapablon. Tial la lernado de Esperanto, laŭ mia opinio, estas efika kuracilo kontraŭ memorperdiĝo.

Mi nepre persistos en la lernado, uzado kaj disvastigo de Esperanto kaj senlace klopodos por multe kontribui al la nobla celo per freŝa energio.

** La aŭtoro estas vicprezidanto de la Hubei-a Esperanto-Asocio kaj ĉefredaktoro de la revuo "Tribuno de Gianghan"*

SPOMENKA ŠTIMEC (Jugoslavio): _____

Profesie labori por Esperanto

DIVERSAJ estas la manieroj per kiuj oni enmonde laboras por la antaŭenigo de la Internacia Lingvo. Eble la legantojn interesus la informo ke en Jugoslavio ekzistas entrepreno, kiu profesie laboras por Esperanto. Ĝi aĝas 8 jarojn kaj en 1980 en ĝi laboris 7 plentagaj oficistoj. La nomo de la entrepreno estas Internacia Kultura Servo kaj ĝi havas sidejon en la ĉefurbo de Jugoslavia Respubliko Kroatio, en Zagrebo.

La entrepreno havas la statuson de kultura institucio. En 1972 kiam ĝi estis fondita, laŭ

jugoslavia leĝaro necesis iu organizado por funkciigi ĝin kaj finance kontribui al ĝia ekigo. Tiel, per malpli ol 350 guldonoj kaj tri optimismaj oficistoj komencis sian ekzistadon Internacia Kultura Servo. Ĝin fondis Jugoslavia Junulara Esperanta Asocio. Ĝia "spirita patro" estis s-ro Tibor Sekelj, konata jugoslava etnologo, kies ideoj pri Esperanto eknutris ankaŭ IKS — "Pli bona praktiko ol centhora prediko".

Anstataŭ prediki pri taŭgeco de Esperanto oni montru ĝian utilon. IKS do komencis mal-

rekte informadi pri Esperanto. Naskiĝis la ideo prezentigi profesiajn pupteatrojn el eksterlandoj al jugoslavia publiko, en la Internacia Lingvo. La pupo, al la infanoj la plej proksima medio, alportu al infanoj sciigon pri la ekzisto de la Internacia Lingvo. De jaro al jaro pli ol 500 prezentadoj en Esperanto prezentigis en Jugoslavio, alportante sciigojn pri diversaj kulturoj per la sama lingvo. PIF (Pup teatra Internacia Festivalo) ĝis hodiaŭ restis grava ero de la laboroj de IKS. En 1980 ĝi estis subvenciita per la sumo de ĉ. 50,000 gulde-



Laborantoj en la Internacia Kultura Servo. La dua de dekstre en la fronto estas la aŭtoro.

noj per kiuj estis organizitaj 35 prezentadoj en 11 jugoslavaj urboj. En 1981 estas planataj 2 festivaloj: en oktobro en Jugoslavio kaj en junio en norvega urbo Troms, la urbo, kun kiu Zagrebo flegas aparte amikajn rilatojn.

Okupiĝo pri pupteatro naskis ankoraŭ unu apartan laboron: en Zagrebo ekzistas pluraj centoj da infanoj, kiuj ne sukcesis ricevi liberan lokon en infanĝardenoj, ĉar ne ĉiuj ankoraŭ disponas pri necesaj kapacitoj. IKS tial dum kelkaj horoj semajne okupigas ĉ. 200 tiajn "ekster-infanvartejajn infanojn" instruante ilin prepari etajn programojn per "hejmaj pupteatroj". Kun gvidantoj infanoj lernas pri pupoj, faras prezentadojn, recitas kaj desegnas. Tiu laboro ne estas ligita al Esperanto, sed per ĝi IKS ricevas valoran subtenon kaj flegas parton de la festivalo-publiko.

Aparte subvenciata estas la laboro en lernejoj. Ĉ. 200 lernejoj el bazaj lernejoj per kunlaborantoj de IKS lernas Esperanton. Por ili estas ellaborita speciala lernolibro kun 350 plej oftaj vortoj de la Parola Esperanto. (Vortoj ricevitaj per komputila analizo de 25,000 vortoj). Jugoslavio estas ĉirkaŭata de itala, germana, hungara, rumana, bulgara, greka kaj albana lingvoj. Tiel do nur post kelkaj kilometroj oni povas trovi en alia lingva medio. Dank' al tiaj distancoj estas facile stimuli gelnantojn vojaĝi eksterlanden al lingva praktiko ĉe esperantistaj aranĝoj. Jam plurajn jarojn oni tre sukcese kunlaboras kun hungaroj kaj italoj kaj ĉe TEJO-kongresoj dum kelkaj lastaj jaroj regule aperas aŭtobusa karavano de junaj jugoslavaj esperantistoj.

La plurlingva, federacia Jugoslavio havas varian literaturon, ne tro konatan ekster siaj landlimoj. Ankaŭ per Esperanto

eblas akiri legantojn dise tra la mondo. Sur tiu konstato baziĝas beletra eldono de IKS. En la lastaj du jaroj aparte menciindas grandaj monkontribuoj por eldoni en Esperanto ĉefverkojn de kroata kaj makedona rakonta literaturo — "Moderna Kroata Prozo (600 p.) kaj "Antologio de Makedona Rakonto" (400 p.). En 1980 en IKS estis venditaj libroj en valoro de ĉ. 3,570 guldenoj.

Tamen nur de Esperanto-aktivecoj IKS ne povas vivteni sin. Ĉ. 40% de IKS-enspezo baziĝas je preseja laboro ne ligita al Esperanto. Temas ĉefe pri servoj de presejo, funkcia kadre de IKS.

IKS krome grandparte prizorgas la funkciadon de la Kroata Esperanto-Ligo.

Kiom kontrastas la kondiĉoj en kiuj ni vivas, tiom diferenciĝas ankaŭ la rimedoj per kiuj oni klopodas antaŭenigi la disvastiĝon de Esperanto. Estas agrable scii, ke Zagrebo en tiu gemo de poresperanta laboro estas nur malgranda mozaikero.



La amika sendito de la Universala Esperanto-Asocio

FEBRUARE, en Beijing (Pekino) kvankam vidiĝis ĉie ankoraŭ vintra pejzaĝo, tamen spiris jam printempo.

Jus kiam la ĉinaj esperantistoj pasigis sian tradician Printempan Feston, ili bonvenigis amikan senditon de UEA — ĝian ĝeneralan sekretariinon d-rinon Flora Szabo-Felso.

Posttagmeze de la 9-a de februaro, la internacia trajno malrapide eniris en la Beijing-an Fervojan Stacion. Sur la kajo la gastojn atendis Zhang Qicheng, la ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, Ye Junjian, membro de la konstanta konsilantaro de ĈEL, Ge Baoquan, prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, Zen Hojoŭ, vicprezidanto de PEA kaj aliaj. Preterpasis la vagonoj unu post alia. “Jen, estas ili!” ĝoje ekkriis Zhang Haiping, laboranto de ĈEL, kaj kuris post la moviĝanta vagonaro. La trajno haltis kaj descendis juna paro: la ĝenerala sekretariino de UEA d-rino Flora Szabo-Felso kaj ŝia edzo d-ro Pal Felso. “Saluton!” “Varman bonvenon!” kora saluto,

firma manpremo kaj amika ride-to tuj forpelis la lacon de la gastoj post la longa vojaĝo.

Vespere de la sekvanta tago, la Ĉina Esperanto-Ligo donis bankedon honore al d-rino Flora Szabo-Felso kaj ŝia edzo. En la bankedo, Chen Yuan, vicprezidanto de ĈEL, transdonis al la gastoj koran saluton de Hujucz, prezidanto de ĈEL, kaj en la nomo de ĈEL esprimis varman bonvenon al ili. Li adresis ankaŭ dankon al UEA pro ĝiaj subteno kaj helpo al la ĉina Esperanto-movado. Li esperis, ke la vizito de d-rino Flora Szabo-Felso plifortigos la amikan kunlaboron inter ĈEL kaj UEA, kaj kontribuos al la amikeco inter la popoloj de ĉiuj landoj, la mond-paco kaj plivastigo de Esperanto tra la mondo. En la nomo de UEA d-rino Flora Szabo-Felso esprimis koran dankon al ĈEL pro ĝia afabla invito. Ŝi alte taksis la gravan paŝon de ĈEL aktive partopreni en la internacia Esperanto-movado, kaj esperis, ke ĝi ludos pli grandan rolon en la movado. Ŝi deziris, ke la amika kunlaboro inter UEA kaj ĈEL pluapaŝe disvolviĝu. En la

bankedo, Jelezo, vicprezidanto de ĈEL, Zhang Qicheng, Ye Junjian kaj aliaj rememoris la amikecon inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj en la plej malfacila tempo de la ĉina revolucio. Kun aparta sento ili rememoris la kortuŝan amikecon kun hungara samideano Fedorĉak.

En fruprintempaj tagoj, la suno disŝutis siajn orajn radiojn sur la teron kaj varmigis la korojn de homoj. Akompanate de Beijing-aj geesperantistoj d-rino Flora Szabo-Felso kaj ŝia edzo vizitis la Someran Palacon, la Imperiestran Palacon, la Dek Tri Maŭzoleojn de Ming-dinastio, la Grandan Muron, Beihai-parkon, la Ĉielan Altaron kaj aliajn vidindejojn. La ĉinstilaj ĝardenistikaj konstruaĵoj, la turoj, kioskoj kaj pavilonoj sur montoj aŭ ĉe lagoj, la bunte pri-pentritaj aleroj kaj koridoroj... multe ravis la gastojn.

Vespere de la 12-a de februaro, d-rino Flora Szabo-Felso kun sia edzo forlasis Beijing por vojaĝi al famaj urboj Suzhou, Hangzhou kaj Shanghai (Ŝanhajo).

Suzhou, kiel antikva urbo, allogas gastojn per siaj apartaj pejzaĝoj kaj elegantaj kaj belaj ĝardenoj. En la Suzhou-a Broda Instituto, la gastoj propraokule vidis, kiamaniere junaj brodistinoj per siaj lertaj manoj brodis diversajn pejzaĝojn sur silkajoj. La duflanka brodaĵo "Orfiŝoj" eĉ trompis la okulojn de la gastoj, ke ili sentis sin kvazaŭ ili starus antaŭ akvario kun klara akvo kaj gaje ludantaj orfiŝoj inter akvoherboj.

Urbo Hangzhou ĝuas grandan famon tra la mondo pro sia bela Okcidenta Lago. Kiam d-rino Flora Szabo-Felso kun sia edzo atingis tiun ĉarman urbon, trafis ilin printempa pluveto. Kvankam ili ne povis bone ĝui la belecon de la Okcidenta Lago, tamen la senlime vasta akvomondo en nebulo, la florantaj kamelioj, la mirindaj grotoj, tintantaj akvofontoj, susurantaj verdaj bambuoj. . . multe ilin plezurigis. Precipe la majesta Mahavira Halo kaj la ore brilantaj budhaj statuoj en Lingyintemplo, la ridanta ŝtona budha statuo sur la Alfluginta Montpinto estigis ĉe la gastoj respekteton kaj admiron al la antikva orienta kulturo. D-rino Flora Szabo-Felso diris: "Antaŭe ni malmulte sciis pri la orienta kulturo. Ĉio, kion ni vidis en Ĉinio, ege interesas kaj inspiras nin."

La geesperantistoj de la urboj Suzhou kaj Hangzhou varme akceptis la honorindajn gastojn. En la bonvenaj kunvenoj okazintaj respektive en la du urboj, junaj esperantistoj kun granda intereso aŭskultis prelegon de d-rino Flora Szabo-Felso. Ili elmetis diversajn demandojn al la prelegintino, kio montris ilian fervoron kaj zorgon pri la internacia Esperanto-movado.



Ges-roj Felso en Beijing

Post la kontaktiĝo kun la esperantistoj de tiuj du urboj d-rino Flora Szabo-Felso diris, ke en Ĉinio, krom veteranaj esperantistoj, kiuj lernis kaj aktive propagandis Esperanton antaŭ dekoj da jaroj, nun vigliĝas granda nombro da junaj esperantistoj. Kvankam ili eklernis nian lingvon antaŭ nelonge, tamen ili montris grandegan entuziasmon. Ĝuste en tio ŝi trovis la grandan esperon de la ĉina Esperantomovado.

Posttagmeze de la 19-a de februaro, la gastoj atingis Shanghai — la lulilon de la ĉina Esperantomovado. Ili estis varme bonvenigitaj de Liu Huozi, respondeculo de la prepara grupo de la Shanghai-a Esperanto-Asocio, kaj aliaj samideanoj. La gastoj kaj gastigantoj havis inter si intiman konversacion. Liu Huozi koncize konigis al la gastoj la historion de la Esperantomovado en Shanghai. Frue en la dudekaj kaj tridekaj

jaroj, nombro da famaj esperantistoj, kiaj Hujucz, Bakin kaj Ĵelezo, fondis tie korespondan kurson, eldonis revuojn "Verda Lumo" kaj "La Mondo". Ili multe kontribuis por propagandi Esperanton en Ĉinio kaj akceli la interkomprenon kaj amikecon inter ĉinaj kaj diverslandaj esperantistoj.

Shanghai-aj samideanoj aranĝis por la gastoj riĉan programon. En la Laborista Kultura Palaco kaj la Junulara Palaco ili vidis viglan postlaboran kulturan vivon de ĉinaj laboristoj kaj gejunuloj. La "Ekspozicio pri la Nova Leĝo de Geedzeco" okazigita en la Laborista Kultura Palaco ege interesis d-rinon Flora Szabo-Felso, kiu profesie estas advokato, kaj d-ron Pal Felso, fakulon pri juro. Ili laŭdis, ke en Ĉinio oni povas tiel vivece prezenti sekajn artikolojn de la leĝo al la popolanoj per facile komprenebla klarigo kaj desegnaĵoj.

Fininte sian viziton al tiuj tri urboj, ges-roj Felso revenis al Beijing posttagmeze de la 22-a.

Antaŭtagmeze de la 23-a de februaro, gvidantoj de ĈEL Chen Yuan kaj Zhang Qicheng faris amikan interparolon kun d-rino Flora Szabo-Felso. Ambaŭ flankoj vaste interŝanĝis opiniojn pri la estonta ĉiuflanka kunlaboro.

Vespere de la sama tago, Chu Tunan, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, intervidiĝis kun d-rino Flora Szabo-Felso kaj ŝia edzo. Chu Tunan alte taksis la persistan klopodadon de UEA por disvastigi Esperanton tra la mondo. Li opiniis, ke la homaro pli malpli frue vivos en socio de Granda Harmonio, kie estos nek ekspluatado nek subpremado kaj ĉiuj estos egalrajtaj kaj uzos komunan lingvon. Kaj hodiaŭ, Esperanto provita en praktiko dum pli ol 90 jaroj ja estas la plej bona kaj efika projekto por tiu internacia komuna lingvo.

Ĉiuj landoj en la mondo devas atenti la instruadon, plivastigadon kaj uzadon de Esperanto. Antaŭ ĉio estas necese popularigi la instruadon de Esperanto en elementaj lernejoj. La Unuiĝintaj Nacioj devas plene taksi la rolon de Esperanto kaj akcepti ĝin kiel unu el siaj laboraj lingvoj, tio multe ŝparigos homforton, materian forton kaj monon kaj utilos al la progreso de la homaro. Chu Tunan emfazis, ke la tasko de UEA estas peniga kaj glora. Li esprimis sian tutfortan subtenon al la laboroj de UEA kaj ĝia ĝenerala sekretariino. La parolo de Chu Tunan forte kurtuŝis la gastojn. D-rino Flora Szabo-Felso diris, ke en Ĉinio, tiel eminenta persono kiel Chu Tunan, povas tiel profunde kompreni la laborojn de UEA kaj diverslandaj esperantistoj, kaj alte taksas kaj subtenas ilin, tio konvinkis ŝin, ke la ĉina Esperanto-movado posedas la plej favoran kondiĉon por disvolvo kaj certe plenumiĝos la afero, por kiu klopodas la monda esperantistaro. Ŝi diris ankaŭ, ke ŝi ĉiam memoros la kuraĝigajn vor-

tojn de Chu Tunan al ŝi mem. Post la konversacio Chu Tunan donis bankedon honore al d-rino Flora Szabo-Felso kaj ŝia edzo.

Dum sia restado en Beijing, la gastoj interparolis kun gelaborantoj de la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian pri la distribua laboro de ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj kaj vizitis Esperanto-kurson. Radiojurnalisto s-ro Pal Felso estas malnova aŭskultanto de la Esperanta elsendo de Radio Pekino. Antaŭtagmeze de la 24-a, ges-roj Felso gastis ĉe Radio Pekino. Ili kunsidis kun la kolegoj de la Esperanto-sekcio de Radio Pekino kaj rigardis ĝiajn ekipaĵojn por sonbendigo. Posttagmeze de la sama tago, la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Esperanto-Asocio kune okazigis kunvenon, en kiu d-rino Flora Szabo-Felso invitite prelegis pri la organizo kaj laboroj de UEA kaj koncize konigis la nunan staton de la Esperanto-movado en diversaj partoj de la mondo. La prelego ricevis varman bonvenon de pli ol cent ĉeestantoj.

Matene de la 25-a, la internacia trajno malrapide forlasis la Beijing-an Fervojan Stacion. Ĉe la pordo de la vagono d-rino Flora Szabo-Felso kun sia edzo manŝvingadis al ĉinaj gesamideanoj por ilin adiaŭi. Ni kredas, ke la vizito de d-rino Flora Szabo-Felso certe plifortigos la kontaktojn kaj kunlaboron inter ĈEL kaj UEA.

Ges-roj Felso en Hangzhou



Korekto

En la noto de la poemo «Baĉka, Mia Baĉka» sur p. 27, n-ro 2, «Baĉka» ne estas parto de Novi Sad, sed male. En n-ro 3, p. 7, dekstra k., linioj 3-4, oni legu «3,000 tunojn» anstataŭ «30 milionojn da tunoj».

**ESP-KURSO EN LA GAZETO
"LINGVO"**

La gazeto "Lingvo" eldonata de la Guangxi-a Universitato ekhavis Esp-kurson ekde n-ro 1 de 1981. La lecionojn verkis fama esperantisto Armand Su.

**AKTIVADO DE ESP-GRUPO
DE WUXI**

En Wuxi, fama ĉina pitoreska urbo, fondiĝis Esperanta studgrupo. Dum la pasinta pli ol duonjaro tiu grupo aktive propagandis Esperanton pere de la ĵurnalo "Wuxi Bao" kaj Radio Wuxi kaj rikoltis bonajn rezultojn. En tiu urbo multaj deziris lerni tiun ĉi lingvon. En la 1-a de marto de la kuranta jaro la postlabora lernejo de la Kultura Domo de tiu urbo ekfunkciigis Esp-kurson dank' al la helpo de la studgrupo.

**KUNESTO DE ESP-ISTOJ
DE TRI URBOJ EN HUBEI**

Esperantistoj de Wuhan, Huangshi kaj Shashi de Hubei-provinco aktivis en la Novjara Tago kaj Printempa Festo. La 1-an de januaro, la 12-membra delegacio el junaj esperantistoj de Wuhan vizitis la urbon Huangshi kaj rigardis tie la Esperanto-Montrofenestron aranĝitan de la prepara grupo de la Esperanto-Asocio de Huangshi kaj partoprenis en studkunveno de la tiea altgrada Esperanta kurso. En la vesperkunveno de la junaj esperantistoj okazinta en la Kultura Domo

de la urbo multaj junaj samideanoj prezentis solon, ĥoron, deklamon kaj mallongan dramon en Esperanto antaŭ nelonge lernita. La 7-an de februaro la Shashi-a Laborista Kultura Domo kaj la Shashi-a Esp-kurso de la Hubei-a Esperanto-Asocio kune organizis amuzan kunvenon por esperantistoj-laboristoj, en kiu la kursanoj prezentis multajn programerojn.

**ESP-KURSO EN LA NANJING-A
UNIVERSITATO**

La Nanjing (Nankin)-a Universitato ekprenis Esperanton kiel nedevigan kurson ekde februaro 1981. Nun 146 oficialaj gestudentoj kaj pli ol 150 neoficialaj gestudentoj lernas en la kurso. Ilin instruas Ye Fengzhi, vicprofesoro de la fremdlingva fakultato de la nomita universitato, per la lernolibro kompilita de CEL. La gestudentoj lernas po du horoj ĉiusemajne kaj la lernado daŭros unu jaron.

**KUNVENO DE LA ESPERANTO-
ASOCIO DE CHENGDU**

En la 15-a de februaro de la kuranta jaro la Esperanto-Asocio de Changdu kunvokis sian unuan membraran kunvenon de 1981. Liu Hongkang, prezidanto de la nomita asocio, donis raporton pri propagando kaj disvastigo de Esperanto, akceptado de fremdlandaj esperantistoj kaj korespondado kun en- kaj eksterlandaj samideanoj dum la pasinta unu jaro. La asocio deklaro funkciigis Esp-kursojn, kiujn vizitis pli ol 500 personoj. Esperantistoj de tiu ĉi urbo starigis amikajn rilatojn kun esperantistoj de Japanio, Francio, Svisio, Jugoslavio, Italio kaj aliaj landoj. Ili havas pli intiman rilaton kun esperantistoj de Montpellier de Francio.

**RUBRIKO "ESPERANTO" EN LA
ĴURNALO "SHANXI-A
SCIENCO KAJ TEKNIKO"**

Ekde junio de la pasinta jaro la nomita ĵurnalo publikigis serion da artikoloj pri Esperanto, kiuj vekis grandan intereson de la legantoj. Petite de la legantoj, ĝia redakcio faris rubrikon "Esperanto-aboco", kiun ili tre aprobis. Nun la prepara grupo de la Shanxi-a Esperanto-Asocio surbendigis la tekstojn kaj komencis vendi tiujn sonbendojn en la lando.

**NOVA PERSPEKTIVO POR
ESPERANTO EN TURISMO**

La Monda Turisma Konferenco, kunvokita de Organizo Monda por Turismo (OMT), inter la 27-a de sept. kaj la 10-a de okt. 1980 en Manilo (Filipinoj), akceptis deklaron, kiu eksplicite referencas al Esperanto kaj ties rolo en la faciligo de la internacia komunikado. La konferencon partoprenis 107 registaraj delegacioj kaj la reprezentantoj de 91 interŝtataj organizaĵoj (kiel UN, Unesko ktp).

La sukceso en Manilo estas rezulto de skriba propono al OMT fare de la hungara ministro pri komerco, Vilmos Saghy, kaj aktiva konferenca agado de du esperantistoj.

La Deklaracio de Manilo estas verŝajne la plej grava ĝisnuna turisma dokumento, kiu influos la turisman politikon de la ŝtatoj, almenaŭ ĝis la fino de ĉi tiu jarcento. Jen la Esp. traduko de la teksto pri Esperanto troviĝanta en la parto B de la deklaro:

(La Konferenco) rekomendas, ke estu farataj klopodoj por pligrandigi la konsecon pri turismo, por tiamaniere faciligi kaj helpi la komunikadon inter la turistoj, la loĝantoj

en la vizitataj lokoj kaj la turisma oficistaro; substrekas tiurilate la gravecon de la scipovo de lingvoj, precipe de tiuj kun universala destino, kiel Esperanto . . .

Celante obliki la ekspluaton de la favora rekomendo de Esperanto en tiu ĉi deklaro kaj la efikan antaŭenigon de la Internacia Lingvo en la turismo la ĝenerala sekretario de UEA, d-rino Flora Szabo-Felso, jam sendis al landaj asocioj kaj aliaj instancoj cirkuleron kun koncernaj proponoj.

UNUA ESPERANTAĴO DE NOVZELANDAJ INDIĜENOJ

En "Nov-zelanda Esperantisto", ekde la numero 6/1980 komencis aperi "Eksperimenta maoria-Esperanta vortareto". Supozeble, temas pri la unua esperantaĵo de la nov-zelandaj indiĝenoj.

INTERESA PREMIO-KONKURSO DE "VOĈO"

Jugoslavia E-revuo "Voĉo" (56227-Borovo, Školska ul. 25) anoncis premio-konkurson: ekde n-ro 1/1981 aperos en la unuaj kvar numeroj po 4 demandoj el la historio de E-movado kaj E-literaturo, al kiuj solvojn eblos sendi kune post apero de la 4-a numero. En la 5-a numero aperos la ĝustaj respondoj kaj la nomoj de tri premiogajnintaj abonantoj: 1-a premio 100 gld. aŭ egalvaloro, 2-a premio libro Enciklopedio de Esperanto (valoro de 50 gld) kaj la 3-a premio unujara abono al "Voĉo" por 1982. (Jar-abono por "Voĉo" por Jugoslavio 150 din, por aliaj landoj 16 gld. aŭ egalvaloro, abonebla pere de UEA.)

O.E.P. KAJ ESPERANTO

Dum la lasta kunveno de sia konstanta delegitaro (Parizo, 06.1280)

la Organizo de la Eŭropa Popolo (O.E.P.) — kies kultura organo estas la Fondaĵo por Eŭropo — decidis studi la kondiĉojn por adopti Esperanton kiel eŭropan komunikolingvon.

En la unua etapo la internacia lingvo fariĝos komunikilo de la diversaj departementoj de O.E.P. kaj de ĝiaj specialaj komitatoj. La Fondaĵo por Eŭropo ankaŭ decidis fondi Eŭropan Liberan Universitaton, kie oni i.a. ĝisfunde pristudos la problemon de eŭropa komunikolingvo. Por informoj kaj kontaktoj: Fon-

dajo por Eŭropo, B.P. 34, F-94140 Alfortville, Francio.

FESTLIBRO PRI WARINGHIEN

Okaze de la 80-jariĝo (en julio 1981) de prof. Gaston Waringhien, la longjara prezidanto de la Akademio de Esperanto, la nuna akademia estraro konfidis al R. Haupenthal la redakton de "Festlibro"; ĝis nun sian kunlaboron anoncis M. Boulton, T. Carlevaro, N. Kawasaki kaj kelkaj aliaj esperantistoj.

En la amuzkunveno de Esperantaj kursanoj de Shashi



Esperantistoj el Wuhan, Huangshi kaj Shashi



JOĈJO de Elsa Otto, eldonita de la Internacia Esperanto-Instituto (adr.: Riouwstraat 172, 2585 HW Hago, Nederlando). Formato: 12×16.5 cm. 94 p. Prezo: 8 nederlandaj guldenoj (ekskluzive de sendkosto); aĉetante minimume 3 ekz. samtempe, oni ricevos rabaton de 33%.

Por ellerni lingvon, oni devas multe ĝin praktiki en aŭdado, legado kaj skribado. Estas dezirinde, ke oni verku multajn interesajn legolibrojn por la komencantoj. En tiu afero E. Privat donis bonan ekzemplon per sia "Karlo". Ankaŭ "Petro" verkita de Lerfner kaj Bartelmes taŭgas kiel tia legaĵo, kvankam ĝi estas "lernolibro". Jen Elsa Otto ilin sekvas per sia "Joĉjo", bona amiketo por komencantoj. Kvankam ne "literatura juvelo," la romaneto tamen estas tre leginda por komencantoj pro sia facila bonstila lingvo kaj interesa rakonto

pri franca knabo Joĉjo, kiu dank' al Esperanto konatiĝis kaj amikiĝis kun geknaboj en Danlando, Islando kaj Nederlando per korespondado kaj kunvivado. La praktikado montris al li, ke Esperanto estas interesa kaj utila. Krom suka rakonto kaj modela lingvaĵo, la verko havigas al la legantoj ankaŭ freŝajn informojn pri aktualaĵoj en la Esperanto-movado, kiel la lastaj Universalaj Kongresoj, eldonado de Esperantaj koloraj bildlibroj en Ĉinio kaj elsendado de Esperantaj programoj de Radio Pekino kaj aliaj radiostacioj, kaj pro tiu ĉi aspekto "Joĉjo" estas eĉ pli bona ol siaj antaŭuloj por la komencantoj.

En la libro troviĝas tre malmulte da prezeraroj, kio ja estas grava kvalito por legaĵo por komencantoj. Krom kelkaj iom frapaj esprimoj, kiel "piedpilki" (ludi piedpilkon),

"mikshundo" (hundo miksrasa) kaj "kunaktori" (kune ludi aktore), eble oni devus rimarkigi pri jenaj punktoj: 1) En la frazo "Post dek tagoj kaj tiam baldaŭ" (9-a linio, p. 35) estus preferinde uzi "tiom" anstataŭ "tiam"; 2) en la frazo "Kiam longe restos la dancoj ĉi tie?" (11-a linio p. 35) estus preferinde uzi "kiom" anstataŭ "kiam"; 3) al la frazo "Kion la aliaj lernantoj diras pri aliaj urboj kaj regionoj preterglitas al li" (2-a linio de malsupre p. 56) mankas subjekto kaj oni devus aldoni "tio" je la komenco; 4) en la frazo "Vi vidis multe de la mondo" (1-a linio p. 90) estus preferinde uzi "pri" anstataŭ "de" aŭ "multon" anstataŭ "multe". Krome, estus preferinde diri "koloraj bildoj", "tajpilo", "ĥoro" kaj "somera vespero" anstataŭ "kolorbildoj", "tajpmaŝino", "kanthoro" kaj "somervespero".

Recenzis LAŬLUM



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Esperantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPĈ povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

LA RED.

* K-do Jan Vedevik (60-j. ofi-cisto), Poste Restante, 40101 Goteborg I, Svedlando, volonte kor. kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

* János Antik, 27-jara seruristo, kun ĉiu landano dez. kor. pri teatro, turismo. Adr. Aleea Luceafaru-lui Bloc 60, sc. F., et. II., ap. 16, Zona Lenin, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.


* Katalin Bajka, evang. pastrino, serĉas amikojn el t.m. Adr. Str. Olt, nr. 43, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Emese BARABĂS, 18-j. mezlerneja lernantino, dez. kor. pri literaturo k. sporto. Adr. Aleea Tineretului, 1. Bl. 13, ap. 31, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Hauptrichs Jeza, V. I. Lenin 6/10, 4800 Baia Mare, Rumanio,

dez. kor. kun esp-istoj el Ĉinio kaj Azio.

* 8-j. knabo, Kim Jones, 452 Aldine-Apt. 501, Chicago IL 60657, Usono (U.S.A.), dez. kor. Interesoj:



artajoj, inventajoj, baledo, violonado, scienco, matematiko, biciklado skiado.

Ĝenerala sekretariino de UEA Flora Szabo-Felso en Ĉinio

Fotoj de REN SHIYIN



Chu Tunan, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, intervidiĝas kun Flora Szabo-Felso.




Ĝenerala sekretario de ĈEL Zhang Qicheng interparolas kun Flora Szabo-Felso.




Vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo Chen Yuan intervidiĝas kun Flora Szabo-Felso. La unua de maldekstre estas Ge Baoquan, prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio.



Flora Szabo-Felso raportas al Beijing-aj esp-istoj pri la internacia Esperanto-movado.



Miljara cugo (*Tsuga chinensis*), trovita en Shennongjia en Hubei-provinco de Ĉinio, estas 36 metrojn alta kun periferio de 7.5 metroj.



Kolombarbo, decidua kaj rara planto por apreco, donas dupetalajn florojn balanciĝantajn en vento, kiel flugantaj kolomboj. Ĝi kreskas en la provincoj Hubei, Sichuan, Guizhou kaj Yunnan de Ĉinio.

LA provinco Sichuan situas en la interna parto de Ĉinio kaj estas tre kompleksa topografie. Ĉirkaŭ ĝi estas montegoj altaj je pli ol 1,000 metroj super la marnivelo kaj en la mezo troviĝas baseno. Nia plej longa Changjiang (Jangzi)-rivero ĝin trapasas. Ĝi fluas deokcidente orienten inter montaroj kaj tie formis multajn danĝerajn rapidfluejojn kaj kanjonojn kun belaj pejzaĝoj. Sichuan havas mildan klimaton kaj abundas je diversaj animaloj kaj vegetaloj. La raraj bestoj pando kaj orhara simio kaj la rara arbo metasekvojo hejmas en tiu provinco. Deantikve ĝi estis tre malfacile atingebla por aliaj provincoj. Ĝuste pro tio ĝi evitis militan destruan en la historio kaj multaj historiaj objektoj konserviĝas en ĝi. Post la Liberiĝo ĝia trafiko estis multe plibonigita, krom plibonigitaj navigaj vojoj, la nove konstruitaj fervojoj kaj aerlinioj ligas ĝin kun la grandaj urboj tra la tuta lando.

En la dua tagdeko de novembro 1980, mi komencis mian turisman vojaĝon al Sichuan-provinco. Tiam en Beijing (Pekino) frosta vento senfoliigis arbojn. Post tutanokta veturado nia trajno transpasis la montaron Qinling kaj eniris Sichuan. Mi jetis rigardon tra la fenestro eksteren. Ho, alian mondon mi envenis! Nia trajno rapidis en ravino apud klara rivereto. Ambaŭflankeondiĝis montoj kovritaj de verdaj arboj, sur deklivoj sterniĝis verdaj ŝtupaj kampoj. Kamparanaj domoj kaŝiĝis en densaj bambuaroj en valoj aŭ ĉe monttalo. Post nelonge la trajno haltis ĉe Guangyuan — la unua stacio en Sichuan. Sur la perono oni vendis mandarinojn kaj oranĝojn en plastaj sako. 1.5 kg. da tiaj fruktoj kostis 1 ju-

Vojaĝo tra Sichuan

de CAO BAILONG

anon, t.e. nur duonon de la prezo en Beijing. La pasaĝeroj konkure aĉetis por sate frandi. Posttagmeze la trajno atingis la provincan ĉefurbon Chengdu. Post ununokta ripozo, ni komencis en la sekvanta tago nian viziton al turismaj lokoj, el kiuj la unua estis Leshan, kie estas la plej granda ŝtona budhostatuo en la mondo.

ŜTONA BUDHOSTATUO EL TUTA MONTO

Frumatene ni veturis per aŭto de Chengdu suden kaj atingis Leshan tagmeze. Tie kunfluas la riveroj Dadu, Qingyi kaj Minjiang, la branĉoj de Changjiang-rivero. Ĉirkaŭe estas verdaj montoj, ĉe kies piedoj zigzagis riveroj similaj al rubandoj. Estas mirinde bele. Per motorboato ni veturis al la budhostatuo kaj baldaŭ venis antaŭ ĝin. Ĝi estas sida statuo de budho Majtreja ĉizita el rokmonteto Lingyun tuj apud rivero. La kapo estas ĉe la montsupro kaj la piedoj ĉe la riverakvo. La giganta statuo estas el tuta monto. Ambaŭflanke de la budho estas 12 gvardianoj altaj je pli ol dek metroj, en militaj kostumoj kaj kun armiloj en la manoj, kaj krome estas centoj


da ŝtonaj niĉoj. Ili formis grandan grupon de ŝtonaj statuoj.

Forlasinte la motorŝipon, ni ascendis la montsupron laŭ 250 ŝtonaj ŝtupoj kaj poste iris en koridoron etenditan al borda rokmuro, de kie oni povas klare vidi la kapon de la giganta statuo. "Ho, kia giganto!" La kapo altas je 14.7 metroj kaj larĝas je 10 metroj, la oreloj altas je 7 metroj, ili povas enteni po du homojn. Sur la du pieddorsoj ĉiu kun larĝeco de 8.5 metroj, oni povas loki 10 kamionojn kaj sur la ungo de ĝia dikfingro oni povas aranĝi bankedan tablon. La skulptado de tiu budhostatuo kun alteco de 71 metroj estis iniciatita de bonzo Haitong en 713 p. K. kaj daŭris 90 jarojn.

Sur la kvietaj monteto estas kioskoj kaj aliaj belaj konstruaĵoj. Antikva majesta pagodo alta je 40 metroj staras inter verdaj arboj sur la orienta montpinto Lingbao. Ni pasigis nokton en tiu bela medio kaj en la sekvanta tago veturis al la monto Emei.

ASCENDO AL LA MONTO EMEI

La monto Emei kun alteco je 3,100 metroj super la marnivelo estas majesta kaj eleganta. Ĝi havas densajn arbarojn kaj variajn montpintojn, inter kiuj troviĝas groteskaj rokogigantoj, kavernoj, kaskadoj kaj klaraj fontoj. Deantikve ĝi estas fama budhisma monto de Ĉinio, kaj la pasintaj dinastioj tie konstruis multajn templojn. Krome, ĝi estas tre riĉa natura muzeo, sur ĝi kreskas pli ol 3,000 specoj de vegetaloj, el kiuj estas pli ol 60 specoj de rododendroj, abio (*Abies delavayi Franchet*), davidio (*Davidia involucrata*) kaj aliaj raraj vegetaloj en la mondo. Tie vivas grandaj kaj malgran-



La doko de Chongqing

daj pandoj, sovaĝbovoj, sumatraj ĉamoj, simioj, makulaj cervoj, lir-ludaj ranoj kaj aliaj pli ol mil specoj de animaloj.

Ni venis al la templo Baoguo, konata kiel la pordo de Emei. Tiu templo kun kvar grandaj haloj konstruita en la 16-a jarcento sur montodeklivo estas ĉirkaŭita de arbegoj kaj rivereto. En la templo staras kupra pagodo Huayan muldita en Ming-dinastio (1368-1644 p. K.). Ĝi konsistas el 14 etaĝoj kun totala alteco de 7 metroj kaj surhavas 4,700 mulditajn budhajn statuojn kaj la tutan sutron "Huayan". En la unua halo troviĝas sep ore brilaj budhaj statuoj, antaŭ kiuj leviĝis incensaj fumstrioj. La lignaj klakiloj kaj niĉoj estis brile puraj. Iu tibetanino estis tie preĝanta antaŭ la budhoj.

De la templo Baoguo ni venis al la templo Wannian post duhora irado. En ĝi pompe floris krizantemoj. Mi vidis, en kuba konstruaĵo, kupran statuan de Samantabhadrā rajdanta sur elefanto, pezanta 62 tunojn kaj alta je 9 metroj. Tiu loko distancas de la montsupro ĉ. 60 kilometrojn. Oni diris, ke la vo-

jo preterpasas la plej interesan Basenon por Lavi Elefanton, kiun frekventas simioj. Ili ne timas homojn kaj ofte petas manĝaĵon de turistoj. Iuj eĉ traserĉas poŝojn de turistoj por akiri manĝaĵon! Sur la montsupro oni povas vidi budhan nimbon. Tiutage malsereniĝis la vetero, kaj neĝadis. Ĉar la vojo fariĝis glita, ni ĝisiris nur la monttalion kaj devis descendi.

Post reveno al Chengdu, ni ekveturis per trajno al la monturbo Chongqing apud Changjiang-rivero kaj ĝin atingis post unu nokto. De tie ni komencis nian vojaĝon sur rivero.

AL SHIBAOZHAI EN NOKTO

La rivero fluis tre rapide. Nia pasaĝera ŝipo sin direktis orienten. Ĝi estas tre bone ekipita kaj povis veturigi 800 pasaĝerojn. Sur ĝiaj antaŭa kaj malantaŭa ferdekoj oni povis promeni. Kiam ni atingis malgrandan dokon Xijietuo, jam vesperiĝis kaj pluvetis. Per motorboato ni veturis al Shibaozhai. Tiam densa nebulo vualis la riveron kaj ni povis vidi nenion, krom la buo-lampojn balanciĝantajn.

Nia motorŝipo subite albordiĝis. Ni piediris supren en mallumo kaj venis al gastejo kie ni trankviliĝis. Frumatene de la sekvan-ta tago, kiam ni eliris, ni pretervole ekkriis de miro. Unu 12-etaĝa ligna pagod-forma pavilono alta je 56 metroj staras tuj apud kruta kuba ŝtonmonto najbare de nia gastejo. Tio estas la fama Shibaozhai. Tiu pompa konstruaĵo kreiĝis en 1819. Ni ascendis laŭ ĝia spirala ŝtuparo. Elirinte la pavilonon, ni vidis, sur la ebena montsupro, templon kun verdtegola tegmento ruĝaranda. En la ĉefa halo troviĝas ŝtona truo. Legendo diras, ke antaŭe el la truo ĉiutage elfluis rizo en kvanto sufiĉa por nutri la bonzojn en la templo. Iu avidema bonzo pligrandigis la truon por akiri pli multe, sed de tiam rizo ne plu elfluis.

La montsupro estas je 230 metroj super la mara nivelo. De tie ni povis klare vidi la vastan kaj senfinan fluon de Changjiang. Ŝtupaj kampoj sterniĝis unuj super aliaj, verdaj bambuoj kaj arboj kreskis prospere kaj multaj loĝdomoj staris unuj apud aliaj sur la deklivo. Jen vere bela idilia bildo.

ĈARMAJ PEJZAĜOJ DE DANING-RIVERO


Por veturi de Shibaozhai al la urbo Wushan per ŝipo necesas unu tago. Tie troviĝas Wuxia, la plej bela el la tri montgorĝoj de Changjiang-rivero. Sed ĉifoje ni ne multe pririgardis la famajn tri montgorĝojn kaj de tie ni veturis al Daning-rivero, branĉo de Changjiang, per motorboato. Tiu loko havas belajn pejzaĝojn antaŭe malmulte konatajn. Ĝi malfermiĝis al turistoj nur lastatampe.

Post kiam nia boato eniris la montgorĝon Longmen, ni vidis, ke staras ambaŭborde krutaj rokmuroj ĉielskrapantaj kaj montpintoj groteskaj kaj ĉarmaj. La fluo estas tiel klara, ke oni povas bone vidi la kolorajn gruzojn sur la riverfundo. Ni vidis, sur kruta rokmuro, multajn truojn kvadratajn kun grandeco de 20 cm. kaj profundeco de 1 metro, kiuj distancas unu


de alia je ĉ. 2 metroj kaj formas linion longan je 120 kilometroj. Ili estis boritaj antaŭ du mil jaroj por konstrui surrokmuran vojon altan je almenaŭ 100 metroj. Tio estas vere admirinda. Post kiam nia ŝipo veturis 1.5 kilometrojn, la fluejo subite sin turnas formante rektan angulon kaj leviĝas 10 metrojn. Nia boato veturis supren kontraŭ la fluo. La motoro muĝis forte,

sed la boato restadis en la sama loko. Tiam ŝipistoj prenis bambustangojn por puŝi la ŝipon kaj pluraj viroj sur la bordo tiris la boaton per bambua ŝnuro, samvoĉe kantante ŝipistan kanton de Sichuan. La boato rampis lima-ke. Post trapaso de la danĝera rapidfluejo, ĝi denove veturis en kvieta verda akvo.


Elveturinte la montgorĝon, la boato enveturis en la montgor-



Shibaozhai



Giganta budhostatuo de Leshan



La templo Wannian

Botanika ĝardeno en

ĝon Tieguan (Fera Ĉerko). Sur la rokmuroj ĉe la bordoj pendas koloraj stalaktitoj similaj al feino jetanta broditan pilkon, pavo kun disetendita vosto ktp. ktp. El tiuj interesaj “bildoj” la “Ĉevaloj Revenantaj al la Monto” estas la plej viveca. Sur alta rokmuro pendas kvar grandaj stalaktitoj kaj inter ĉiu paro el ili estas unu malgranda. Ili tre similas al la postaj gamboj kaj vosto de du ĉevaloj tutforte enrampantaj en la monton kun la postaj gamboj kaj vosto ankoraŭ restantaj ekstere! En ŝtonfendo sur rokmuro de la dekstra bordo estas oblonga griza ligna kesto — nomita de la lokanoj “fera ĉerko”. Ĝi estis ĉerko pendigita de tieaj loĝantoj antaŭ du mil jaroj. Arkeologoj trovis en ĝi kuprajn monerojn, bronzan spadon, ŝpinradon, lignan kombilon kaj aliajn objektojn de Han-dinastio (206 a. K.-220 p. K.).

Trapasinte la Montgorĝon Tieguan, nia boato eniris en la montgorĝon Dicuī, kie fontoj kaj akvofaloj donas apartan belon al la pejzaĝoj. En la 30-kilometra galerio estas stalaktita monto simila al gravuraĵo, glata rokmuro kun alteco de centoj da metroj kaj longeco de pluraj kilometroj kvazaŭ hakita de dio. La roko estas brile ruĝflava kaj kreskas sur ĝi floroj, herboj kaj arboj, inter kiuj petolis simioj.

Sichuan havas multajn vidindajn historiajn lokojn kaj pejzaĝojn, kiel ekz. la digo Dujiangyan, la templo Baoguang kaj templo Wuhou en Chengdu kaj la Suda kaj Norda Termofontoj kaj Hongyancun ĉe Chongqing. Ĉar mankis al mi tempo, mi ne vizitis ilin, sed mi vizitos ilin en la estonteco.

DEZERTO impresas senlime kaj senhome.

Tia vidaĵo sin prezentis dum mia vizito al kamparo de Minqin-gubernio en la norda parto de Gansu-provinco. Sed kiam mi venis en botanikan ĝardenon de sablaj plantoj en tiu gubernio, mi simple ne kredis, ke mi estas en dezerto. Staras tie forstozonoj el altaj kaj rektaj popoloj; kreskas diversaj sablaj plantoj sur bonordaj ĝardenaj kampoj — iuj floras kaj aliaj donas fruktojn. . .

La mastro de la ĝardeno rakontis al mi, ke antaŭ tre longa tempo Minqin-gubernio estis loko fekunda kaj akvoriĉa, kie oni kultivadis teron kaj kaptadis fiŝojn. Laŭ restaĵoj elfositaj el antikvaj tomboj en tiu loko, arkeologoj konstatis, ke frue en 700-500 a. K. tie vivis homoj. Kaj en 1369-1460 p. K. la feŭda dinastio tie konstruigis grandan

muron, starigis fortresojn, garnizonigis trupojn kaj kultivis teron. Pro senbrida terekspluatado multe detruigis la flaŭro kaj ĉiam pli multiĝis ventaj kaj sablaj katastrofoj, ke flusablo forglutis bienojn kaj agroj.

En 1959 la sablo-junga taĉmento de la Ĉina Akademio de Sciencoj starigis ĝeneralan sablo-jungan eksperimentan stacion en Minqin-gubernio. Ili multe plantis diversajn arbojn, arbedojn kaj arbustojn taŭgajn por kreski en dezerto. Oni diris, ke multaj naturaj sablaj plantoj kaj kserofitoj travivis milojn da jaroj en la vastega dezerto kaj sole en Hexi-regiono de Gansu-provinco troviĝas jam cent specioj da tiaj plantoj. En 1973, subtenate de la ŝtato, ili fondis botanikan ĝardenon de sablaj plantoj, kiu liveris bonajn arbojn, arbedojn kaj arbustojn kaj teknikon de plantado por sablo-jungado kaj forstokulturo.

Botanika Ĝardeno de Sablaj Plantoj




dezerto

de GONG SUYI

Tiu ĝardeno ricevis formon post plurjara konstruado. Ĝi kun areo de 7 hektaroj inkluzivas kolektojn, selektojn, semokolektojn, kulturejojn por specialaj industriaj plantoj, enkondukitaj plantoj kaj arbidoj, kaj meteologian stacion. Por ke oni povu fari komparon kaj observadon, la botanikistoj konservis en la ĝardeno parton de la dunoj, sur kiuj kreskas tamarikoj kaj akantopanoj (*Acanthopanax spinosum*).


Mi promenis en tiu ĝardeno kaj miajn okulojn frapadis diversaj sablaj plantoj. Tie kreskas pli ol 290 specoj de plantoj, inter kiuj pli ol 100 estas sablaj plantoj kaj kserofitoj. Ili ĉiuj havas fortan radikon, densajn branĉojn kaj malgrandajn foliojn. Ili estas rezistemaj kontraŭ sekegeco, sterileco kaj salalkaleco, adaptiĝas al alta temperaturo kaj severa frostoj, ne timas sablon kaj tre taŭgas por kreski en dezerto. En la pasin-

Sciencisto esploras sablan planton.



teco oni faris forston ĉefe el altaj arboj por ŝirmi la lokon kontraŭ la vento kaj senmovigi la sablon. Poste sciencistoj eksperimentis kaj trovis, ke la sekeg-rezista arbedo bezonas akvon nur 5-10-one kiom la sekeg-rezista arbo, kaj sekve ili turnis sian atenton al plantado de arbedo.

En tiu botanika ĝardeno oni elektis kaj kreskigis iujn kserofitojn kaj helofitajn arbedojn, inter kiuj troviĝas holoksilono (*Holoxylon ammodendron*), kiu povas vivi ĉ. duonjarcenton kaj atingi alton de pli ol 5 metroj. Ĝi havas skvamajn foliojn kun maldika tavolo da vakso ĉe la surfaco, kiu povas preventi va-



En la ĝardeno, kie kreskas tamarikoj kaj akantopanoj

poriĝon de akvo. Ĝi povas kreski, sin etendante en sabla tavolo kun akva procentaĵo de nur 2-3%. Ĝiaj densaj branĉoj forte rezistas kontraŭ vento kaj ĝia granda profunda radiko tre kapablas senmovigi sablon. Ĝi estas bona specio inter la sablon-senmovigaj plantoj de Ĉinio. Per tiaj arbedoj oni regas dezerton kun areo de 6,000,000 hektaroj. Ankaŭ la akantopano, kiun la lokanoj nomas "ĉerizo en dezerto", vekis intereson ĉe mi. Ĝi estas rampoplanto kun abundaj branĉoj, kiuj povas malhelpi flusablon moviĝi. Aŭtune ĝiaj branĉoj estas riĉaj je ruĝaj, nutraj fruktoj.

Plejparto de la sablaj plantoj ne bone aspektas, tamen hedisaro (*Hedysarum scotarium*) estas escepto. Ĝi estas svelta kaj gracia kaj sur ĝiaj branĉoj sidas multaj violaj floretoj papiliformaj, kaj pro tio la tieaj loĝantoj nomas ĝin "knabinon de la dezerto". Ĝi, adaptiĝema arbusto kun alteco de 3-4 metroj kaj rezistema kontraŭ sekegeco, estas bona nektaridona planto en dezerto.

Mi vidis en tiu ĝardeno ankaŭ nemalmultajn eksterlandajn "gastojn", kiaj la torĉa arbo el Nord-Ameriko, la kserofita hodgsonio (*Hodgsonia macrocarpa*) el Libano, la kardo (*Silybum marianum*) el FR Germanio, la oleastro el Alĝerio kaj la anserkresta arbedo el Kanado.


Por enkonduki alilokajn arbojn kaj utiligi riĉfontojn de sablaj plantoj, la hortikulturistoj multe laboris super la dissemado de sablaj plantoj. En la dezerto vivas tre malmultaj birdoj kaj bestoj, sed vento blovas senhalte en la kvar sezonoj, tial dissemado de sablaj plantoj dependas ĉefe de vento. Iuj el ili kun

membranaj "flugiloj" aŭ longaj lanugoj povas naĝi en aero laŭ vento; aliaj kovritaj de densaj dornoj povas "senpage vojaĝi" alkroĉiĝante al bestoj; triaj disĵetiĝas malproksimen, tuj kiam krevas maturiĝintaj guŝoj; kaj kvaraj trafitaj de akvo produktas gluon, kiu kuniĝas kun sableroj kaj akcelas la ĝermadon. Krome, la sablaj plantoj donas sufiĉe grandan kvanton da semoj kaj tio havigas al ili multajn ŝancojn por ĝermado.

La hortikulturistoj faris ekologian kaj fiziologian studon pri la enkondukitaj ĉefaj sablaj plantoj kaj esploris ilian sekege-rezistecon por elekti iliajn semojn kaj fari racian plantadon. Antaŭe la kulturado de multaj sablaj plantoj estis studata de neniu aŭ de tre malmultaj ho-

moj. Poste oni faris multajn eksperimentojn kaj akiris nemal-multajn atingojn, iuj el kiuj estas jam aplikataj en grandarea sablo-jungado kaj forstokulturo.

La laboro kaj vivo en la dezerto estas monotonaj. Por bonigi la medion, la hortikulturistoj plantis multajn belajn florojn en la ĝardeno. Se vi eniras la pordon, vi povas vidi la disflorantajn daliojn, persajn krizantemojn, balzaminojn kaj papavetojn. Ili ankaŭ uzas terpeceton por kulturi tomaton, melongenon, kapsikon, kukumon kaj aliajn legomojn. Laŭ la peto de la ĝardenmastro mi gustumis tie la dolĉajn akvome-lonon, klabforman melonon kaj blankan melonon, kiujn ili plantis.



1. Shanghai
3. Sichuan
5. Hebei

2. Hubei
4. Guizhou
6. Gansu



Beidaihe—Ĉemara Somerumejo

de JI BO

EN 1898 la imperiestro de Qing-dinastio proklamis la malgrandan fiŝistan vilaĝon ĉe Bohai-golfo de Norda Ĉinio Beidaihe (Bejdajhe), somerumejo. En junio de 1979, tiu apudmara regiono, neniam malfermita al eksterlandanoj de post la fondiĝo de la nova Ĉinio, unufoje akceptis eksterlandajn turistojn.

Beidaihe, je 15 kilometroj sudokcidente de la urbo Qinhuangdao (Kinhuangdaŭ), Hebei-provinco, estas unu el ĝiaj tri distriktoj. Ĝi distancas de Beijing (Pekino) je 350 km., t.e. oni povas atingi tie post trajna veturado de kvin kaj duona horoj.

Por la turistoj la plej alloga en tiu loko estas strando, kiu etendiĝas 10 km. Dank' al sia subtila sablo kaj ebeneco, ĝi fariĝis ideala marbanejo. En Beidaihe estas ne tro varme eĉ somere. Kaj tagmeze, kiam la plej alta temperaturo atingas 34°-35° C, tien blovas la refreŝiga mara vento. La tuta distrikto havas ĉ. 20 mil loĝantojn. Tie la arbaroj estas densaj kaj la vojoj kvietaj, aŭdeblas neniam bruoj de homoj kaj veturiloj. Aro kaj aro da elegantaj vilaoj sin kaŝas en la verdaj arbaroj. Per siaj aparte kvietaj ĝardenoj, pura aero kaj longa strando Beidaihe vekis intereson de diverslandaj turistoj.

Ĉe ĝia orienta marbordo troviĝas la Agla Pavilono, kiu ricevis la nomon pro la apuda agl-simila rokego elstaranta en la maro. Tie oni povas rigardi la sunleviĝon el la maro. Laŭ onidiro, en ĉ. 200 a.K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio venis tien dum sia ekspedicio


kontraŭ aliaj regnoj. La urbo Qinhuangdao pro tio ricevis la nomon (en la ĉina lingvo ĝi signifas insulon de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio). En 207 p.K. Cao Cao verkis faman poemon "Rigardo al la Maro", kiam li atingis tie en sia norden-ekspedicio kontraŭ Wuhuan. Prezidanto Mao Zedong en sia poemeto "Bejdajhe" ja menciis tiun fakton. Nun ĉe la marbordo estas nove konstruita Jieshi-parko, kie abunde kreskas floroj kaj arboj. Ĝi altiras la vizitantojn per sia ĉarma pejzaĝo.

Ĉe la piedo de Liangfeng-monto troviĝas multaj vilaoj flavaj kaj blankaj, ruĝe tegmentitaj kun angla, franca, germana, usona kaj ĉina stiloj. Ili montras ke antaŭ la Liberiĝo Beidaihe estis somerumejo por eksterlandaj riĉuloj kaj ĉinaj alt-

ranguloj. Jam en 1893 eksterlandanoj venis tien kaj post kvin jaroj la registaro de Qing-dinastio oficiale permesis eksterlandanojn aĉeti tieajn parcelojn por konstrui domojn aŭ lui domojn por somerumi. De 1917 ĝis 1938 ĉinaj oficistoj kaj eksterlandanoj tie konstruis grandnombrajn vilaojn.

Post la Liberiĝo la metalurgia, karbomineja, fervoja, petrol-industria, poŝta kaj telekomunika departementoj de Ĉinio starigis pli ol 30 sanatoriojn kaj utiliginte antaŭajn vilaojn kaj konstruite novajn domojn. Ĉiujare ili akceptas laboristojn, oficistojn kaj intelektulojn venintajn el diverslokaj fabrikoj, minejoj kaj institucioj. En 1979 iuj el la centraj gvidaj organoj cedis siajn somerdomojn tieajn al la turismaj servoj. Tiuj somerdomoj

Sanatorio por ĉinaj karboministoj





La Marborda Klubo de Beidaihe preparis abundajn pladojn por fremdlandaj turistoj.

kun perfektaj instalaĵoj jam oficiale malfermiĝis kaj komencis akcepti diverslandajn turistojn post riparado.

Tie en la marbordaj hoteloj oni povas frandi nove kaptitajn kaj kuiritajn omarojn, krabojn kaj aliajn marajn bestetojn. Tie troviĝas ankaŭ unuaklasa germaneska kafejo. Oni diras, ke ĝi estas unu el la 2-3 germaneskaj kafejoj de Ĉinio. Ĝi eble altiras la turistojn kun aparta ŝato.

La grundo kaj klimato de Beidaihe estas tre taŭgaj por planti fruktarbojn. Preskaŭ ĉie en la ĉirkaŭaj vilaĝoj prosperas fruktoĝardenoj. Ekde junio ĉiujare la turistoj povas frandi la dolĉajn persikojn, pomojn, pirojn k.a.


La alta Marborda Klubo konstruita en 1960 ebligas al la turistoj pasigi plezurajn noktojn. Tie okazis gravaj kunvenoj de la gvidantoj de la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝia ĉefa halo estas filmoteatro kun 700

sidlokoj. La orienta halo ampleksas porturistan vendejon, drinkejon kaj dancejon. La du haloj estas inter-

ligitaj per koridoro kun multaj amuz-ĉambroj ambaŭflanke. En la vendejo oni povas aĉeti diversajn famajn cigaredojn, vinojn, ĉinajn metiartaĵojn, kaligrafiaĵojn, pentraĵojn, penikojn kaj ŝtonajn frotplatojn.

La turistoj teditaj de la strando kaj maro povas viziti la proksimajn antikvajn konstruaĵojn. Shanhaiguan — la unua pasejo de la fama Granda Muro — distancas de Beidaihe je nur 40 km. Ĝi troviĝas inter montego kaj maro kaj estis strategie grava loko, pri kiu la antikvaj militistoj konkuradis batalo. Sur ĝia 12-metre alta orienta urbomurego estas duetaĝa 10-metre alta turo kun granda horizontala tabulo "La Unua Pasejo sub la Ĉielo" sub la tegmentorando ĉe la fasado. Sur la turo oni povas havi panoraman vidon de la ĉirkaŭo — oriente troviĝas antikvaj fajr-signalturoj kaj kampadejoj, norde ondas Yanshanmontaro, sur kiu zigzagas la Granda Muro okcidenten etendiĝanta, kaj sude prezentiĝas la senlima Bohaigolfo, apud kiu estas la orienta fino de la Granda Muro. Oni nomas ĝin Draka Kapo.

Shanhaiguan — la unua pasejo de la fama Granda Muro






La somerumejo Beidaihe


Fotoj de QU WEIBO

▼ Ĉe plaĝo ▲






La Agla Pavilono




Vilao





La panoramo de Beidaihe

Vilao



**FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ**

Sekigita lago en montaro
de la ŝtato Idaho, Usono

de **PAUL KERN** (Usono)



Bambuaro

de **I. HARADA** (Japanio)





60 GRANDAJ KAJ MEZGRAN- DAJ INDUSTRIAJ ENTRE- PRENOJ FINKONSTRUITAJ EN ĈINIO

En 1980 Ĉinio finkonstruis pli ol 200 industriajn entreprenojn, el kiuj 60 estas grandaj kaj mezgrandaj. Tiel, la produkta povo estas altiĝita por la energio, malpeza industrio, tekstila produkto, trafiko, konstruaj materialoj kaj aliaj malfortaj branĉoj de industrio.

Inter ili estas 10 grandaj entreprenoj kun 75 unuopaj konstruaĵoj de la energia industrio, el kiuj novaj karboŝaktoj kun produkta povo de 7,290,000 tunoj troviĝas en la provincoj Liaoning kaj Shanxi kaj novaj petrolaj putoj troviĝas en la petrolaj kampoj Daqing, Karamay k. a., iuj el la lastaj jam komencis produktadon. 10 grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj kun 42 unuopaj konstruaĵoj de la elektra industrio pliiĝis produktan povon de 2,480,000 kilovattoj. Nove pliiĝita produkta povo de sukero estas 86,000 tunoj. En la lasta jaro Ĉinio finkonstruis fervojon de 910 kilometroj kaj pliiĝis ŝarĝ- kaj malŝarĝ-povon de havenoj je 6,825,000 tunoj.

28 SPECOJ DE TEKSAĴOJ DE SHANGHAI ATINGIS LA MONDAN NIVELON

28 specoj da teksaĵoj produktitaj de Shanghai (Ŝanhajo) atingis la avangardan nivelon de la mondo.

El la koncernaj teksaĵoj ĉefe estas: 84-fadennombra kotona kardita subĉemizo, silka trikoto, jakarda velur-tranĉita bantuko kun spiral-desegnaĵo, maldikripa kotona veluro, kaŝmira ĵerzo, tinkturita silkaĵo. Interalie la poliestere-kotona kamizolo jam povas kompari sin kun la samspeca mondfama produktaĵo kun marko "H". La kravata silkaĵo jam povas kompari sin kun la samspecaĵ

produktaĵoj de avangardaj landoj en desegno, fajneco, koloro kaj elasteco.

138,000 HEKTAROJ DA MARPRODUKTAJ-BREDEJO EN ĈINIO

La marproduktaĵ-bredado de Ĉinio disvolviĝas rapide kaj nun la kultura areo atingis 138,000 hektarojn. En 1978 la plej bona rekordo estis kreita en la marproduktaĵoj kaj ilia totala kvanto atingis 450,000 tunojn. Samtempe kun tio Ĉinio malpliigis kulturadon de laminario, sed kulturis kaj bredis pli multe da klamoj, sangaj klamoj kaj omaroj, kiuj havas debiton. En 1980 la areo de omarbredejo kreskis ĝis 7,000 hektaroj, la specioj de omaroj kreskis de unu ĝis 5 kaj la bredkvanto duobliĝis kompare kun tiu de 1979. Krome, oni konstruis 9 basenojn por brede haliotojn, pektenojn kaj holuturiojn.

ATMOSFERO-MEZURA AŬTOMOBILLO EKUZITA

Unu atmosfero-mezura aŭtomobilo fabrikita de Ĉinio jam veturis al la Guangzhou-a Petrol-kemia Fabriko kaj aliaj lokoj por esplori polucion de atmosfero.

Ĝi estis instalita per pluraj atklasaj aŭtomataj precizaj mezuriloj kaj ĝia laborefiko estas alta. Ĝi povas rapide mezuri direkton kaj forton de vento, ŝvebantano polvon, nitroksidon, sulfuran anhidridon, karbonan oksidon, ozonon, organikajn venenojn kaj aliajn. Ĝi povas akurate mezuri la polucian staton de Guangzhou kaj krei favorajn kondiĉojn por bone fari medio-protektan laboron.

AKORDIONO "PAPAGO" HAVAS DEBITON EKSTERLANDE

Laŭ akordiono "Papago" fabrikita de la Tianjin-a Muzikila Fabriko kun bela tembro kaj bona tonkvallito havas debiton en Japanio, FR

Germanio, Britio, Kanado, Belgio, Xianggang (Hongkong), Aomen (Aŭmen) kaj aliaj pli ol 60 landoj kaj regionoj.

La fabriko povas produkti ne nur mezklasan 120-basklavan akordionon kun kvar klavaroj, sed ankaŭ akordionojn de 15 normoj kun pli ol 20 tipoj, inkluzive atklasan kvarklavan akordionon kun resonatoro. Kun fortaj esprimpovoj, ili povas imiti la tembron de fluto, violono, tamburoj, lignaj blovinstrumentoj kaj aliaj muzikiloj.

TURISMAJ LUMBILDOJ

La Beijing-a Lumbilda Fabriko produktis en la lastaj du jaroj nombron da koloraj lumbildoj kun enhavo de ĉinaj pitoreskejoj, historiaj vidindejoj, gravuraĵoj, skulptaĵoj kaj pentraĵoj, kiuj vendiĝas en turismaj lokoj kaj por fremdulaj magazenoj kaj ricevis laŭdojn de fremdlandaj turistoj.

Tiuj lumbildoj povas esti kaj projekciataj kaj longe konservataj kiel memorajoj. Nun estas vendataj jenaj lumbildoj: "La Imperiestra Palaco", "La Subtera Palaco de Ding-maŭzoleo (Ming-dinastio)", "La Granda Muro", "La Somera Palaco", "Xiangshan-monto", "Elektitaj Pentraĵoj de Wu Zuoren" kaj "Pandoj".

ĈINIO TREJNIS POR 13 LANDOJ KULTURISTOJN DE DOLĈ-AKVAJ FIŜOJ

La Internacia Trejna Centro de la Perlo-rivera Akvoproduktaĵo-Instituto de Guangzhou en suda Ĉinio elkulturis en la pasintaj kvin jaroj 141 kursanojn pri dolĉ-akva fiŝbredado por Tajlando, Nepalo, Bangladeŝo, Pakistano, Srilankao kaj aliaj 8 landoj. Reveninte al sia patrujo post diplomitiĝo en la Internacia Trejna Centro, ili bredas kaj generigas herbajn karpajn, militriksojn, aristiktuzojn, karpajn kaj aliajn dolĉ-akvajjn fiŝojn en siaj landoj per la ĉina fiŝbreda tekniko.

Ombro-teatraĵo

LA ĉina ombro-teatraĵo mem estis arto de pupludo, en kiu plataj ledaj homfiguroj manipolataj de ludantoj kaj lumigataj de lampo reflektiĝas sur ekrano kaj tiel oni prezentas interesajn programerojn. Kaj antaŭ la ekrano oni povas spekti ilin en akompano de muziko kaj kanto. Tia teatraĵo prezentas multajn temojn kaj ne estas limigita de tempo kaj spaco. La leda homfiguro povas leviĝi al la ĉielo aŭ enteriĝi. Sur la ekrano videblas brulanta fajrego, ondanta maro, pavilono, turo, kastelo, ĉaro, ĉevalo, palankeno kaj aliaj objektoj. La enhavo de ombro-teatraĵo estas ĉerpita plejparte el ĉinaj antikvaj legendoj, kiel


“Pilgrimado al la Okcidento” kaj “Rakonto pri la Blanka Serpento-virino”. Post la Liberiĝo aperis programeroj spegulantaj la realan vivon, kiaj “La Blankhara Knabino” kaj “Li Shuangshuang”. Ombro-teatraĵo estas arto riĉa je romantikismo.


Tiu teatraĵo havas historion de ĉ. 1,000 jaroj. Ĝi ekfloris jam frue en Song-dinastio (960-1279 p. K.). Tiam en la socio jam fondiĝis ombro-teatraĵaj trupoj kaj metiejoj de ledaj homfiguroj kaj aperis multaj talentaj artistoj.

Ombro-teatraĵo estis tre ŝatata de la ĉina laboranta popolo en

la pasintaj dinastioj, kaj cirkulis multaj legendoj pri ĝia origino. Unu el ili estas jene: Antaŭ tre tre longa tempo la helpema bodisatvino Avalokitesvara venis en la homan mondon por prediki la budhisman doktrinion. Sed ŝia seka prediko tedis la aŭskultantojn. Iutage ŝi sidis melankolie inter bambuoj, plukis bambufoliojn kaj iel plektis per ili homfiguron, movante ĉi tiun, ke ĝi faru diversajn gestojn. Tio tre interesis ŝin, ke ŝi forgesis sian maĝojon. Subite venis en ŝian kapon la ideo: Kiel bele estos, se tiuj homfiguroj plenumos rakontadon pri budhismo! Sekve ŝi pendigis kurtenon por

Sceno el ombro-teatraĵo ludata de la Harbina Teatro de Popola Arto





Sceno el "Pilgrimado al la Okcidento" ludata de la usona ombro-teatraja trupo "Yuelong"

diskonigi sutron. Si movadis la bambufoliajn homfigurojn malantaŭ la kurteno, kaj la homfiguroj lumigitaj de olelampo reflektiĝis sur la kurteno kaj prezentis diversajn budhismajn rakontojn, kiuj altiris multajn homojn. Tiel naskiĝis teatraĵo de bambufolia ombro.

Tiu legendo portas religian koloron. Fakte, ombro-teatraĵo estis kreita de la ĉina laboranta popolo. De centoj da jaroj tiu teatraĵo populariĝis en multaj lokoj de Ĉinio. Dank' al la penado de artistoj de pasintaj generacioj, la ombro-teatraĵoj de diversaj lokoj iom post iom formis malsamajn originalajn artajn stilojn. Kaj tiu teatraĵo de Beijing (Pekino) akiris rimarkindan sukceson en arta modlado. Ĝiaj homfiguroj en rafinitaj koloroj estas simplaj kaj klasikaj. Ĝi altgrade tipigas kaj hiperbole kreas la figurojn de personoj en la reala vivo, tial ĝi havas fortan nacian karakterizaĵon. Ekz-e, la figuroj de junaj virinoj en tiu teatraĵo montriĝas ĉarmaj kaj

graciaj, kun nazo alta, brovoj longaj, okuloj mallarĝe malfermitaj kaj lipoj ruĝe ŝminkitaj. Tio asimilis tradician ĉinan pentrarton pri belulinoj. La viroj estas fortaj, kun brovoj densaj kaj arkaj, okuloj larĝe malfermitaj kaj vangoj dikmuskolaj. Ili similas al statuoj de budhoj en la antikva Ĉinio. La homfiguroj de la Beijing-a ombro-teatraĵo estas elegante eltranĉitaj, kun kompleksaj desegnaĵoj kaj delikataj strekoj. Por elfari unu homfiguron, oni devas uzi pli ol dek tranĉmanierojn kaj fari milojn da tranĉoj. Tial la ledaj homfiguroj de Beijing estas famaj pro sia eleganteco kaj viveco.

La ĉina ombro-teatraĵo estis enkondukita en Persion en la 12-a jarcento, en Egiption kaj Turkion poste, kaj en Brition, Francion kaj aliajn landojn en la 18-a jarcento. En 1774 la genia germana poeto Goethe servigis la ĉinan ombro-teatraĵon al prezentado de sia dramo "Faŭsto". Post la fondiĝo de la nova

Ĉinio, la ĉina ombro-teatraĵo eniris novan periodon. Oni ne nur kreis multajn novajn programerojn, plibeligis la muzikon kaj perfektigis la lumigadon, ke tiu teatraĵo rikoltis bonan efikon, sed ankaŭ eldonis multajn bildlibrojn kaj broŝurojn pri la ĉina ombro-teatraĵo por ĝin diskonigi al diverslandaj popoloj. Plurfoje ĉinaj ombro-teatraĵaj trupoj faris turneon en Francio, Svisio kaj aliaj landoj kaj akiris grandan sukceson. Krome, ĉinaj artistoj estis invitatitaj de iuj landoj por helpi ilin fondi ombro-teatrojn. Kaj tiel aperis iuj profesiaj ombro-teatraĵaj trupoj en Eŭropo, Usono kaj Japanio, kiel "Tri Umefloroj" de FRG kaj "Yuelong" de Usono. Ili prezentis la ombro-teatraĵon "Rakonto pri la Blanka Serpento-virino", adaptaĵo laŭ la samnoma ĉina mito, kiu estis varme akceptata de la rigardantoj. Tial tiu arto jam fariĝis hodiaŭ komuna riĉaĵo de diverslandaj popoloj.

En nia vilaĝo

(Novelo)

EN Lihuatun, nia vilaĝo en Wumeng-montaro, Oĉjo Feng, altulo en aĝo de pli ol kvardek jaroj, estas mizera senvalora kampulo, fama pro sia drinkemo. Nur diablo scias, kiamaniere li pasigis la tagojn en la lastaj jaroj. Sed nun li estas alvenigita de ie kaj staras kun rido inter du virinoj, kiel atestanto pri ilia konflikto, atendante pridemandadon de la estro de la produkta brigado. Subite li fariĝis kvazaŭ ia trezoro kaj tio estas vere amuza por la publiko!

“Oĉjo Feng! Ĉu vi trairis la stratbuŝon tirante bovon, antaŭ nelonge, je la tempo de matenmanĝo, t. e., kiam la geknaboj revenis hejmen post la matena lernohoro?” demandas la brigadestro Cao Fugui.

Ĉiuj ĉeestantoj scias, ke la brigadestro ĉiam favoras Duan Onklinon Luo. Ja kiu el la loĝantoj de Lihuatun ne havas plenan konon pri la aliaj en la vilaĝo kun sola strato travidebla per ekrigardo?

Palpebrumante kaj gratante siajn malordajn harojn kun ŝercema rido kiel kutime, Oĉjo Feng diris: “Kial kverelas samvilaĝanoj!”

Ĉiuj ekridis brue. Estas horo por paŭzo post la matenmanĝo, tial la strateto estas preskaŭ duone plenigita de homoj. Simile al ŝtoneto, kiu malkvietigas tutan laĝeton, bagatela okazaĵo en la vilaĝo povas altiri

atenton de ĉiuj ĝiaj loĝantoj. Parte pro tio, ke la strato estas tre malgranda, tial probable la okazaĵo iel koncernas ilin; parte pro tio, ke tro malmultaj estas la rigardindaĵoj sur ĝi! Se Oĉjo Feng aperas kiel atestanto, eble li kondutos nehoneste!

“He — ! Diru, ĉu vi trairis!”

“Vi diris. . ., ke je la tempo de matenmanĝo?”

“Post la matena lernohoro!”

“Kaj, tirante bovon?”

“Jes!”

Denove li ekpalpis sian kapon kaj ekridis pretervole, kun la buŝo larĝe malfermita, kvazaŭ li estus hontema. Tio denove kaŭzis bruan ridon.

Nun, la apude staranta malalta dikulino, Dua Onklinino Luo, ekrikanis je la febla malgrasulino, kaj ŝi diris:


“Oĉjo Feng, oni arbitre asertis, ke vi ĉeestis kaj vidis ĉion! — vidis, ke mia familiano estas tiel malnobla, ke li avidis du-cendan objekton kaj meritis baton. . .”

Apenaŭ tiu virino ekparolis, tuj paliĝis la gajeco alportita de Oĉjo Feng. Ĉiuj rememoris la okazintaĵojn kaj fariĝis grizhumoraj. En la lastaj jaroj, kiam aŭdiĝis ŝia voĉo, oni tuj sentis malgajecon kaj malvarmecon. Tiu virino aspektas kaj nepurema kaj ridinda, ĉu ne? Ŝi nur

iom-pli-ol-tridekjara, kun haroj kaj vizaĝo ŝajne neniam lavitaj, du ripveluraj olemakulozaj ĵaketoj portataj unu sur la alia — certe ridinda objekto en alia loko; sed ĉi tie en Lihuatun ŝi estas rigardata kiel moŝta sinjorino, ĉar ŝia edzo estas librotenanto en la nutraĵadministracio de tiu loko. Neniu kredis, ke la febla malgrasulino aŭ ŝia infano aŭdacus inciti ŝian familion. La edzo de la maldikulino Ren Laoda longe instruas en la elementa lernejo. Li estas homo honesta, sed tute nekomparebla kun Luo. Ĉiuj scias, kiel granda diferenco ekzistas inter la favorata kaj nefavorata virinoj. Bone sciante, ke Dua Onklinino Luo evidente kondutas maljuste kontraŭ la alia, ĉiuj sentas indignon pro la maljustaĵo kaj maltrankvilon pro ŝi. . .

“Bonvolu diri juste, Oĉjo Feng! Mia infano vere ne. . .”

Timeme rigardante Oĉjon Feng, la virino de Ren Laoda petas lin. La mizera virino edziniĝinta al instruisto neniam estis traktata kiel dignoplena “homo” en la vilaĝo. Ŝiaj vestoj, same kiel ŝia kabano malgaje staranta ĉe la stratofino, ĉiam bezonas riparon; ŝia malgrasa vizaĝo okulfrapas per sia pinta mentono kaj la paro da grandaj okuloj senbrilaj. Ŝi ĉiam estas febla kaj honesta, ŝi ja ne volus impliki Oĉjon



Feng, se la okazo ne devigus ŝin ne-
pre tion fari.

“Vere ne! —” Dua Onklino Luo
tuj interrompis ŝin, “vere ne sate ba-
tis, ĉu ne? Kaj infano el mia familio
devus humili ĉi tie?... Fi! Nur se
la hundoj ne plu manĝus ostojn! —
Ci, ci ne revu...”

Longe ŝi jam tiel insultadis antaŭ
la pordo de Ren Laoda. Tiu virina-
ĉo sentas malgloron, se ŝi ne insulta-
das tage. Ŝi postulas, ke la edzino
de Ren Laoda portu ŝian infanon al
la vilaĝa kuracisto, pagu por li be-
zonatajn medikamentojn, kaj se la
infano ne estos resanigebla en la
vilaĝo, li devos esti portata al la
gubernia, subprovinca kaj eĉ pro-
vinca urboj! Ŝia menso ĉiam pretas
por doni baton al iu. Ja kruelulino.
Se ŝi vere tion deziras, kiel la mal-
riĉulino povas tion elteni!

“Kriado ja ne alportos solvon,
Dua Onklino Luo!” brigadestro Cao
diris nehaste por ŝin ĉesigi. Kom-
preneble li havas pli bonan konsi-

deron ol Dua Onklino Luo. Li
daŭrigis: “Se la edzino de Ren Lao-
da diris, ke Oĉjo Feng ĉeestis, do ni
lasu lin mem diri. Se klariĝos al ni
la fakto, tiam ni povos facile solvi
la demandon. Oĉjo Feng, bonvolu
diri!”

“Hodiaŭ matene,” iom maltran-
kviliĝis Oĉjo Feng, “mi plugis...”

Li ektiris la buŝangulojn kvazaŭ
li volus ekridi, sed tion li ne faris.

Ŝajne li ĉeestis, tamen li ne kura-
ĝas konfesi. La kampuloj havas
kompare malaltan pozicion en la
vilaĝo, kaj krome li estas persono an-
koraŭ pli senvalora ol la aliaj. Li
havas edzinon kaj ses infanojn, kaj
tamen ne laboras zorgeme. “Por kio
labori!” li kutime diris kapskuante.
“Ĉu laboro kaj ne-laboro faras gran-
dan diferencon? — la malmultaj
greneroj eĉ ne sufiĉas por bekprena-
do de la birdoj; kaj post depreno de
greno sub tia kaj tia nomoj ĉu oni ne
fariĝos same senhava kiel mi Oĉjo
Feng?” Li ne volis labori nek lertis

en iu metiarto, kaj por komerci pri
porkidoj en foiro li ne nur ne ha-
vis kapitalon sed ankaŭ opiniis, ke
tio estas “afero malpia”. En aŭtuno,
kiam li estis ricevinta malgrandan
porcion da greno, li ankoraŭ forven-
dis unu aŭ du litrojn el ĝi, por aĉeti
0.5 kg. da vino kaj duonan porcion
da porkaj internaĵoj kaj drinki ĝis
plena ebriiĝo. “Kial?” li replikis.
“Kial nur vi rajtas? Ĉu mi Oĉjo
Feng ne estas homo kaj devas trinki
nur akvon?” Ebriiĝinte, li ĉagrene
ploradis senescepte kaj post mal-
ebriiĝo li denove gaje ŝercadis kiel
kutime. Antaŭ la alveno de prin-
tempo, li jam ĝenadis la brigadestron
per petoj por ricevi grenon el la
ŝtata vendejo, kaj poste li petadis,
malgraŭ honto, helpon de aliaj por
pruntepreni duonlitron da maizo aŭ
bovlon da fuŝmuelita rizogrio. Li
servis al aliaj per portado de mal-
sanulo, kaj aranĝis tablojn kaj se-
ĝojn, ekzemple, kiam la familio de
Dua Onklino Luo festenis, kaj post
tio li povis ricevi manĝon ĉe la mas-





tro. Li ofte devas peti ion de aliaj, ĉu li kuraĝus senpripense fari malplaĉaĵon al iu? Spiti Duan Onklinon Luo li ne kuraĝas, sed atenciantian kompatindulon, kia Ren Laoda, ja estas tro kruela afero por homo, kiu ankoraŭ ne tute perdis la konsciencan. Kion do li faru?

“Se vi ĉeestis, diru jes;” serioze lin admonas brigadestro Cao, “se ne, diru ne!”

“Mi... vere revenis de plugado...”

“Ho, Oĉjo Feng,” Dua Onklino Luo ekkriis. “Vi vere ĉeestis? Tre bone do! — Diru, ĉu vi vidis? Ĉu vere tiel okazis kiel la edzino de Ren asertis?”

Oĉjo Feng ja ne diris, ke li ĉeestis, tamen Dua Onklino Luo jam perdis paciencon, kaj tuj donis premon al Oĉjo Feng. Ŝi tute ne kredis, ke tiu Oĉjo Feng kuraĝos ne stari ĉe ŝia flanko! En ŝiaj okuloj, Oĉjo Feng estas nur hundo, kiu povas nur svingadi sian voston al ŝi. Ĉu foje li ne iris, pro duona parto de porkointesto donita de ŝi, al alia vilaĝo en profunda nokto por revenigi ŝian ebriiĝintan edzon? Por ne paroli pri helpo al paciĝo, eĉ por igi lin mordi iun necesus nur kelkaj ostoj. Ja kion tiu Oĉjo Feng povas signifi?

“Mi volis diri...” haste diris Oĉjo Feng.

...Oj, li vere ne kuraĝas diri. Kiel malgajige estas!

Oni sentas simpation al Oĉjo Feng. Ĉu vi pensas, ke malplaĉi al Dua Onklino Luo signifas nur malbonigi la rilaton kun ŝia familio? Se tiel estus, ŝajne ne necesus tiel multe da kuraĝo; sed ne, ja ne estas tiel simple! Ofendo al Dua Onklino Luo kaj al ŝia familio ja signifas

ofendon al la tuta supera socitavolo de Lihuatun! Vidu, tiel malgranda, soleca kaj malproksima estas nia vilaĝo, ĉirkaŭita de vasta rizkamparo kun montegoj ne tre malproksimaj. Sed por ni, la loĝantoj de Lihuatun, tio jam estas kvazaŭ la tuta mondo. Ekzemple, se vi ne sukcesas aĉeti duonbotelon da keroseno kaj pecon da sapo el la butikoj de la strato, vi do ne povas esperi ilin havigi al vi aliloke!... Kaj se vi estus ofendinta Duan Onklinon Luo, vi trovus, ke ankaŭ maljuna Chen en la butikoj sin tenas malvarme kontraŭ vi, kaj nokte vi ne plu havus lumon kaj vi ankaŭ ne havus la bezonaĵojn por lavi viajn vestojn, por jam ne paroli pri tio, ke en februaro la brigadaj kadroj forstrekos vian porcion de greno riceveblan de la ŝtata vendejo, ke pro tio estos malfacile por vi trapasi la grenomanĝan periodon en printempo... Ne, en la malgranda vilaĝo kvazaŭ administrata de pluraj akcio-tenantoj okazus al vi poste multaj neatenditaj ĝenaĵoj! Kaj ĉu vi ankoraŭ volos vivi plu ĉi tie? Ĉi tie estas via hejmloko neforlasebla malgraŭvole, kaj probable ankaŭ viaj venontaj generacioj devos vivi ĉe ĝi. Kion do vi faru?... Ĉu ne multaj grandaj herooj devis toleri tiranadon de iuj diabloj portempe? Se tiel estis, do ankaŭ ni en la malgranda vilaĝo ne devis esti tro postulemaj al Oĉjo Feng kaj riproĉi lin pro lia moleco...

“Kion do?...” Dua Onklino Luo elspiris “hm!” kaj diris.

Oĉjo Feng ridis embarase, li vere konfuziĝis, kvankam vera viro, li tamen aspektis, sub la minaca rigardo de la virino, tiel malkuraĝa kiel hontema knabineto. Li ekmovis la piedojn por stari pli bone, kvazaŭ la antaŭa pozo lin ĝenus, tamen li

ankoraŭ ne povis ion diri. Estis serena tago printempa, la suno hele lumigis la vilaĝon. Li sentis varmege kaj ŝvito fluis de liaj tempioj malsupren tra liaj larĝaj kvadrataj vangoj...

“Ĉu bonajn aŭ malbonajn vortojn,” malpacientiĝis Dua Onklino Luo, “ekdiru ja!... Laŭ via sinteno, ŝajne ni kulpis?”

Rulpretiginte cigaredon, brigadestro Cao ĝin ekbruligis, faris unu paŝon al li kaj diris: “Oĉjo Feng! La infano de Ren asertis pri via ĉeesto. Se vi ĉeestis, diru jes; se ne, diru ne! Tio signifas, ke vi devas respondi al la popolo; respondi al la familio de Ren Laoda; respondi, kompreneble, ankaŭ al Dua Onklino Luo! — Ĉu vi bone aŭdis?”

Brigadestro Cao parolis kun granda takto, kaj ĝuste pro tio oni ne povis ne rimarki, ke li aludas kaj kaŝe premas Oĉjon Feng. Tiu ĉi denove ekmovis siajn piedojn kaj ankoraŭ pli embarasiĝis.

Se tiel iros plu la afero, ĝi turniĝus malbone. Pro la justamo la ĉeestantoj iom malpacientiĝis kaj komencis intermeti vortojn:

“Diru do, Oĉjo Feng!”

“Ĉu tio gravas? Ĉu povos fariĝi grava sekvo de via diro?”

“Tuj diru, se vi volas, por ke ni povu poste iri al laboro, en tia okupoplana sezono...”

Kompreneble ankaŭ ili parolis kun granda takto kiel brigadestro Cao, sed ankaŭ ilia inklino efikis kiel premo sur Oĉjo Feng.

Estis jam neeble elturniĝi plue. Oĉjo Feng simple silentiĝis, tamen ial li ekĝemis, faris kelkajn paŝojn





flanken kaj kaŭriĝis sub tegment-rando kun interplektitaj brakoj kaj malgajaj gapantaj okuloj. Kutime li ofte tiel kaŭradis antaŭ sia pordo por ĝui sunvarmon, dolĉe kun du-one fermitaj okuloj; sed hodiaŭ tre malagrabla, kvazaŭ fine trovita debitoro, kiu devas pagi grandan ŝuldon kaj tamen havas nur malplenaajn manojn, sekve povas nur atendi decidon de la kreditoro... Ho, oni nepre ne trafu tian staton, ke estante ĉiam en malfavora pozicio oni devas suferi premon pro ĉiu bagatelo kaj ne kuraĝas eĉ diri unu vorton pri la vero!

La strateto subite silentiĝis; oni rimarkis ke ronda blanka nuboj transŝvebas la strateton; hirundojflugis malalte, senĉese pepante...

Malproksime aŭdiĝis klare krioj de kukolo.

Post paŭzeto, Dua Onklino Luo ekinsultis laŭte. Ĉifoje ŝi koleriĝis. Eĉ silentado de Oĉjo Feng signifis ŝian malpravecon, ĉu ne? Kaj tio signifis honton al ŝi antaŭ la plenstrato da homoj, kaj tion faris eĉ Oĉjo Feng, malpli valora ol hundo, ĉu tolereble!

“He — ! Oĉjo Feng, ĉu vi estas homo? Ĉu vi mutiĝis? Per kio mi Dua Onklino Luo vin ofendis? Eĉ se vi estus hundo, vi povus fari bojojn!”

Kaj tion sekvis orempikaj insultoj. Ŝi flanken lasis la edzinon de Ren Laoda kaj prenis Oĉjon Feng kiel rivalon.

“Ne insultu!”

“... Li ja estis petita atesti...”

Iuj tiel intermetis kaj multaj vere ne plu povis daŭrigi la aŭskultadon.

“Insulti mi volas! — mi atentigu antaŭe, ke tio ĉi ne koncernas iun alian! Kiu ajn trovas sin bravega, elpaŝu paroli, kaj tiam ne kulpigu min pri ignoro de amikeco!”

Kaj Oĉjo Feng klinis sian kapon ankoraŭ pli profunde kaj restis muta. Oj, Oĉjo Feng estis vere premsufokita. Ĉiuj bedaŭris lin.

Dua Onklino Luo insultadis senĉese. Tiu virinaĉo jen metis siajn manojn al la koksoj, jen piedfrapis al tero kaj manfrapis al la femuro, senĉese ŝutante “fi-ojn” kaj kraĉante al Oĉjo Feng.



“Laŭ mia opinio,” denove ekparolis brigadestro Cao, “Oĉjo Feng, vi devas diri objektivisme!”

Pro lia admonado, fine Oĉjo Feng ekmovis sin kaj starigis.

“Bone,” diris la brigadestro, “tio ja ne koncernas vin...”

Oĉjo Feng senvorte ekbalancis sian kapon kaj reiris per malhastaj paŝoj al la antaŭa loko, strange kun mieno, kvazaŭ li volus esplori. Estas popoldiro, ke sub premo de potenco oni kondutas kontraŭ la konscienco. Ĉu li tamen vere atencos la familion de la malriĉa kaj time-ma instruisto?

“Brigadestro Cao,” ankaŭ lia voĉo strange tremis, “vi... volas, ke mi diru?”

“Jam longe ni atendis!”

Oĉjo Feng denove balancis la kapon kaj haltis.

“Mi Oĉjo Feng, vi ja scias,” li sentis ĉagrenon kaj diris al ĉiuj malrapide, “ne estas kalkulata kiel homo sur tiu strato... kompreneble, similas nur al hundo!... Mi estas ekstreme mizera — kion mi faru!... Vi ja vidas... la tutan vizaĝon mi perdis...”

Kio estas al li? Ĉiuj ekmiris, silentiĝis kaj lin rigardadis.

“Lastjare,” li daŭrigis, “. . . da rizo kaj maizo mi ricevis same centojn da ĝinoj (1 ĝino=0.5 k.g.) pli multe, kaj tio sufiĉos por konsumado de mia familio ĝis majo aŭ junio. Mi ricevis dekojn da ĝin-oj da glua rizo, el kiu mia virino intencas fari kelkajn zongzi-ojn* por la infanoj en ĉi jaro. Kaj tiam rikoltiĝos jam terpomoj... kaj por la kolzosemoj rikoltotaj el miaj kampoj la ŝtato premie vendos al ni rizon, kaj ni rikoltos ankaŭ iom da tritiko el la

parcelo de privata uzo... Se nur ni povos sukcese transplanti rizplantojn, ni eldraŝos ankaŭ rizon, kaj ni plukos maizospikojn...”

“Oĉjo Feng,” lin interrompis Dua Onklino Luo, “kian sensencaĵon vi parolis!”

Tute neatendite, Oĉjo Feng subite sin turnis, same piedfrapis kaj ekkriis plenvoĉe kun ruĝiĝintaj okuloj:

“Brigadestro Cao! Aĉeti grenon de la ŝtato vi povas permesi al mi aŭ ne, laŭ via bontrovo, sed mi, Oĉjo Feng, ĉijare povos vivi plue sen tio!”

La ĉeestantoj, kiuj neniam antaŭe vidis Oĉjon Feng tiel furioza, stuporis pro surpriziĝo. Lia larĝa vizaĝo subite longiĝis, malheliĝis kaj li grincigis la dentojn iom timige.

“Ĉu mi Oĉjo Feng volas preni du uncojn da viando?” Li respondis frapante sian bruston: “Jes! Forvendinte kolzosemojn mi aĉetos kelkajn ĝinojn por foje manĝigi miajn infanojn, kaj certe mi ne petos vian helpon por tio! Nun en la foirtagoj kamparanoj ja povas buĉi porkojn kiel antaŭe, via administracio jam ne monopoligas tion; pro libera vendado oni povas havigi al si grasan aŭ malgrasan viandon laŭvole, dank’ al krompago de dekkelkaj cendoj! ... Sciu, ke nun estas alie ol antaŭe, via patriarko, ĉijare...”

“Oĉjo Feng! Tenu vian buŝaĉon pura! Kies patriarko vi estas?”

“Kaj kion vi volas? — ĉu vi kuraĝus min ektuŝi? Se vi volus bati, provu hodiaŭ!... En la antaŭaj jaroj via patriarko devis humilaĉi kaj plene toleri ĉiajn maljustaĵojn! — Feliĉe, de la lastaj du jaroj ni kampuloj jam povas libere uzi niajn membrojn. Se iu hodiaŭ

aŭdacus min insulti plu eĉ per unu vorto, mi lin traktus senindulge!”

“Ha, Oĉjo Feng —” intermetis brigadestro Cao.

“Ĉesu tia artifiko!” Oĉjo Feng tuj interrompis lin. “Denove sendi min al akvomastruma konstruejo je la jarfina tago? Tio jam ne eblas! Tia artifiko ne plu taŭgas! Privatatan entreprenon nun la ŝtato permesas, kaj kion vi povus fari kontraŭ mi?”

“Vi, vi...”

“Kion vi, vi! — ĉu vi ne petis, ke mi atestu? Mi ja ĉeestadis! Ĉu nur la ido de Luo-familio devas esti rigardata kiel homido? Li forprenis perditan objekton de la infano de Ren Laoda kaj kiam la lasta demandis lin pri tio, anstataŭ ĝin redoni, li komencis furioze insulti! Kiu estas lin batinta? La infano de Ren eĉ ne repagis lian insulton, por ne paroli pri la batado! — Ĉu vi bone aŭdis min ĉifoje?!”

Ĉio ĉi tio okazis tiel abrupte, ke ĉiuj stuporis momente kaj poste eksplodis je tondra rido kaj sekve ektumultiĝis la tuta strato. Kaj post la tondro komenciĝis brua babilado kaj diskutado, similaj al torenta pluvo, kaj longe daŭradis. Tio ankaŭ estas komparebla kun la gaja krakado de petardoj en la vilaĝo dum la ludado de drakodanco en la unua monato**!... Oĉjo Feng do faris tian konsideradon dum sia longa kaŭrado, do erare oni lin taksis antaŭe! Tiel estis, kaj devis tiel esti.


Nun li returnis sian kapon kaj diris serioze al la virino de Ren Laoda: “Diru al nia estimata instruisto Ren: Ne batis! — Mi Oĉjo Feng vidis ĉion propraokule! Ni kampuloj ne similas al la testudi-doj***...”




Plej eminentaj sportistoj de Ĉinio

En la dua tagdeko de januaro ĉi-jare, 170,000 personoj per baloto elektis dek sportistojn kiel plej eminentajn por la jaro 1980.

Liang Weifen, 18-jara naĝistino. En internaciaj naĝaj konkursoj ŝi plurfoje gajnis la unuan lokon de 100-metra virina brustonago, kaj oni nomas ŝin "reĝino de brustonago".



Rong Zhihang, 33-jara piedpilkisto. Li ricevis premion de "plej bona ŝotisto" en la prepara konkurso de la kvara grupo de aziaj kaj oceaniaj piedpilkistoj en la Mondpokala Piedpilka Konkurso okazinta en Xianggang (Hongkong) en 1980.



Li Cuiling, 19-jara gimnastino. En la Internaciaj Gimnastikaj Konkursoj okazintaj en Usono kaj Japanio en 1980, ŝi gajnis la unuan lokon de individua ĉiuronda ludo kaj la ĉampionecon de trabado kaj senansa ĉevalado.






Li Yuejiu, 23-jara gimnasto. Li gajnis la ĉampionecon de grundgimnastiko kaj paralelado respektive en la Internaciaj Gimnastikaj Konkursoj en Usono kaj Kanado.




Guo Yuehua, 25-jara tablotenisisto. Li gajnis la subĉampionecon de vira solludo en du internaciaj tablotenisaj konkursoj kaj la ĉampionecon de vira solludo en la Mondpokala Tablotenisaj Konkurso en 1980.



Lang Ping, 20-jara flugpilkistino. Ŝi estis laŭdita de la internaciaj flugpilkistaj rondoj kiel "unu el la tri plej bonaj frapistinoj" en la mondo. En la Bremena Internacia Flugpilka Turniro en FR Germanio ŝi ricevis premion de "plej bona frapistino".






Zou Zhenxian, 25-jara trisaltisto. Li, tenanto de la azia rekordo de trisalto, gajnis orajn medalojn en internaciaj atletikaj konkursoj en 1980.



Han Jian, 25-jara volanisto. Li gajnis la ĉampionecon de solludo en konkurso inter ĉinaj kaj indoneziaj volanistoj.



Chen Xiaoxia, 18-jara plonĝistino. Ŝi gajnis la ĉampionecon de virina turoplonĝo en la Martinia Internacia Plonĝa Konkurso de Londono.



Wu Shude, 22-jara halterlevisto. De 1978 li sesfoje rompis la mondan rekordon de halterlevo kun pezkategorio 52.

Sporta Kunveno de Tibetanoj

Fotoj de YANG CHANGZHONG kaj REN WU



Ĉevalkonkurso



Konkurso de gruntovoj estas originala tradicia sporto de tibetanaĵoj.



* Anna CSUPOR, 35-j. oficistino, dez. kor. el t.m. pri div. temoj. Adr. Alea Hărniceii, Zona Gării, Bl.36, ap. 42, R-4000 SF. GHEORGHE, Rum.

* Edit GECZŐ, 22-j. dez. kor. el t.m. pri literaturo, muziko, turismo. Adr. Str. 1 Mai, n-ro 33, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Judit JAKAB, 27-j. teknikistino pri projektoj, dez. kor. el t.m. pri turismo, literaturo, muziko. Adr. St. 16 Februarie, 3/A, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* László KERÉKES, 26-j. laboristo, dez. kor. el t.m. pri literaturo, popularo, muziko. Adr. Alea Sîrguinței, Bl. 28, ap.37, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Péter KERÉKES, 26-j. inĝeniero pri mekaniko, dez. kor. el t.m. pri: junularaj problemoj, turismo kaj sporto. Adr. Str. Luceafărului, 15, Bl.60, Sc.D, ap.10., R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Borbála-Ágnes LÁSZLÓ, 17-j. mezlerneja lernantino, dez. kor. el t.m. pri: sporto kaj div. temoj. Adr. Alea Muzeului, 3, Bl.1., So. A, ap. 20, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Sándor MAKKAI, 36-j. instruisto, dez. kor. el t.m. pri div. temoj. Adr. Cv. Ciucului, Bl.14, Sc. B. Ap. 11, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Sarolta NAGY, 27-j. oficistino, dez. kor. el t.m. pri: turismo, literaturo, bildkartoj-kolektado. Adr. R 4034 ZĂLAN, jud. Covasna, Rumanio.

* Zoltán PARA, 29-j. sub-inĝeniero, dez. kor. el t.m. pri div. temoj. Adr. R-4014 VALEA CRIȘULUI, 362, Jud. Covasna, Rumanio.

* Irma PETKI, 22-j. instruistino, dez. kor. el t.m. pri literaturo, turismo, sciencaj temoj. Adr. R-4037 MICFALĂU, Str., Scolii, 259. jud. Covasna, Rumanio.

* Kárely PÉTER, seruristo, dez. kor. el t.m. pri div. temoj. Adr. Str. Stadionului, 13, Bl.22, Sc.A, ap.15, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Szende SZÁSZ, 17-j. lernantino mezlerneja, dez. kor. el t.m. pri literaturo. Adr. Str. Dealului 11, Bl.25, Ap.31, et. 4., R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Edit SZÁSZ, 25-j. teknikistino, dez. kor. el t.m. pri literaturo, muziko, turismo. Adr. Alea Luceafărului, 1., Bl.60, Sc.F, Ap. 24, R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Péter SZÉKELY, 27-j. inĝeniero, dez. kor. el t.m. pri: sporto, muziko, turismo. Adr. Alea Luceafărului, 3. Bl.60, Sc.H. ap.29. R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.



SUR NIA LIBROBRETO

LIBROJ NOVE RICEVITAJ

1. **Meze de Eŭropo** skizo pri la historio de Ĉeĥoslovakio, 12.5 × 20.5 cm. 100 p. eld. Panoramo en Prago, prezo: 15 ned. gld. aŭ 20 rpk. plus sendkosto 1 rpk. mendebla ĉe la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, JILSKA 10.110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

2. **Tito**, kolekto de artikoloj pri la forpasinta prezidanto de Jugoslavio, eldonita de la Kroatia Esperanto-Ligo. Formato: 15 × 20 cm. 124 p. Mendebla ĉe la Internacia Kultura Servo (Amruševa 5/1, P. F. 499 - 41000 Zagreb, Jugoslavio).

3. **Mia kredo** (Karl Marks), eld.: Esperanto Editions (74 Saxon Road, Hastings TN35 5HH, Anglio). Formato: 10.5 × 14.5 cm. 16 p. Pogrande prezo: 35 pencoj.



“Bone,” raŭke kriis Dua Onklino Luo, “Oĉjo Feng, memoru, ke...”

Sed ŝia voĉeto ja estis sensignifa en la bruoj kaj ridoj de la amaso; male laŭte aŭdiĝis la muĝo de Oĉjo Feng:

“...Ankaŭ mi Oĉjo Feng estas homo, kion do mi timu?...”

Grandpaŝe li foriris sen returno de la kapo. Rigardante lian larĝan dorson oni ekmemoris, ke vere Oĉjo Feng ŝanĝiĝis de la lasta jaro: li ne

plu drinkis kaj fariĝis pli diligenta. La maljustaj tagoj, simile al fumo, jam komencis malaperi, kaj la vilaĝo ŝanĝiĝas iom post iom kvazaŭ sunbrilo trapenetas la nebulon, kaj la dorso de la senvaloraj kampuloj rektiĝas...

Tiu tre ordinara konflikto tamen ege plezurigis la loĝantojn de Lihuatun. Malgraŭ kriaĉado de Dua Onklino Luo, ĉiuj ridis kontente kaj baldaŭ disiris. Ja en tiu okupopluna printempa periodo estis multaj

farendaj laboroj, kaj ĉiuj viroj kaj virinoj disiris per hastaj paŝoj...

* *Frandajo el glua rizo miksitita kun jujuboj, fazeoloj kaj viando volvita en fragmitaj aŭ bambuaj folioj kaj kuirita en akvo, prenata en Ĉinio kiel festa manĝaĵo okaze de la Kvina Tago de la Kvina Monato, laŭ la luna kalendaro memore al la granda poeto Qu Yuan (Ĉju Juan).*

** *T. e. en la Printempa Festo.*
*** *Testutido signifas por ĉinoj “bastardon”.*





VIRINA KADAVRO ANTAŬ 3,000 JAROJ ELTERIGITA EN XINJIANG

Okcidente de Lopnur-lago en Xinjiang (Hingiang), Ĉinio, malkovriĝis kadavro de knabino antaŭ pli ol 3,000 jaroj. Ĝi estis eltrovita, en 1979, de la Lopnura arkeologia taĉmento sendita de la Arkeologia Instituto sub la Xinjiang-a Sociologia Akademio de

Ĉinio dum ĝia esplorado en la antikva Loulan-reĝlando. La loko estas dezerta antikva tombejo inter dunoj. La ĉerko estas 40 centimetrojn sub la tersurfaco. La kadavro estas volvita de la kapo ĝis la piedoj per kruda lantolo. Malferminte la tolon, oni povas vidi, ke ŝi portas konusan feltan ĉapon sur la kapo kaj ledŝuojn sur la piedoj, kaj ke ŝiaj oraj haroj falas ĝis la ŝultrojn. Ŝi havas belan vizaĝon kun alta nazo, grandaj okuloj, mallarĝaj arkaj brovoj, longaj okulharoj, malgranda buŝo kaj maldikaj lipoj. Ĉe ŝia nuko estas metita saketo lerte plektita el herbo kun grandeco de kalabaso, en kiu estas nutraĵo jam turniĝinta en pulvoron.

NOVAJ PAŜOJ DE ĈINIO POR STUDO PRI SABLOZO

Organizite de la Lanzhou-a Dezerta Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, fakuloj de pli ol dek sciencaj kampoj, inkluzive de dezerta geomorfologio, grundo, hidrologio kaj cibernetiko, faris sciencon esploron pri grunda sablozo en sekaj kaj duonsekaj lokoj de la subregiono Yih Ju de Interna Mongolio, la suda parto de Ningxia (Ninghia) kaj la norda parto de Shaanxi (Senhi), esploris post 3-jara laborado la areon de sablozaj agroj, la historion de sablozo kaj ĝian nunan staton en norda, nordorienta kaj nordokcidenta Ĉinio, prezentis proponojn pri racia utiligo de naturaj

Spritaĵoj:

Kial la ovo estas sala?

ANTAŬ longe, estis homo, kiu emis eksponi sian talenton antaŭ la publiko. Li fanfaronis ne nur antaŭ fremduloj, sed ankaŭ antaŭ siaj parencoj kaj amikoj, kvazaŭ li estus ĉioscia.

Iun tagon, li kun sia edzino vizitis boparencon. La komplezema mastro regalis ilin per abundaj frandaĵoj, inter kiuj troviĝis peklita ovo.

Ĉe la tablo knabo subite demandis la fanfaronemulon: "Onklo, kial la ovo estas sala?"

La fanfaronemulo, ŝajnigante sin sufiĉe inteligenta, respondis: "Ho, la misteron mi malkaŝus al vi. Ĝi estis metita de peklita kokino."

Aŭdinte tion, la knabo demandis kun dubo: "Ĉu vere?"

"Nenio dubinda!" diris la homo.

"Sed la peklita kokino antaŭ longe jam mortis, kial ĝi ankoraŭ povus meti ovojn?"

Apenaŭ finiĝis la vortoj de la infano, eksplodis mokridado tra la tuta ĉambro.

“Vi, Mi, Ŝi”

Estis infano, kiu vizitis lernejon. Je la unua tago, la instruisto lernigis al li tri vortojn: Vi, mi, ŝi. Por komprenigi la sencojn, la instruisto donis ekzemplon: "Vi estas lernanto, mi estas instruisto, kaj ŝi estas la virino apude sidanta."

Reveninte hejmen, la infano ĝoje diris al la paĉjo, ke li lernis la tri

vortojn. La paĉjo demandis: "Kion signifas vi, mi, ŝi?" La infano tuj ripetis la vortojn de la instruisto: "Vi estas lernanto, mi estas instruisto, ŝi estas la virino apude sidanta." La paĉjo kolere diris: "Vi eraris! Vi devas tiel diri: Vi estas mia filo, mi estas via paĉjo kaj la virino apude sidanta estas via panjo."

La infano indigne iris demandi sian instruiston: "Sinjoro instruisto, vi eraris." "Kial?" La instruisto nekomprene demandis. La infano parkere diris la vortojn de sia paĉjo: "Vi, mi, ŝi signifas jene: vi estas mia filo, mi estas via paĉjo, la virino apude sidanta estas via panjo."



riĉfontoj en dezertoj kaj prevento de sablozo kaj elmetis opinion pri forstokulturo kaj herboplantado por forigi sal-alkalizon de la kampoj. Ili ankaŭ prezentis novajn klasifikon kaj konceptojn pri formiĝo de diversaj dezertoj.

METEOLGIA PROGRESO DE ĈINIO

Nun Ĉinio jam havas pli ol 40,000 meteologiajn fakulojn. La Ĉina Akademio de Sciencoj fondis atmosferan instituton en Beijing (Pekino), kaj ankaŭ ĉinaj provincoj kaj urbejoj starigis, laŭ siaj kondiĉoj, scienc-esplorajn organojn de atmosfera fiziko, hidrologia, agrikultura, oceana kaj aviada meteorologioj k. a. Nun Ĉinio jam povas fari avangardajn meteologiajn aparatojn, kiaj radaro por sondi pluvon kaj ricevilo de nubobildo dissendita el satelito, kaj starigis 230 meteologiajn centrajn kaj provincajn organojn, pli ol 100 ŝtatajn sondstaciojn, pli ol 2,000 meteologiajn observejojn de la gubernia nivelo kaj dekmilojn da polkomunumaj meteorologiaj punktoj, kiuj ĝustatempe liveras veterajn informojn por industrio kaj agrikulturo.

La Azia Centro de la Internacia Meteorologia Organizo prenis sian lokon en Beijing. Ĉinaj meteorologoj aktive partoprenis en konferencoj kaj aktivadoj de la Internacia Meteorologia Organizo. Ilia tezo pri la atmosfera cirkulado de la orienta Azio kaj la influo de la vetero de la Tibeta Altebenaĵo al la atmosfera cirkulado de la tuta terglobo estis rigardata de internaciaj meteorologiaj rondoj kiel valora meteorologia scienc-esplora atingo.

SUKCESIS ARTEFARITA TORAKA VERTEBRO

La Beijing-a Ĉin-medicina Instituto sukcese faris torakan vertebron, kio estas tre ĝojiga novaĵo por suferantoj de tumoroj de vertebro.

Zhang Changjiang unuafoje anstataŭigis vertebron de iu malsanulo

per la de li farita vertebro el titano. Dum pli ol ses jaroj la nova vertebro bone funkciis. Lastatempe la operaciito skribis al Zhang, ke la artefarita vertebro resanigis lin. En 1980 li sukcese trapasis ekzamenon por viziti la kemian fakultaton de la Shaanxi-a Normala Universitato. Li ne nur povas bone plenumi lernotaskon, sed ankaŭ povas partopreni en diversaj sportoj.

Komence de februaro de 1975 Zhang amputis la naŭan torakan vertebron kaj parton de la oka kaj deka de la malsanulo kaj enplantis la artefaritan. En la kvina tago post la operacio la gamboj de la malsanulo reakiris senson. Post tri monatoj li povis piediri helpe de lambastonoj kaj, post du kaj duona jaroj, ludi korbopilkon kaj flugpilkon kaj partopreni en sprinto. La longa observado konfirmis, ke tiu artefarita vertebro estas en ĝusta loko kaj bone sidas tie.

ĈINAJ LIBROJ EN LA MONDO

Guoji Shudian de Ĉinio (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) havas konstantajn komercajn rilatojn kun pli ol 800 librovendistoj kaj eldonistoj de pli ol 100 landoj. Ĝi sendigas librojn kaj gazetojn al 300,000 legantoj diverslandaj, distribuas al la mondo 14 specojn de gazetoj en alilandaj lingvoj, pli ol 400 specojn de ĉin-lingvaj ĵurnaloj kaj gazetoj kaj milojn da specoj de libroj en pli ol 30 lingvoj. Krome ĝi ankaŭ vendas diversajn artaĵojn, inkluzive papertanĉaĵojn, diskojn, novjarajn kartojn, kaligrafiajn, reproduktitajn pentraĵojn per lignogravuro kaj originalajn ĉinstilajn pentraĵojn, ole-pentraĵojn kaj ksilografiojn. En la lastaj jaroj ĝi vendas ankaŭ sonbendojn por lerni la ĉinan lingvon kaj mikrolibrojn.

Guoji Shudian fondiĝis en 1949. Dum la pasintaj 31 jaroj ĝi distribuis al diversaj landoj pli ol 460 milionojn da ekzempleroj da ĵurnaloj kaj gazetoj kaj pli ol 170 milionojn da ekzempleroj da libroj

pri Ĉinio kaj pri ĝiaj politiko, ekonomio, historio, geografio, literaturo kaj sciencoj.

YONGHEGONG, LA PLEJ GRANDA LAMAISMA TEMPLO DE BEIJING, MALFERMITA

Ĝi estas fama tra la mondo. Al ĝi pilgrimis budhistaj delegacioj de Japanio, Hindio, Birmo, Tajlando, Nepalo, Srilankao, Kamboĝo kaj Vjetnamio.

La templo situanta en la norda parto de Beijing konstruiĝis en 1694. Origine ĝi estis rezidejo de la imperiestro Yongzheng antaŭ lia surtroniĝo kaj turniĝis en lamaisman templon en 1744.

Ĝi okupas areon de 34,000 kvadrataj metroj inkluzive plankareon de 9,900 kvadrataj metroj. Ĝi konsistas ĉefe el kvin domoj: Tianwanghalo, Yonghegong, Yongyouhalo, Falunhalo kaj Wanfuge. La antaŭlasta estas loko kie lamaoj faras solenajn religiajn ceremoniojn, kaj en la lasta staras granda statuo de la bodisatvo Majtreja skulptita el sola blanksantala trunko, alta je 26 metroj kun 8-metra diametro.

En la templo troviĝas steleokiosko, sonoril-turo, tambur-turo, glazurita pordo, portalo kaj ekranmuro. Tie estas ankaŭ kvar haloj kie lamaoj studas medicinon, budhismon, almanakon kaj sutron.

VERKOJ DE TITO PUBLIKIGITAJ EN ĈINIO

Volumo (1974-1980) de "Elektitaj Verkoj de Josip Broz Tito", la antaŭa prezidanto de la Ligo de Komunistoj kaj la Socialisma Federacia Respubliko de Jugoslavio, estis ĉinigitaj kaj eldonitaj de la Popola Eldonejo de Beijing.

La aliaj tri volumoj estas en preparado. La kvar-voluma verkaro entenas gravajn parolojn, raportojn kaj artikolojn de Tito en 1926-1980.

Laŭ statistiko de ĉina kultura departemento, Ĉinio nun havas pli ol 1,600 bibliotekojn de la gubernia kaj pli altaj niveloj, kun pli ol 180 milionoj da ekzempleroj da libroj.

Post fondiĝo de la nova Ĉinio, la ŝtato starigis du tutlandajn centrajn bibliotekajn komitatojn en Beijing kaj Shanghai, kiuj akcelis la disvolviĝon de la ĉina biblioteka afero.

Hodiaŭ la ŝtato klopodas por rapidigi la paŝojn por restarigi kaj perfektigi la tutlandan bibliotekan laboron. "Kompleta Katalogo de Ĉinaj Klasikaj Verkoj" estas en kompilado, ankaŭ la instruado kaj studo pri biblioteka scienco en disvolviĝo. Nun pli ol dek ĉinaj altlernejoj starigis fakultaton aŭ fakon de biblioteka scienco.

ARTAĴOJ DE LA DINASTIOJ YUAN, MING KAJ QING REEKSPONATAJ

La artaĵoj de la dinastioj Yuan, Ming kaj Qing estis denove ekspoziciataj en la Imperiestra Palaco de Beijing.

Tiuj tri dinastioj troviĝis en la periodo de alta disvolviĝo de la ĉina kulturo kaj arto. Iliaj pentraĵoj, porcelanaĵoj, brodaĵoj, lakaĵoj, skulptaĵoj kaj jadaĵoj, bambuaĵoj, lignaĵoj kaj metalaj metiartaĵoj jam atingis sufiĉe altan nivelon.

"Ekskurso" pentrita de Shang Xi, fama kortega pentristo de Ming-dinastio, priskribas, ke la imperiestro Xuan Zong de Ming-dinastio rajdas al ekskurso kun granda karavano. La personoj en la pentraĵo kun diversaj pozoj estas versimilaj. Ĝi vere estas majstra verko. La florbotelo kun pentritaj bambuoj kaj umefloroj kaj la bovlo kun pentritaj fazanoj kaj peonioj estas maldikaj kvazaŭ ovoŝelo. Ambaŭ kun brilaj koloroj kaj versoj estas tre valoraj kortegaj objektoj.



La ĉina teamo en FR

ANTAŬTAGMEZE de la unua de januaro, 1981, neĝflokoj dense ŝvebis super Ruro-regiono de FR Germanio. Turisma aŭtobuso kun la Ĉina Virina Flugpilka Teamo galopis sur ekspresovojo al la havenurbo Bremen en norda Germanio. Tuj post la Naŭa Schwerte-a Internacia Flugpilka Invita Turniro okazinta en la urbo Hagen, la ĉinaj sportistinoj rapidis al Bremen por partopreni en la Dua Bremena Internacia Flugpilka Invita Turniro.


VARMA BONVENO

En la lastaj jaroj la Ĉina Virina Flugpilka Teamo faris rimarkindan progreson, kaj tio vekis atenton de internaciaj sportaj rondoj. En

la du turniroj la ĉina teamo venkis tiujn de Kubo, Hungario, Brazilo, Belgio kaj FR Germanio. Ĉiun el la ok matĉoj ĝi gajnis per 3:0. Ĉiufoje, kiam ludis la ĉina teamo, la sporthalo estis plena de rigardantoj, el kiuj iuj eĉ staris sur la trairejoj. Ilia brila ludo rikoltis foje-refoje manplaŭdojn kaj huraojn de miloj da spektantoj.

Por kontentigi postulon de la ŝatantoj de flugpilkado, la televida stacio trifoje elsendis konkurson partoprenatan de la ĉina teamo. Foje iu 84-jara germana maljunulino renkontis ĉinajn sportistinojn sur strato de Bremen kaj tuj kaptis la manon de sportistino Lang Ping kaj ĝoje diris kun levita dikfingro, ke ŝi estas ĉina sportistino n-ro 1,

Konkurso inter la ĉina kaj belga teamoj



virina flugpilka Germanio

de HAO KEQIANG

jam konata en la televido, kaj plej bona pilkludistino en la mondo.

Ankaŭ sportaj ĵurnalistoj multe laŭdis la ĉinan teamon. La ĵurnalo "Frankfurter Allgemeine Zeitung" diris, ke la ĉinaj sportistinoj estas "artistinoj el la ridetanta lando"; kaj alia ĵurnalo raportis, ke ili estas disciplinaj, ĝentilaj kaj modestaj.

Post la turniro, en la naŭa de januaro la ĉina teamo estis dividita en du grupojn kaj ludis du setojn en Munster. Ĉe la fino de la lasta seto entuziasmaj spektantoj stariĝis kaj, same kiel al kantistinoj, huradis al ili: "Bis!" "Bis!"

RECIPROKA LERNADO

En pilkludado la eŭropaj kaj la aziaj teamoj havas tute malsamajn stilojn. La ofensivo de la ĉina teamo multe dependas de taktika kunagado, ekz., fulmrapidaj movoj, ŝanĝiĝo de lokoj kaj personoj, krom fortaj prempoj faritaj de la ĉefa

atakanto Lang Ping, 1.84 metrojn alta. Tio multe interesis germanajn spektantojn. Iuj ĵurnaloj priskribis la ludarton aplikitan de la ĉina teamo kiel "kolektivan kunagadon en akrobato" kaj "ravan magion".

En la Schwerte-a turniro la gastigantoj invitis gvidantojn kaj trejnistojn de ĉiuj teamoj al tekunsido. Hungara trejnistino petis ĉinan trejniston rakonti, kiel la ĉina teamo variigas sian taktikon en ofensivo. Ĉina trejnisto Yuan rakontis kaj desegnis tion al ŝi. La hungara koleginino diris ridante, ke ili bezonos du jarojn por posedi tiujn kompleksajn metodojn. Fakte,



La Ĉina Virina Flugpilka Teamo

ankaŭ la eŭropaj teamoj havas siajn bonojn. En la ludo kun la teamo de la Schwerte-a klubo, la ĉinaj sportistinoj trovis, ke la gastigantaj teamoj havas bonan korpokvaliton, fortan individuan atakan kapablon kaj pezan frapon. Ĉio ĉi estas lerninda por la ĉinaj sportistinoj.

AMIKECO

Kvankam la ĉinaj sportistinoj restadis en FR Germanio nur dekkelk tagojn, tamen ili havis amikan kontaktigon kun la germana popolo kaj diverslandaj sportistoj. En la urboj Kamen, Hagen, Bremen kaj Munster la ĉinaj sportistinoj estis varme akceptataj de urbestroj, sportaj kolegoj de kluboj de flugpilkaĵasocioj.

Flugpilkistinoj de Ĉinio kaj FR Germanio en aŭtobuso post konkurso



En la sekvanta vespero post la atingo de la ĉina teamo al tiu lando, parlamentano de Kamen Werner Heitch kaj lia edzino veturigis per sia aŭtomobilo kelkajn ĉinajn sportistinojn al sia hejmo. La mastro propramane rebruligis kandelojn sur la Kristarbo, kaj la mastrino regaligis la ĉinajn knabinojn per memfaritaj kukajoj. Ankaŭ la bopatrino kaj aliaj parencoj de la sinjoro, kiuj venis de malproksime ĉi tien por pasigi la Kristnaskon, invitate sidis kune kun ili ĉirkaŭ tablo. Krome, s-ro Heitch elprenis la de li longe konservitajn manĝbastonetojn kaj



Ce marbordo de Brazilo



Brazilio— la ĉefurbo de Brazilo

de Zhou Li

En julio de 1981, la 66-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Brazilio. Por tio ni publikigas jenan artikolon kaj grupon da fotoj por prezenti al niaj legantoj la landon kaj urbon de la kongreso.

— La Red.

Esperantistoj el diversaj landoj kolektiĝos en Brazilio, la nova ĉefurbo de Brazilo, por ĉeesti la 66-an Universalan Kongreson de Esperanto.

Brazilio situas en Goias, la altebenaĵo de meza Brazilo. Se vi flugas de Rio-de-janeiro, la plej granda urbo de la lando, post tri horoj vi atingas Brazilion. Mal-

supren rigardante el la aviadilo, vi trovas ke la konturo de la urbo similas al aviadilhulo. Kun la malsupreniĝo vi povas vidi klare loĝkvartalojn el vicoj da domoj kun

petis lernigi ilin uzi la bastonetojn. Ili senĝene babiladis pri popolaj festotagoj, moroj kaj anekdotoj de la du landoj, tiel ke la ĉinaj gastoj sentis sin kiel hejme.

En la lasta posttagmezo de 1980, ekonomia profesoro Heinrich Meye, kiu iam vizitis Ĉinion kun sia edzino, per taksia aŭtobuso veturigis la ĉinajn teamanojn al sia hejmo en alia loko. Li kaj lia edzino rakontis al ili, kiel ili pasigis plej agrablajn tagojn en Ĉinio kaj por ili estas ne forgesbla la amikeco de la ĉina popolo. Li montris al la ĉinaj amikoj memoraĵojn de Ĉinio, inter kiuj troviĝas ruĝa rubando kun ĉinaj ideografiaĵoj "Bonvenon al la

delegacio estrata de profesoro Heinrich Meye al Ĉinio". Ĝi estis uzita de ĉinaj amikoj por bonvenigi lin en la Beijing-a Aerodromo kaj poste portita de li al Germanio.

BALDAŬA REVIDO EN BEIJING

S-ro Thiemann Gerd, inĝeniero de ŝtala fabriko, ne estas membro de la flugpilka klubo de Schwerte, sed li volonte akompanis la ĉinan teamon dum la Schwerte-a turniro, ĉar li ŝatas la Ĉinan Virinan Flugpilkan Teamon. En 1979, kiam la Virina Flugpilka Teamo de Jiangsuprovinco de Ĉinio vizitis FR Ger-

manion, ankaŭ li akompanis ĝin kaj ĝis nun ankoraŭ memoras la nomojn de pluraj sportistinoj.

S-ro Thiemann Gerd estas humora kaj ŝercema, sed li plenumis laboron serioze. Li kaj ĉinaj sportistinoj kunlaboris en harmonio. Li ĉiam venis kun sia plej juna filino, kiu lernas gimnastikon, por ke ŝi rigardu trejnadon de la ĉina teamo. Li diris: "Ĉinaj sportistinoj ĉiam sin trejnadas penege, tamen ili havas ridetan mienon, ili estas plej bonaj knabinoj."

La lasta tagordo aranĝita de la Flugpilka Asocio de FR Germanio por la ĉinaj gastoj estis vizito al


blankaj muroj kaj ruĝaj tegoloj unuflanke kaj altajn etaĝdomojn aliflanke.

Nun Brazilio havas 1,000,000 loĝantojn kaj estas moderna urbo kun racia dispozicio de la konstruajaro, bonaj ekipaĵoj kaj modernaj ŝoseoj. La konstruado de la urbo estis komencita en 1956 kaj daŭris nur tri jarojn kaj du monatojn.

En 1956, la registaro de Brazilio faris decidon konstrui novan ĉefurbon kaj fondis konstruan kampanion por nova ĉefurbo. La prijuĝa komitato de la lando elektis el 26 projektoj la plej bonan. Post tio, la brazila registaro varbis pli ol 50,000 ekspertajn konstruistojn. Dank' al ilia penlaborado, nur en dek diurnoj ili finkonstruis provizoran prezidantejon. Oni nomas tian rapidecon la rapideco de Brazilio. La diversaj konstruaĵoj estis plenumitaj laŭ la difinita plano.


La konstruado de Brazilio iris tiel rapide, pro tio ke la grandioza konstruado spegulis la deziron de la popolo kaj multe instigis ilian laboran entuziasmon. Konstruantoj, portante kun si simplan litajon, el diversaj lokoj venis al la sovaĝa interna loko. Antaŭ la konstruado,

Munkeno. Tie ili rigardis la stacion de Olimpikoj okazintaj en 1972 kaj faris flugpilkan ludon en la Flugpilka Klubo de Munkeno. Je la deka de januaro, kiam la ĉina teamo estis baldaŭ forlasonta la landon, germanaj amikoj invitis la sportistinojn al tagmanĝo en la restoracio en la supro de televida turo alte staranta apud la vilaĝo de Olimpikoj. Rigardate de sur la turo prezentigis antaŭ iliaj okuloj aroj kaj aroj da neĝkovritaj diversformaj konstruaĵoj kaj la arĝente vestitaj Alpoj en malproksimo. La mastroj kaj gastoj tostis foje-refoje por amikeco kaj esperis, ke ili baldaŭ revidos en Ĉinio unu alian.





Parlamentna Domo sur la placo Suvereneco

Jura Palaco — la plej alta juĝejo de Brazilo



Domo por Prezidanto





Popolaj metiarta-
joj de Brazilo



TRA LA MONDO

La roza

arkitektoj kaj koncernaj teknikistoj faris detalan esploron al tiu loko kaj studis ĝiajn vegetalojn, meteorologion kaj temperaturon. Poste, ili fosis sur la ebenigita grundo kanaleton por instali subterajn tubojn kaj elektran fadenon. Por irigi glate la ĉefan konstruadon kaj ŝpari homforton kaj tempon, ili zorge faris aranĝon al konstruado de ŝoseoj, aerodromo, elektrejo, loĝdomoj kaj oficejoj. Samtempe kun tio, jam dekomence ili donis sufiĉan atenton al diversaj bonstataj instalaĵoj kiel hospitaloj, infanĝardenoj, lernejoj k.a. Krome, dum la konstruado ili konsideris ankaŭ la problemon de provizado de manĝaĵoj kaj asignis terenon por disvolvi legom-kulturadon, kortobirdojn kaj brutobredadon. Por kontentigi la ĉiutagan bezonon de la urbanoj, ili asignis terenon por starigi malgrandajn fabrikojn, malpezan industrion, elektrejon kaj aŭtoriparejojn k.a.

La nova ĉefurbo situas en la ruĝgrunda zono de la altebenajo, tial la ruĝa polvo estis ŝvebanta en aero kaj falinta ĉien, kaj serioze malutilas al la sano de la urbanoj. Jam en la komenco oni atentis pri purigo de aero, protektado de vegetaloj, plantado de arboj, floroj kaj herboj por krei bonajn kondiĉojn de loĝado favorajn al la popolo. Nun Brazilio fariĝis verda urbo kun multaj arboj kaj gazonoj kaj klaraj lagoj. Tio montris ke la natura medio estas plene protektata.

En Brazilio la aŭtovojoj estas

apartigataj de trotuaroj kaj havas trefkruciĝojn. La aŭtoj cirkulas rapide, sed ne videblas ruĝa kaj verda signaloj ĉe la vojkruciĝejoj. En tiu urbo estas multaj kluboj. Dekoj da grandaj kluboj troviĝas ĉe belaj pitoreskejoj. Laŭ urba projekto ĉiu kvaropo de kvadrataj kvartaloj (ĉ. 12,000 loĝantoj) havas unu klubon por kontentigi la bezonon de la loĝantoj en kultura kaj sporta aktivado.

Ĉirkaŭ la placo Suvereneco en la centro de Brazilio staras elegantaj modernaj konstruaĵoj. Tie staras grandioza Domo por Prezidanto, (Palaco de Alvorada), la Ministrejo de Fremdlandaj Aferoj (Palaco Itamarati), Senato kaj Ĉambro de Deputitoj kies tegmentoj similas al du bovloj unu staranta kaj alia inverse kovranta kaj post ili du ĉielskrapantoj de la parlamentanoj, kaj kelkaj etaĝdomoj de ŝtalaj kaj vitraj strukturoj por aliaj ministrejoj. La konstruitaj sur la sovaĝejo altaj etaĝdomaroj supermodernaj enkorpigis la iniciativan spiriton de la brazilia popolo.

Brazilio estas ne nur politika centro de Brazilo, sed ankaŭ loko dezirata de turistoj. Ĝiaj originalaj konstruaĵoj, klaraj lagoj kaj ĉarmaj pejzaĝoj altiras al si multajn turistojn. Tiu moderna urbo vivoplena kaj prospera staras ĉe la altebenajo de Brazilo kiel monumento kaj donas al la popolo esperon pri la estonteco.

BULGARIO famiĝis tra la mondo kiel roza lando, ĝia popolo rigardas la rozon kiel reĝon de la floroj kaj prenas ĝin kiel sian nacian floron. En la unua dimanĉo de junio la rozokulturistoj okazigas grandan aktivadon kun nacia koloro por festi riĉan rikolton de rozoj. Tia aktivado en Bulgario estis difinita kiel Roza Festo.

Frua somero venas al Bulgario en la unuaj tagoj de junio. Tiam la valoj ĉe la suda piedo de Balkanoj prezentas maron de floroj — disfloras kaj kokete dancas en zefiro ĉarmaj kaj aromaj rozoj ruĝaj, flavaj kaj blankaj. Laŭ sia nacia tradicio la rozokulturistoj grandioze festas riĉan rikolton de rozoj en tiel bela tempo, ĉe la 100-kilometroj-longa suda piedo de la majestaj Balkanoj, ĉefe en la valoj taŭgaj por kulturaj rozojn. En tiu tago la bulgarioj en festaj kostumoj venas de diversaj lokoj al la valoj de rozoj. Laŭ kutimo la festan ceremonion ĉeestas ankaŭ ŝtataj gvidantoj. Tuj kiam ili suriras la podion, grupo kaj grupo da belaj knabinoj ornamitaj per rozoj prezentas girlandojn al la gastoj venintaj demalproksime kaj disjetas rozajn petalojn al homamasoj en la ĉirkaŭaĵo. Unu helikoptero ŝvebas super la homplena placo kaj disŝprucigas parfumon kaj disŝutas rozajn petalojn super la festantoj.

Festo de Bulgario

En ilia ĝojo la helikoptero surteriĝas lante kaj elkajutiĝas homo en vestoj de rozo-komercisto. Kun tola dusako sur ŝultro li senĉese mansvingadas al la publiko por esprimi al ĝi bondezirojn, sugestante, ke li transportos al diversaj lokoj de la mondo la rozan oleon, specialan produktajn de Bulgario, kaj servos kiel sendito de la bulgara popolo por diskonigi ties diligentecon kaj honoron. Sekve, "maljunuloj" vestitaj per groteskaj vestoj kun masko sur la kapo kaj multaj kupraj tintiloj ĉe la talio iras en la kunvenojn en du vicoj, akompanate de



Knabinoj ornamitaj per rozo


la roze ornamitaj knabinoj, kaj ekdancas ĝoje. En dancado la tintiloj estigas belajn sonojn. La romantikaj dancmovoj montras deziron de la rozokulturistoj forpeli malbonojn kaj preĝi al la dio por riĉa rikolto de rozoj.

Post la masko-dancado oni prezentis naciajn kantojn kaj dancojn. Grupo da knabinoj en naciaj kostumoj kaj kun korboj plenaj de rozaj petaloj gaje venis al la placo. Ili

kantadas kaj dancadas por esprimi la ĝojon de la rozokulturistoj pri riĉa rikolto. Post tio la gastamaj rozokulturistoj invitis en muziko la gastojn danci kune kun ili. Fine ili veturigas en gaja muziko brile vestitajn knabinojn per ĉevalĉaroj al ĝardenoj por pluki rozojn. Tio markas la finon de la festado.

Oni diras, ke tia aktivado okazas laŭvice en ĉiuj vilaĝoj en la valoj de rozoj kaj daŭras ĉ. unu semajnon.

Celebrado de riĉa rikolto de rozoj



La tago de geamantoj en Italio

La nomita tago estas tre riĉa je romantikismo. Je la 14-a de ĉiu februaro ĝi kun parfumo de rozoj venas inter la geamantojn.

Ĝi nomiĝas ankaŭ Tago de Elekto de Amo aŭ Tago de Geknaboj, sed ĝia vera nomo estas Tago de Valenteno. Origine oni festis tiun tagon memore al kristano Valenteno. Eble iuj pensas, ke Valenteno certe estis amomaniulo. Se ne, kial oni nomas tiun tagon per lia nomo? Fakte, Valenteno estis nur viktimo pro sia religio. Li rifuzis konvertiĝi al la Roma Eklezio, suferis persekutadon pro tio kaj estis ekzekutita. En malliberejo li ricevis prizorgon de la humana filino de provoso. Je la 14-a de februaro de la jaro 270 p. K., Valenteno estis mortigita pro sia religio. Antaŭ sia morto li skribis al ŝi sinceran leteron kun sia nomo ĉe la fino: "Via Valenteno". Poste la kristanoj difinis tiun tagon kiel tagon de Sankta Valenteno. Estas alia onidiro, ke oni festas la Tagon de Geamantoj por memorigi pri Juno, ĉar la romanoj prenas ŝin patrono de geedziĝa feliĉo. Tiu tago havas historion de pli ol 1,000 jaroj. Kutime la italaj junaj geamantaj paroj frekventas la tombon de Valenteno.

Tiu tradicia tago estas tre interesa. En Mezepoko geamantoj jam en tiu tago reciprokis donacojn. Tiam ĉiu viro en amo donacis en tiu tago al sia amatino unu delikatan objekton kiel ateston de sia amo. Ofte en profunda nokto li senbrue metis ĝin en la leterkeston ekster ŝia domo. Kaj li ankaŭ aldonis al ĝi slipon kun bondeziroj por esprimi sian amon.

Estas interese, ke ofte iuj maljunaj geedzaj paroj imitis la gejunu-

lojn. En tiu tago ili kaŝe enŝovis slipon kun amoplenaj versoj en poŝon aŭ teknon de sia edzo aŭ edzino. La malgranda slipo nature rememorigis al ili la dolĉan pasintajn.

La akvoverŝa festo de Birmo

La Akvoverŝa Festo estas tradicia festo de la birmanoj. Ĝi okazas en la dua tagdeko de aprilo. En tiu tempo la klimato de Birmo estas plej seka kaj varma en la jaro. La festo daŭras 3-4 tagojn.

Laŭ moro de tiu lando ĉiuj viroj kaj virinoj ĉu junaj aŭ maljunaj povas verŝi akvon unu sur alian en la festo por forlavi la malnovon kaj bonvenigi la novon. La riĉuloj tremas branĉeton de sizigo (*Syzygium lineatum*) en pura akvo en arĝenta kuvo kun rozaj petaloj kaj milde aspergas la akvogutojn sur aliajn homojn. La ordinaraj festantoj ŝatas verŝi plensitelon aŭ plenvazon da akvo kaj eĉ ŝprucigi per akvotubo. Knaboj uzas akvopafilon por ataki plenkreskulojn kaj la lastaj ilin ne riproĉas. Ju pli multan akvon oni ricevas, des pli grandan ĝojon oni sentas, ĉar akvo simbolas feliĉon.

En tiu festo ĉu la urbanoj ĉu la vilaĝanoj ĉiuj portas belajn vestojn kaj agrable sin distras per akvo. Sur la stratoj staras ornamitaj budoj kaj oni prezentas belajn kantojn kaj dancojn sur senkovraj scenejoj. La gejunuloj konkure sidigas sin en la ornamitaj veturiloj en formo de pavo, cigno aŭ palaco. Ili kantadas kaj dancadas kaj prezentas humurajn recitativojn por ridigi la publikon. Ĉe grandaj vojkruciĝoj estas stacio por akvoverŝado. Dekoj da bele vestitaj knabinoj starantaj ĉe vojrandoj kun akvotuboj en la manoj ŝprucigas akvon al preterpasantoj. Junuloj veturigas senkovrilan aŭton

plensarĝitan per akvo kaj ĝin verŝas malsupren al la knabinoj. Tamen la antaŭaj ne povas rivali kun la lastaj pro manko de sufiĉa akvo. Arĝentaj akvokolonoj torentas el la tuboj kiel falakvoj kaj per ili la knabinoj malebligas al la junuloj levi sian kapon. Nur kiam petolaj junuloj ekuzas glacian akvon, la knabinoj rapide disiĝas surprizite. Kaj la junuloj ne kuraĝas daŭre ludi. Antaŭ ol la knabinoj faras kontraŭatakon, ili jam en rida insulto returnas la aŭton por forkuri. Tio estas komedia sceno en la Akvoverŝa Festo.

Troviĝas diversaj legendoj pri la Akvoverŝa Festo de Birmo. Unu el ili rakontas, ke iujare birma reĝo vidis en sia palaco feon descendanta al la homa mondo. La reĝo ekĝoĝiĝis kaj ordonis miksi aromajn kun pura akvo kaj aspergi la akvon sur ĉiujn civilajn kaj militajn oficistojn por forigi la malnovajn kaj malpuraĵojn kaj bonvenigi la novon kaj feliĉon.

La taj-oj en la provinco Yunnan (Junnan) de Ĉinio kaj la ŝjan-oj en la nordorienta parto de Birmo originas el la sama nacieco, tial ankaŭ ili pasigas tiun tradician feston



* F-ino Ana Maria Ranero, Calle Duques de Najera, 20,8°, A. Logroño, Hispanio, kun esp-istoj aŭ ne, ĉefe en Grekio, Skandinavio, Islando, Finnlando, Irlando, en Esp., hispana, angla aŭ franca lingvoj, pri arkeologio, arto, literaturo, historio. Ankaŭ interŝ. bk. Ŝi treege ŝatas ĉion grekan kaj vikingan.

* Zoltán VASS, 21-j. laboristo, dez. kor. el. t.m. pri literaturo, poezio. Adr. Str. Primăverii, 25. R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Judit TÓKÉS, 22-j. oficistino, dez. kor. el. t.m. pri div. temoj. Adr. Str. Dumitru Petrescu, 19, Bl.5, Sc.C, ap. 7, R-4000 SF. GHEORGHE, Rum.

Fatalo de sovaĝaj animaloj de la mondo



Grandaj pandoj

LA sovaĝaj animaloj havas valorojn ne nur aprecan sed ankaŭ ekonomian kaj sciencan. Estas pli grave, ke ili estas nemankigeblaj en tenado de la natura ekologia ekvilibro. Tial protektado de sovaĝaj animaloj estas nerifuzebla devo de la homaro.

Sed nun nemalmultaj sovaĝaj animaloj en diversaj landoj alfrontas pereon.

La korno sur la supra parto de la muzelo de afrika rinocero pezas je 2 kilogramoj kaj estas valora drogo. Ankaŭ ĝiaj ostoj kaj feloj povas esti vendataj je alta prezo. En la Mezoriento unu rinocera korno kostas 4,500 usonajn dolarojn, kaj unu kilogramo da rinocera osto kostas 250-750 usonajn dolarojn. Por akiri profitegon la ŝtelaj ĉasistoj de Kenjo kaj aliaj lokoj senbride

ĉasas tiujn animalojn. Laŭ statistiko, la ĉiujara eksporta kvanto de la rinoceraj kornoj de la orienta Afriko en 5 jaroj de 1972-1976, atingis ĉ. 4,000 kilogramojn, kies 95% venis el Kenjo. Nun, la rinoceroj de la orienta Afriko jam malpliĝis je 90%. Se tio daŭros kiel antaŭe, la bestoj tute pereos en la venontaj tri jaroj.

Ankaŭ la ĥelonio estas profitodona. Ĝia viando estas fama bongusta manĝaĵo kaj ĝia ŝelo — bona krudmaterialo por fari kombilojn kaj ornamaĵojn. Pro tio, en la tempo, kiam ili rampis sur la marbordon por demeti ovojn, miloj kaj dekmiloj da ĥelonioj estis mortigitaj. Nun, la nombro de ĥelonioj en la mondo evidente reduktiĝas.

La krustoj de krokodiloj kaj manisoj (*Manis pentadactyla*)

estas tre bonaj krudmaterialoj por mansaketoj kaj povas esti vendataj je alta prezo. En Taiwan-provinco de nia lando peco da manisa krusto kostas 51-77 usonajn dolarojn. Tial, krokodiloj kaj manisoj estis amase mortigitaj. Nun, tiuj du specoj de animaloj jam alfrontas pereon. La turistoj en Afriko ne plu bezonas sin gardi de atako de krokodiloj en riveroj.

Ornitorinkoj (*Ornithorhynchus*) estas unika speco de mamuloj, kiuj per ovoj generas siajn idojn. En la komenco de la kuranta jarcento ili ankoraŭ grandnombre vivis en la bordaj kavoj de la riveroj kaj la insulo Tasmanio de la suda Aŭstralio, tamen nun ili jam restas malmulte.


La nombro de la 5 plej raraj specoj de bestoj en la mondo

draste malgrandiĝas: restas nur 50 javaj rinoceroj de Indonezio, malpli ol 100 ruĝaj lupoj de Usono, ĉ. 150 arabaj longkornaj antilopoj, ĉ. 1,000 ĉinaj pandoj kaj 700-1000 havajaj foko.

Antaŭ 50 jaroj troviĝis 100,000 tigroj en la mondo, kiuj vivis en Hindio, Irano, Ĉinio, Sovetunio, sudorienta Azio kaj la orienta parto de Turkio, sed nun restas nur malpli ol 5,000 tigroj.

Preskaŭ pereis la ĉinaj raraj animaloj antilopoj kun elstara muzelo, foli-simioj kun blanka gluteo kaj sovaĝaj ĉevaloj, kaj rapide malmultiĝas la sovaĝaj kameloj.

Kompreneble, ne nur la supre diritaj animaloj alfrontas pereon. Laŭ statistiko, de la komenco de la 20-a jarcento ĝis nun 110 specioj kaj subspecioj de animaloj kaj 139 specioj de birdoj tute pereis en la mondo, el ili triono malaperis en la lastaj 50 jaroj, triono en la 19-a jarcento kaj alia triono antaŭ la 19-a jarcento. Laŭ takso de la Internacia Ligo de Protektado de la Naturo kaj Naturaj Rezervoj, ĉiujare pereas meznombre unu




Blanka rinocero

specio aŭ unu subspecio de animaloj, kaj ĉ. 1,000 specioj de birdoj kaj mamuloj troviĝas en perea danĝero. Usona specialisto pri sovaĝaj animaloj Norman Myerl asertis, ke nun en tropikaj arbaroj ĉiutage eble pereas almenaŭ unu specio de animaloj, kaj en la venontaj kelkaj jaroj eble ĉiuhore pereos unu specio de animaloj. Laŭ kalkulo de Tomas Luvejy, biologo de la Fonduso de la Sovaĝaj Animaloj de la Mondo, ĝis la 2000-a jaro la animaloj sur la ter globo


malpliigos almenaŭ je sesono, t.e. ĉ. 500,000 specioj.


La pereon de sovaĝaj animaloj kaŭzas ne nur la natura evoluo, sed ankaŭ la homoj, kaj la lasta kaŭzo estas ĉefa. Laŭ statistiko, 24% de la birdoj kaj 25% de la mamuloj pereis de la natura evoluo. El tio oni povas vidi, ke la tri kvaronoj de la malaperintaj birdoj pereis de senĉesa arbarohakado, senĉesa stepo-ekspluatado, de polucio de akvo, aero, herbo kaj arboj kaj de senbrida mortigo.

Dromiceo (Dromiceus) de Aŭstralio



Blanka simio de Taiwan





EL ĈINA MODERNA HISTORIO


Evento de la 18-a de Septembro 1931

kaj Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo

de LIU SHUFA

Skiza mapo pri la Nordoriento de Ĉinio, okupita de Japanio
post la Evento de la 18-a de Septembro 1931

- | | |
|----------------|---------------------|
| 1 Heilongjiang | 6 Shenyang |
| 2 Jilin | 7 Shanhaiguan |
| 3 Liaoning | 8 Beiping (Beijing) |
| 4 Rehe | 9 Nanjing |
| 5 Chahar | 10 Shanghai |




Post la fondiĝo de la Nanjing (Nankin)-a registaro en 1927, la novaj militaristoj de Kuomintango, same kiel la malnovaj, sin apogis sur imperiistoj kaj prenis feŭdajn fortojn kiel sian tradician bazon. Ili uzurpis ne nur la politikan potencon de la tuta lando, sed ankaŭ la ekonomian aorton, kaj iom post iom fariĝis feŭda kompradora burkrate burĝaro, kruela subpremanta kaj ekspluatanta la ĉinan popolon, buĉanta kaj persekutanta komunistojn kaj revoluciulojn.

Fronte al la blanka teroro, la ĉinaj komunistoj montris revolucionan heroecon. Ili iris de urboj al la kamparo kaj tie starigis revolucionajn armitajn fortojn kaj bazlokojn. En 1930, la nombro de Ruĝaj Armeanoj jam atingis 60,000 kaj revolucionaj bazlokoj etendiĝis al la provincoj Jiangxi, Fujian, Anhui, Hunan, Shaanxi kaj Gansu kaj Hainan-insulo de Guangdong-provinco.

La rapida disvolviĝo de la Ruĝa Armeo teruris la Nanjing-an registaron. De 1930 ĝis 1933 Jiang Jieshi (Ĉiang Kajsek) faris kvarfojn "ĉirkaŭekstermojn" al la revolucionaj bazlokoj, kiuj finiĝis per fiasko.

En 1929 eksplodis ekonomia krizo en kapitalismaj landoj. La krizo atakis preskaŭ ĉiujn produktajn fakojn de la koncernataj landoj, kaj la krucigantaj industria kaj agrikultura krizoj dronigis la kapitalisman

Mapo pri la Longa Marŝo de la Ĉina Laborista — Kamparana Ruĝa Armeo



- 1 Ruijin
- 2 Jingtangshan
- 3 Zunyi
- 4 Guiyang
- 5 Kunming
- 6 Ludingqiao
- 7 Yan-an
- 8 Nanchang
- 9 Huanghe (Flava Rivero)
- 10 Changjiang (Jangzi-rivero)

- Sidejo de la Centralo de la revolucia reĝimo
- Linio de la Longa Marŝo
- Gravaj lokoj
- Blokadoj de la malamiko

mondon en grandan haoson. Por sin liberigi de la ekonomia krizo imperiistoj intensigis sian rabadon al koloniaj kaj duonkoloniaj landoj. Ĉinio estis unu el iliaj ĉefaj rabataj landoj.

De 1928 ĝis 1931, diversaj imperiismaj landoj multe dumpingis siajn komercaĵojn en Ĉinio. Antaŭ 1928, la ĉiujara malfavora saldo de Ĉinio estis malpli ol 300 milionoj da juanoj, sed en 1931 ĝi abrupte plimultiĝis al 816 milionoj da juanoj. Por vendi siajn superflujajn produktaĵojn imperiismaj landoj ankaŭ pruntedonis al Ĉinio monon. Antaŭ tio la nacia industrio de Ĉinio perdis sian merkaton. Krome pro dumpingo de eksterlandaj agrikulturaj produktaĵoj en Ĉinio bankrotis ankaŭ la ĉina agrikulturo.

LA EVENTO DE LA 18-A DE SEPTEMBRO 1931 KAJ LA "POLITIKO DE NEREZISTO" DE LA NANJING-A REGISTRARO

La japanaj imperiistoj delonge intencis agresi Ĉinion. En 1927 Tanaka Giyichi, ministro de eksteraj aferoj de Japanio, diris en sia memorando al la mikado: "Por

okupi Ĉinion, oni nepre devas unue konkeri ĝian Nordorienton kaj Mongolion; por regi la mondon, oni nepre devas unue konkeri Ĉinion." Tio estis la agada programo de la japanaj imperiistoj. Utiligante la ŝancon ke la okcidentaj kapitalismaj landoj suferis de senprecedenca ekonomia krizo, kaj al Usono kaj Britio mankis tempo por konkuri kun ĝi pri konkero de Ĉinio kaj ke la Nanjing-a registaro plentforte faris enlandan militon kontraŭ la Komunista Partio subtenate de usonaj kaj britaj imperiistoj, la japanaj imperiistoj decidis unue fabriki pretekston en la Nordoriento de Ĉinio por aneksi ĝin.

Je la 18-a de septembro 1931, pretekstante la perdiĝon de japana oficiro Nakamura, la japanaj imperiistoj komencis ataki Shenyang, gravan urbon de la Nordoriento de Ĉinio. Jiang Jieshi prenis politikon de nerezisto kaj sekrete ordonis la nordorientan armeon de Zhang Xueliang retiriĝi al sudo de Shanhaiguan-pasejo.

Pro tio la japanaj agresantoj facile okupis la tri provincojn de la Nordoriento de Ĉinio en tri monatoj. De tiam la Nordoriento kun

30 milionoj da samlandanoj kaj areo de pli ol miliono da kvadrataj kilometroj fariĝis kolonio de la japana imperiismo en 14 jaroj.

La grandskala agreso de la japanaj imperiistoj kaj la politiko de nerezisto fare de Jiang Jieshi vekis indignon de la tutlanda popolo. En la kriza momento de la ĉina nacio la Komunista Partio de Ĉinio reprezentanta justan postulon de la tutlanda popolo deklaris sin kontraŭ la agreso de la japanaj imperiistoj kaj malkaŝis la krimon de la politiko de nerezisto de la Nanjing-a registaro de Kuomintang. Ĝi alvokis laboristojn, studentojn kaj loĝantojn de diversaj grandaj urboj de la tuta lando fari strikon, manifestacion kaj peti la Nanjing-an registaron de Kuomintang oponi kontraŭ la japana agreso. Sub ĝia gvido la ĉina popolo levis altan tajdon de la kontraŭ-japana nacistava movado.

Samtempe kun tio, la ĉina nacia burĝaro montris ĉiam pli grandan malkontenton pri la naciperfido, diktaturo kaj enlanda milita politiko de Jiang Jieshi, kaj postulis ke Kuomintang ŝanĝu sian politikon, ĉesigu la enlandan militon kaj res-

tarigu la diplomatian rilaton inter Ĉinio kaj Sovetunio por unuanime rezisti kontraŭ la japana agreso.

Krome, politika skismo okazis en Kuomintango kaj ĝia armeo, multaj patriotaj oficiroj kaj soldatoj malobservis la politikon de Jiang Jieshi pri batalo kontraŭ la kompartio kaj enlanda milito kaj rezistis kontraŭ la japana agreso kune kun la Ruĝa Armeo.

AVIDECO DE LA JAPANAJ IMPERIISTOJ

La politiko de nerezisto de la Kuomintanga registaro kreskigis la agresan ambicion de la japana imperiismo. Tuj okupinte la Nordorienton, la japanaj imperiistoj komencis ataki Shanghai en la 28-a de januaro 1932 por devigi la Nanjiangan registaron de Kuomintango agnoski ĝian okupadon de la Nordoriento. Influite de la kontraŭjapana movado de la tutlanda popolo, la 19-a Kuomintanga armeo garnizonanta en Shanghai malobservis la ordonon de Jiang Jieshi pri nerezisto kaj memvole leviĝis al batalo. Subtenate de la popolamasoj, la ĉina trupo sinsekve repuŝis atakojn de la japanaj agresantoj. Pro tio komandantoj de la japana armeo estis eksigitaj. En la batalo ĉirkaŭ 10,000 el la 100,000 japanaj agresantoj estis en unu monato ekstermitaj de la ĉina trupo nombranta nur 40,000 personojn. Tio pezege batis la japanajn imperiistojn kaj firmigis la decidon de la ĉina popolo kontraŭ Japanio. Malgraŭ tio la Nanjing-a registaro de Kuomintango ankoraŭ obstine praktikis kompromisan politikon kaj subskribis la Interkonsenton de Songhu kun la japanaj imperiistoj. La interkonsento difinis ke la japa-

na armeo povas garnizoni en Shanghai, sed la ĉina armeo ne povas starigi garnizonejon ĉe la antaŭurbo de Shanghai, kaj malpermesitaj estas kontraŭjapanaj aktivadoj.

Post unu jaro, la japanaj imperiistoj direktis sian atakon de la Nordoriento al Interna Mongolio, Rehe (Ĵeĥe), Chahar (Ĉahar) kaj norda Ĉinio. Fronte al la grandskala agrosado de Japanio Jiang daŭrigis sian "politikon de nerezisto", forlasis diversajn pasejojn de la Granda Muro, la nordajn partojn de la norda Ĉinio kaj Chahar. La Nanjing-a registaro ankoraŭfoje subskribis humiligan interkonsenton de Tanggu kun Japanio, per kiu ĝi agnoskis la leĝecon de Japanio en okupado de la tri provincoj de la Nordoriento, Rehe kaj donis vastan teritorion de orienta Hebei-provinco al Japanio. Pro tio la pordo de norda Ĉinio estis larĝe malfermita.

LA KVINA "ĈIRKAŬEKSTERMO" FARE DE JIANG JIESHI KAJ LA LONGA MARŜO DE LA RUĜA ARMEO

Subskribinte la humiligan Interkonsenton de Songhu, la Nanjing-a registaro rifuzis la postulon de la tutlanda popolo pri ĉesigo de la enlanda milito kaj unuanima rezisto kontraŭ la japanaj agresantoj, daŭre praktikis sian politikon de enlanda milito kontraŭ la kompartio kaj streĉis "ĉirkaŭekstermon" al la revolucia bazloko. En oktobro 1933, Jiang Jieshi koncentris milionon da armeanoj kaj komencis la batalo la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio praktikis eraran militan linion de pura defendo kaj faris multajn erarojn en la komandado, pro tio la Ruĝa Armeo

perdis grandajn fortojn kaj multe reduktiĝis ĝia bazloko en unu jaro. Tiam la Ruĝa Armeo estis endanĝerigita esti plene ekstermita de la malamiko, se ĝi daŭre faros batalon kontraŭ la malamiko. Por konservi la revoluciajn fortojn la Ruĝa Armeo devigite transiris kaj komencis la fame konatan Longan Marŝon.

En la komenco de la Longa Marŝo, la Ruĝa Armeo suferis grandan perdon pro erara komando en milito, kaj la nombro de la armeanoj reduktiĝis de 100,000 al 30,000. En januaro 1935, la Centra Komitato de KPĈ okazigis plivastigan kunvenon de la Politika Buroo en Zunyi de Guizhou-provinco. La kunveno finis la regadon de la "maldekstra" oportunisma linio en la Centra Komitato kaj konfirmis la gvidadon de kamarado Mao Zedong en la tuta Partio. Ĝi eldanĝerigis la Ruĝan Armeon kaj markis la ŝanĝigon kun decida signifo en la historio de KPĈ.

Dum la Longa Marŝo, la Ruĝa Armeo transiris profundan kaj torrentan Dadu-riveron, konkeris la altan neĝkovritan montaron pli ol 1300 kilometrojn longan kaj trapasis vastan senhoman marĉejon. Dum unu jaro de la Longa Marŝo la Centra Ruĝa Armeo piediris 12,500 kilometrojn, trapasis 11 provincojn kie loĝis pli ol 200 milionoj da loĝantoj, faris pli ol 380 grandajn kaj malgrandajn batalojn, rompis persekutadon kaj obstrukcadon de kelkcent mil Kuomintangaj armeanoj bone ekipitaj. En 1935 la Ruĝa Armeo venke atingis la celokon — nordan parton de Shaanxi-provinco. De tiam la revolucio de la ĉina popolo gvidata de la Komunista Partio eniris en la novan historian periodon.



La moro de golaŭ-oj

de LUO GUOFAN

EN la majesta montaro okcidente de la rivero Beipan de la provinco Guizhou (Gujōu) troviĝas la montego Xilai, ĉe kies piedo estas du vilaĝoj de golaŭ-oj. Unu el ili nomiĝas la Antaŭa Vilaĝo, kaj la alia — la Posta Vilaĝo.

En iu serena tago, akompanate de sekretario Yao de la komunuma partia komitato mi iris viziti maljunan kantiston en la Posta Vilaĝo. Ekirinte de Maoan ni venis al la pramejo Baicheng, kaj de tie laŭ la plaĝo de la rivero ni iris al ĝia malsupra baseno, kaj post irado de ĉ. 5 km. ni atingis la riverkurbiĝon, apud kiu kreskas ĉielskrapantaj banjanoj. Subite aŭdiĝis de la bordo agrabla muziko de kvarkorda instrumento. Mi rigardis antaŭen kaj vidis, ke du grupoj da golaŭ-aj gejunuloj ĝoje interparolas sub banjanoj. Momente poste iu junulo jetis ion al knabino, kio kaŭzis gajan ridadon. Sendube li estis montranta sian amon al la knabino.

Ni venis al alia flanko de la montego kaj vidis, ke klara fontakvo fluas el sub la piedo de la krutaĵo kaj iu golaŭ-a junulo trinkas akvon helpe de la manoj.

“Kien vi iras, Aou?” demandis sekretario Yao.

“Al la Posta Vilaĝo,” diris Aou kun rideto, “kaj kien vi?”

“Al la sama loko,” respondis Yao. “Ĉu por peti ies manon?”

Ruĝiĝinte, Aou ridetis kun klinita kapo.

“Kiel vi scias lian intencon?” demandis mi.

“Ĉu vi ne vidis la paron da mangbastonetoj pakitan en ruĝan paperon en lia sino?” diris li kaj rakontis al mi interesan moron de la golaŭ-a nacieco pri geedziĝo.

Kiam golaŭ-aj gejunuloj estas enamiĝintaj unu al alia, ili plukas dikajn foliojn de banjanoj, pakas ilin en mantukon kaj jetas ilin unu al alia. Tio montras, ke la amo longe daŭros kiel banjano.

Post tio, la junulo iras al la hejmo de la knabino por peti ŝian manon, portante paron da mangbastonetoj. Veninte en ŝian hejmon, li metas la ruĝan pakon sur tablon. Vidinte la mangbastonetojn, la gepatroj, fratoj kaj bofratinoj de la knabino tuj komprenas lian intencon. La junulo kun rideto ekparolas:

“Onklo, mi venos trinki vinon en la venonta jaro!”

La parencoj de la knabino priĝardas la junulon de la kapo ĝis la piedoj. Se ili opinias lin bona, ili donas dusencan respondon:

“Oni ne estas certa pri vino, ĉar glueca rizo ankoraŭ ne maturiĝas!”


Aŭdinte tion, la junulo ekĝojas, ĉar tio montras, ke li ricevis permeson veni venontjare. En la sama monato de la sekvanta jaro la junulo kun vino sin direktas denove al la hejmo de la knabino. Li metas la vinon sur la tablon kaj diras:

“Onklo, mi ja venis por trinki!”

“Bonvolu!”

Kun rideto respondas la gepatroj, fratoj kaj bofratinoj de la knabino.

Golaŭ-aj kamparanoj esploras kreskon de rizo en la kampo.



Ili preparas por li bongustajn plaĉojn kaj invitas najbarojn al la tablo. Ĉiuj trinkas kaj ĝoje interparolas. La maljunuloj multe laŭdas la fidelan amon de antikvuloj kaj kritikis samtempe flirtadon kaj trompon de iuj homoj en ilia amafero, kun la celo admoni la junulon esti fidela al la amo kaj neniam turmenti sian edzinon. Kiam la junulo komprenas tion kaj foje-foje esprimas sian sincerecon, ĉiuj ektrinkas ĝoje.

Post tio la maljunuloj komencas pridemandi la junulon unue pri liaj familia deveno, praaĵoj kaj konduto, eĉ se ili jam sciis tion antaŭe probable por ke li bone memoru siajn glorajn praaĵojn kaj lernu ilian laboremon kaj honestecon. Poste ili ekzamenas liajn sciojn pri plugado, erpado, plantado, falĉado, brutobredado, komercado, ĉasado kaj fiŝkaptado. La junulo respondas zorge kaj esprimas dankon pro ilia instruado. Dume la knabino kaŝas

sin malantaŭ la pordo de la interna ĉambro kaj ŝtele aŭskultas. Kiam ŝia amato respondas flue kaj kontentige, ŝi sentas ĝojon kaj honteme ekridetas.

Ĉifoja trinkado signifas certecon de la geedzeco. En la sama monato de la tria jaro la junulo venas "jeti ŝtofon", t.e. venigi la novedzinon. En tiu tago la gepatroj de la knabino ne invitas siajn parencojn al la nupto, sed nur ŝiaj amikinoj venas akompani ŝin per ludo de liuto kaj fluto por gratulo. La knabino vestas sin feste, kaj ŝiaj akompanantinoj kombas al ŝi la harojn, kantante himnon kaj atendante la alvenon de la novedzo.

La junulo en novaj vestoj kun peco da blua ŝtofo (pli ol 4 metrojn longa kaj pli ol 0.5 metron larĝa) en unu mano iras al la hejmo de la novedzino, akompanate de 6-7 intimaj amikoj. La knabinoj manpuŝas la novedzinon ekster la pordon, por ke ŝi atendu la novedzon. Kiam

la novedzo atingas lokon je 5-6 paŝoj for de la novedzino, la akompanantoj de la novedzo malvolvas la ŝtofon por li kaj la lasta tenas unu finon de la ŝtofo kaj ĵetas la alian al la novedzino. Tuj kiam ŝi estas kaptinta la ŝtofon, ŝiaj akompanantinoj rapide ĉirkaŭvolvas ŝian talion per ĝi. Kaj la novedzo kondukas ŝin en sian hejmon tirante la ŝtofon.

Aŭskultinte tiun interesan rakonton de sekretario Yao, mi pensis en mi, kiel ĝentila kaj simpla estas la nupto de la golaŭ-oj.

Kiam ni estis baldaŭ venontaj al la piedo de la montego, junulo Aou estis alproksimiĝanta al ni. Ŝajnis al mi, ke li ne volas rapidigi siajn paŝojn probable pro hontemo. De tempo al tempo mi returnis la kapon por rigardi, al kiu hejmo li iras por peti manon. Mi tre interesiĝis, ĉu li ricevos aŭ ne tian dusencan respondon. Mi kore deziras al li sukceson en la venonta jaro.

Sporto

EMINENTAJ ĈINAJ SPORTISTOJ PREMIITAJ

En la 28-a de februaro, la Komisiono de Korpokulturo kaj Sportoj de la Ĉina Popola Respubliko okazigis kunvenon por premii 7 gesportistojn per medaloj kaj 197 per meritatestiloj.

La medaloj estis donitaj al la gesportistoj, kiuj rompis mondajn rekordojn aŭ gajnis mondan ĉampionecon. Ili estas Ma Yanhong, kiu gajnis ĉampionecon de la ŝtupa paralelado en la 20-a Monda Gimnastika Ĉampionea Konkurso, Hong Wei kaj Dong Zhibin, kiuj rompis la mondan rekordon de ĉiela restado de modela hidroplano per telekonduko, Chen Zhijian, kiu rompis la mondan rekordon de fluga

alteco de la modela hidroplano kun motoro, Ye Jiading, kiu rompis la mondan rekordon de rekta distanco de la modela helikoptero de telekonduko, kaj Yu Jiping, kiu rompis, per memelektita fusilo, la mondan rekordon de pafado al kurantaj porkfiguroj, je diversaj rapidecoj. Ankaŭ Ni Zhiqin, kiu rompis, en novembro de 1970, la mondan rekordon de vira altsalto per 2.29 m., ricevis la medalon.

Inter la gesportistoj premiitaj per la meritatestiloj troviĝas ĉiuj membroj de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, kiuj montris altan nivelon en la internaciaj konkursoj, ĉiuj membroj de la Ĉina Vira Flugpilka Teamo kaj la Ĉina Vira Korbopilka Teamo, kiuj akiris rajton en la aziaj konkursoj partopreni la finalan konkurson de la 22-aj Olimpikoj. Cetero, inter ili troviĝas ankaŭ gesportistoj de plonĝado, gimnastiko, halterlevo, sagpafo, pafo, skermo,

ludo de modela aeroplano, paraŝutado kaj atletiko.

ĈINAJ SPORTISTOJ EN LA NAĜKONKURSO EN MALLONGA BASENO

Je la lasta tagdeko de februaro de la kuranta jaro, dek ĉinaj naĝistoj partoprenis en la Internacia Barneta Naĝkonkurso en la Mallonga Baseno okazinta en Britio. En 18 disciplinoj ili gajnis 1 ĉampionecon, 4 duajn lokojn kaj 1 trian lokon. En la 200-metra vira dorsonaĝa konkurso, 18-jara Li Zhongyi gajnis la ĉampionecon per 2'9"87. Li gajnis ankaŭ la duan lokon en la 100-metra vira dorsonaĝa konkurso per 1'0"20. Alia ĉina naĝisto Qiao Yong gajnis duajn lokojn en la 100-metra individua kaj 400-metra gevira naĝkonkursoj.

En la naĝkonkurso partoprenis 350 naĝistoj de 58 teamoj el Irlando,

Italio, Svisio, Britio kaj aliaj landoj kaj regionoj.

INTERNACIA ŜAKLUDO DE AZIAJ URBOJ

En la nomita ŝakludo okazinta en Xianggang (Hongkong) februare, la Shanghai-a teamo de Ĉinio gajnis la ĉampionecon, la Granda-Manila teamo de la Filipinoj la duan lokon kaj la Guangzhou-a teamo de Ĉinio la trian lokon. La konkurson partoprenis 26 urbaj teamoj de Aŭstralio, Ĉinio, Hindio, Indonezio, Japanio k.a.

10 FREMDLANDAJ MONTGRIMPAJ GRUPOJ AL ĈINIO

Lastatempe la Ĉina Montgrim-pista Asocio faris interkonsentojn pri montgrimpado en Ĉinio kun unu FR-germana kaj du japanaj montgrimpaj teamoj, kvar FR-germanaj, du britaj kaj unu japana turistaj grupoj. Ili estis la unuaj interkonsentoj faritaj de la Ĉina Montgrim-pista Asocio kun alilandaj montgrimpaj kaj turistaj grupoj.

VIRINA PIEDPILKA KONKURSO EN BEIJING

En la frua printempo okazis en Beijing la unua virina piedpilka konkurso de mezlerneĵanoj, kiun partoprenis 120 sportistinoj de 6 teamoj. La teamo de Yuanda-mezlernejo gajnis la ĉampionecon. la nomita ludado estas nova sporto en Ĉinio. Koncernaj personoj de la piedpilkista rondo opinias ke la virina piedpilkado utilas al la virina sano, kaj al nutrado de kuraĝeco, persisteco kaj volo por venki malfacilojn.


ĈU VI KONAS ĈINION ?

Jen ni rekomendas al vi novan libron ĵus eldonitan de El Popola Ĉinio

SKIZO PRI

ĈINIO

(17-Es-1054p)



Ĝi skizas la ĝeneralan fizionomion de la lando inkluzive de

GEOGRAFIO

HISTORIO

POLITIKO

EKONOMIO

KULTURO

kun mapo kaj ilustraĵoj

132×186mm 104 paĝoj broŝurita

Prezo: £0.65 US\$1.30

Mendu ĉe peranto de EPC

aŭ ĉe Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN

P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La korea nacieco

Fotoj de YAN JIN

La korea nacieco kun longa historio havas pli ol 1,600,000 loĝantojn, kiuj vivas ĉefe en la provincoj Jilin, Heilongjiang kaj Liaoning de Ĉinio. Ili estas tre lertaj en kantado kaj danco. En festotagoj aŭ post laborado ne nur gejunuloj sed eĉ blankharaj gemaljunuloj kaj 5-6-jaraj infanoj ekdancas laŭ la taktoj de longaj tamburoj.

La danco "Gajaj Kampuloj"



La solo "Gojo"



La danco "Blankaj Gruoj en Flugado"

La arto de la ĉina ombro-teatraĵo

de LIU XIULIN



La plastika arto de ombro-teatraĵo kun originala stilo havas gravan lokon en la ĉina tradicia ornama arto.

La plastiko de la ledaj homfiguroj de tiu teatraĵo estas hiperbola kaj havas fortan lokan koloron. Oni kreis diversajn figurojn per malsamaj koloroj, tiel ke la rigardantoj povas facile distingi bonulon disde malbonulo.

La ombro-teatraĵoj de Shaanxi (Ŝenhi), Hebei (Hebej) kaj Beijing (Pekino) de Ĉinio havas sian elstaran originalecon. La ledaj homfiguroj de la gubernioj Huaxian kaj Dali de Shaanxi-provinco havas seriozan strukturon, brilajn kolorojn kaj flujajn liniojn kaj estas subtile tranĉitaj; tiuj de la gubernioj Fengxiang kaj Fufeng estas simplaj, helkoloraj kaj atente faritaj; kaj tiuj de la kamparo proksime de Xi'an (Hi'an) similas al papertranĉaĵoj kaj havas krudajn liniojn. La ledaj homfiguroj de Hebei-provinco estas hiperbole faritaj kaj riĉas je gusto de desegnaĵoj. Kaj tiuj de Beijing havas klasikan plastikon kaj belajn kolorojn, kaj en la farado oni asimilis iujn apartaĵojn de kostumoj kaj ŝminkitaj vizaĝoj en Pekin-opero.




Dan (juna virino)



Ledaj homfiguroj de la kamparo norde de Xi'an


Ledaj homfiguroj de la gubernio Luanzhou, Hebei-provinco




Laosheng (maljunulo)



Dan (juna virino)



Ledaj homfiguroj de la
gubernioj Huaxian kaj Dali



七五年夏

袁熙坤画于墨连



8152

